

ISSN 1846-5021

GAZETO DE
ZAGREBAJ ESPERANTISTOJ

Zagreba Esperantisto

ԹՈՒՔՆԱՅԼԻՔ
ՅԵՐԱՅԵՆԻՔՄԱՅԻՆՈՒԹՅԱՆ

Ĉi-numere legu pri:

HONORE AL LA "VENKO EN MONTEVIDEO"

LINGVO KAJ MITO

ZAMENHOFA TAGO EN ZAGREBO

SUB LA SIGNO DE IVO LAPENNA

REZULTOJ DE LA LITERATURA KONKURSO

"IVO ROKTVIĆ"

ESPERANTISTOJ DE BJELOVAR

AL SIA URBO

3-4

2014

Eldonanto:

Unuiĝo de Zagrebaj Esperantistoj
HR-10000 Zagreb, Goljak 43

Ĉefa kaj respondeca redaktoro:

Radenko Milošević
Goljak 43
HR-10000 Zagreb
radenko.milosevic@zg.htnet.hr

Plenumredaktoro:

Josip Pleadin
B. Jelačića 138 A
HR-48350 Đurđevac
Kroatio
josip.pleadin@gmail.com

Ekspedejo:

DEC, Bana Jelačića 138 A
HR-48350 Đurđevac
Kroatio
dec.kroatio@gmail.com
zagreba.esperantisto@gmail.com

Redakcianoj:

Krešimir Barković, Snježana
Habulin, Marija Jerković, Jozo
Marević, Radenko Milošević,
Josip Pleadin

Presis:

Tiskara Horvat, Bjelovar

Jarabono (6 numeroj):

120,00 kunaoj / 18,00 eŭroj

Pagebla al konto de Dokumenta Esperanto-Centro:

HR5023600001102158381

aŭ al UEA-konto:

deoc-f

RESUMO

Kvankam ĉi tiu numero de nia gazeto estis pli-malpli preta jam fine de decembro, estis klare ke ĝi aperos pli poste. Tial ĝi estas iaspeca almanako pri gravaj eventoj en la Esperanto-movado de Kroatio en la dua duono de 2014. Tio, kompreneble, ne kongruas kun la postuloj de rapida informado, sed ni neniel volis senigi niajn legantojn de iaspeca kroniko de nia movado, por ke la estontaj generacioj sciu, ke, malgraŭ multaj problemoj en la funkciado, la movado estis vigla kaj la rezultoj de nia laboro abundaj.

La novan malfruon kaŭzis senĉesaj perturboj en la funkciado de Unuiĝo de zagrebaj esperantistoj, sed multe pli la ŝanĝoj en la privata vivo de la plenumredaktoro kaj lia troa okupiteco.

Resumante la eventojn, estus maljuste ne aperigi ĉi-tiun numeron, riĉan je la enhavo, sed ankoraŭ pli riĉan je la paĝoj. Pro ĝia amplekso kaj pro la malfruo de ĝia apero, ni baptis ĝin "duobla numero". Duobligo de numeroj, kvankam ofte praktikata en Esperantujo, neniam estis populara, sed ŝajnis anonco de krizaj momentoj. Ni ne volas kaŝi, ke ankaŭ rilate "Zagrebaj Esperantistoj", tiu pritakso estas pli-malpli prava. Post la jaro 2013, dum kiu ni havis abundajn financojn, kiuj ebligis al ni regule eldoni ses numerojn, la jaro 2014 estis finance tre magra. Per ĉi tiu duobla numero ni do finis la jarkolekton 2014, sed ni daŭrigos obstine, je granda ĝojo de niaj konstantaj kaj bonintencaj legantoj, kiuj zorgeme skribis al ni, kaj je granda malĝojo de malbonintenculoj, kiuj anoncis la "morton" de nia revuo jam en ĝia komenco.

La duan duonon de 2014 karakterizis pluraj gravaj aranĝoj en Kroatio: EEU-kongreso, la manifestacio "Esperantistoj de Bjelovar al sia urbo", la verkista renkontiĝo en Hraščina, kaj fine (denove sukcesega) Zamenhoftaga festo en Zagrebo. Raportojn pri ili kaj pri multaj aliaj aferoj vi povas legi en ĉi tiu numero. Ni devas aparte emfazi, ke UZE organizis tre riĉan kaj sukcesan Literaturan konkurson, kies rezultojn ni publikigas en ĉi tiu numero.

Malĝojigas, ke la streĉiteco en la rilatoj inter Kroata Esperanto-Ligo kaj ĝiaj societo ne malintensiĝas, kaj ke la ofendaj mesaĝoj kaj leteroj ankoraŭ cirkulas kaj venenigas la atmosferon. Profeti plibonigon oni ne povas, kvankam ĝi estas bezonata pli ol pluvego sur sekegan grundon.

de la Nacia Komisiono por Unesko, aŭspicii la 47-an Konferencon de ILEI en Montevideo kaj komuniki al la interesitoj ke post la fino de la Konferenco ili informu pri la rezultoj kaj atingo de la celoj, kiuj estis planitaj.

La unua tago de la konferenco estis la 19-a de julio, dum kiu bonvenigis nin la Loka komitato. La saman tagon en la hotelo **Los Angeles** je la 19h30 ni kuniĝis por la tradicia "Interkona frandvespero", dum kiu ni gustumis manĝaĵojn kaj trinkaĵojn el 21 landoj.

Dimanĉe, la 20-an de julio, okazis la **Interna** kaj la **Solena malfermoj** en la Konferencejo **Ateneo**, kun mallongaj salutvortoj de **Mireille Grosjean** (prezidantino de ILEI), **Sonia Risso** (prezidantino de Loka komitato) kaj **Stefan McGill**, kies vortojn mi devas aparte menci, ĉar ili plenigis min per ondo de fiero. Li diris: "**Se Montevideo estas la urbo, Lapenna estas la homo**", klare emfazante la gravegan rolon de Kroato **Ivo Lapenna** por la "**Venko en Montevideo**".

Sekvis komuna fotado,



prelegoj kaj duontaga promeno tra la urbo.

La 20-an de julio vespere okazis **Nacia vespero**, kiu konigis al ni la tradicion kaj kulturon de la gastiganta lando.

La plej solena evento okazis lunde, la 21-an de julio en la **Leĝa Palaco** (*Palacio Legislativo*), la Parleme-
tejo, kiu

Marija Jerković prelegas en la Leĝa Palaco en Montevideo (supre).

La loko de la historia decido por la Esperanto-movado: la Leĝa Palaco en Montevideo, kie estis akceptita la Unesko-rezolucio pri Esperanto en 1954 (malsupre).



estis kunsido de Unesko en la jaro 1954. La solenaĵon ĉestis la urbestro de Montevideo, sinjorino **Ana Oliviera**, reprezentanto de Unesko por la Suda Ameriko, sinjorino **Britto**, reprezentanto de UEA **Stefan McGill** kaj partoprenantoj de la Konferenco. Salutis nin la prezidantino de ILEI **Mireille Grosjean**, la urbestro, la reprezentanto de Unesko kaj **Stefan McGill** nome de UEA.

Mi havis la honoron prezenti la unuan prelegon titolitan "**Venko en Montevideo**", kaj per ĝi rememorigi pri la gravaj okazintaĵoj inter la 2-a kaj 10-a de decembro 1954, kiuj rezultis per akcepto de la **Rezolucio de Unesko favore al Esperanto**, kaj pri la ĉefa persono de tiu granda atingo, d-ro **Ivo Lapenna**. La tutan historian momenton per sia prelego kompletigis la ILEI-prezidantino **Mireille Grosjean**.

Sekvis vizitpromenado tra la Palaco kaj komuna fotado. Antaŭ la Palaco ni plantis la pacplanton, signinte per speciala memorŝtono.

En kantado, dancado kaj deklamado ni pasigis la programabundan Internacian vesperon, la neeviteblan programon de ILEI-konferencoj.

Mardo estis la ekskursita tago, dum kiu ni vizitis la plej faman turisman lokon **Punta del Este**, kaj tagmanĝis en vilaĝa gastejo, gustuminte naciajn specialaĵojn.

Merkredo estis la tago por prelegoj, diskutrondoj kaj Lingva festivalo. Tiutage ĉiu nacio, antaŭ la Konferencujo sur la **Placo de la Libereco**, prezentis sian nacian lingvon. Vestita en ruĝa-blanka sportĉemizo, mi prezentis la kroatan lingvon.

La saman tagon mi prelegis pri ankoraŭ nuntempe tre aktuala temo: pri la agado de **d-ro Ivo Lapenna** kaj liaj pensoj pri la morala-intelekta integriĝo de la homaro.

Dum la Konferenca bankedo en la restoracio El



Marija Jerković transdonas donacojn al la organizantoj

Forgon, al ni estis ofertitaj enlandaj specialaĵoj, akompanitaj per la nacia urugvaj muziko.

Ĵaŭdo estis la **Simpozia tago** kun gravaj prelegantoj. Pri la daŭraj traviveblecoj de minoritataj lingvoj prelegis **Bengt-Arne Wickström** el **Humboldt-Universitato el Berlino**, kaj pri la "Lingva justeco en Eŭropo" **d-ro Michele Gazzola**.

Samtage okazis ankaŭ la **Adiaŭa vespero**, en kiu parolis **Mireille Grosjean** kaj la prezidanto de UEA, **Mark Fettes**.

Vendrede, la 25-an de julio estis forirekskurso tago, kaj la tuta grupo per pramsiĝo forveturis al Bonaero.

Sonia Riso, prezidantino de Loka organiza komitato diris ĉe la fino: "*Nia lingvo estas fadeno kiu iĝas reto por brakumi la mondon, kaj ligi homojn malsamajn, sed egalajn pro sia idealo de justeco, demokratio kaj paco*".

Gastigis nin Urugvajo, la riĉnatura lando kun propra ĉarmo, pacema popolo kaj afablaj homoj doninte al ni la senton de hejmeco.

La konferencajn tagojn mi ankoraŭfoje uzis por ripeti pretecon de Kroatio sammaniere bonvenigi unu el la estontaj ILEI-konferencoj. Kredante ke ILEI favoros niajn klopodojn, mi revenis Kroation kun multaj pozitivaj impresoj.



Ekskurso ĉe Punta del Este



LA 99-a UK REKORDE MALGRANDA

Redakcia komitato

*laŭ la raportoj de Jukka Pietiläinen, kongresaj komunikoj de
Stefan MacGill kaj la kongresa bulteno
"Bonaera Voĉo", redaktita de Fabricio Valle*



Tra la reto cirkulas diskutoj pri la kaŭzoj, kiuj fortimigis multajn esperantistojn kongresi en Bonaero. Longa kaj multekosta vojaĝo, vintra sezono kun gripo en la suda hemisfero, tutmonda ekonomia krizo ... Ĉiu el tiuj kaŭzoj certe forprenis iun procenteton da potencialaj kongresanoj, sed certe surpriza estas foresto de multaj Brazilanoj, kiuj estas konsiderataj kolono de la Esperanto-movado en Sud-Ameriko. Malbone influis la rezultojn de la kongreso ankaŭ la bankroto de Argentino proklamita dum la kongresa semajno. Ĉio ĉi rezultis, ke la 99-a Universala Kongreso, okazinta en Bonaero inter la 26-a de julio kaj 2-a de aŭgusto, en la historion de Esperanto eniris

kiel unu el la plej malgrandaj. Malpli grandaj estis nur la UK-oj en 1905, 1910, 1915 kaj 1920, do en la pionira epoko de Esperanto. Foresto de pluraj konataj figurojn de la Movado, rezultis ankaŭ evidente malbonan fluon de informoj. Preskaŭ ekskluziva raportisto estis **Jukka Pietiläinen**, kaj nur al li ni dankas ĝustatempajn informojn, ĉar la kongresa bulteno "**Bonaera Voĉo**" estis unu el la plej "*sensukaj, seninteresaj kaj malprofesie produktitaj*", kiel karakterizis ĝin unu el la kongresanoj.

Al la kongreso aliĝis 706 personoj, kaj la programoj okazadis eĉ en tri diversaj ejoj. Kiel ĉefa kongresejo servis la hotelo **Panamericano**, por la Movada foiro estis elektita alia hotelo, kaj kulturaj okazadis en la teatro **Metropolitan**. Pro la malgrandeco de la kongreso, la ejoj tamen bone plenumis sian funkcion.

Eble la plej emociaj momentoj de la kongreso estis la inaŭgura parolado de **Mark Fettes**, kaj transpreno de la kongresa flago flanke de la reprezentantoj de Francio, kie okazos la 100-a UK.

Per projekciado de filmo "**Laŭ la spuroj de Tibor Sekelj**", la kongreso omaĝis la plej konatan vojaĝkronikiston de Esperantujo, kiu vivis kaj laboris ĝuste en la kongresurbo Bonaero. **Tibor Sekelj** estis honorita ankoraŭ dumaniere. Estis prezentita lia nove eldonita libro "**De Patagonio ĝis Alasko**", kiu resumas liajn vojaĝojn tra la du Amerikoj. La prezenton organizis **Orlando Raola** el Usono, kaj ĉeestis ĝin la vidvino de Tibor, s-ino **Erzsébet** kaj lia filo **Daniel** (speciale veninta el Usono). **Belartaj konkursoj** rezultis ankaŭ favore al **Tibor Sekelj**, ĉar lia verko "**Padma, la eta dancistino**" estis proklamita "**Infanlibro de la jaro**".

Pri la laboro de la Estraro kaj Centra Oficejo oni ne aŭdis kritikojn, kvankam eĉ la prezidanto **Mark Fettes** konstatis, ke multaj aferoj ne funkciis. Evidente ne funkciis Konsilio, kiu devis helpi la Estraron, sed restis absolute neaktiva. Kritikinda estis malfruigo de la jarraporto, la afero ne spertita eĉ dum multe pli krizaj jaroj. La membraro eĉ antaŭkongrese kritikis la laborrezultojn de la



redaktoro de "Esperanto-revuo" **Fabricio Valle**, kaj ili daŭris ankaŭ dumkongrese.

El la rezultoj de la Komitata laboro, oni menciis la decidon pri reta voĉdonado.

La kongresaj tagoj havis tute aliajn nomojn ol kutime: tago de konsciigo, tago de kapablago, tago de komunumo kaj tago de kunordigo.

En la bonaera kongreso partoprenis tre malmultaj Kroatoj, kvankam la kongreso mem honorigis ilin per nomoj de salonoj **Lapenna, Sekelj** kaj **Borovečki**.

Unu afero, kiun Kroatoj atendis (kvankam nereale), estis elekto de Zagrebo por estonta kongresurbo. Okazis precize tio, kion, kiel potencialan solvon, anoncis nia ĉefredaktoro en unu el siaj artikoloj: por la **101-a UK** elektiĝis **Nitra** en Slovakio. Laŭ kongresaj onidiroj, ne estis akceptita la opinio de **Osmo Buller**, kiu pledis por Lisbono. Sed ne akceptiĝis ankaŭ aliaj proponitaj urboj. Inter ili, Zagrebo ŝajne troviĝas en la lasta loko, ĉar oni eĉ ne menciis

ĝin kiel primaran kandidaton. Tio nur konfirmas la prognozojn de "Zagreba Esperantisto", kaj absolute ne surprizas, ĉar estus nereale elekti landon kaj urbon, kiuj jam dufoje organizis UK-on.

El perspektivo de UEA, elekto de Nitra ja estas tute normala, ĉar UEA bezonas sukcesan kaj bone vizitotan kongreson, des pli ĉar ankaŭ la bonaera rezultis per granda defcito. Ĉu ne la tasko de la membraro estas subteni sian asocion? Certe la plej konkreta ebleco montriĝas jam en 2015, kiam okazos la jubilea **100-a UK**. Do, ek amase al **Lillo!**

La kongresaj sakoj en Bonaero enhavis ankaŭ specialan prospekton pri kandidatiĝo de Bjelovar en Kroatio por iu estonta ILEI-konferenco. La prospekton eldonis Bjelovara esperantista societo, kaj financis la Departamento Bjelovar-Bilogora. Kvankam por la jaro 2015 kiel urbo, kiu gastigos ILEI-konferencon, estis elektita Oostende en Belgio, Kroatoj plue esperas ricevi la saman honoron en iu posta jaro.



LINGVO KAJ MITO

✍ Senad Čolić

Ofta temo de tradiciaj lingvistikaj diskutoj estas ĉu lingvo kiel instrumento de socia komunikado havas prioritare komunikan aŭ simbolan funkcion. La komunika funkcio ĝenerale estas emfazata pro bezono de homo por perlingva interkompreniĝo. Sed interne de ĉiu difinita lingva komunumo superregas la simbola komponanto emfazanta distingiĝon de ĝiaj parolantoj kun ties kulturo, moroj kaj spirita vivo disde parolantoj de alia lingva sistemo. Laŭ kulturantropologoj grava parto de la spirita vivo de ĉiu lingva komunumo (gento, tribo, etno aŭ nacio) al kiu ties parolantoj estas tre ligitaj estas mitoj. La mitojn liveras psikologio, parolkulturo, identecbezonoj aŭ eĉ historiografio de la difinita socia grupo.

La Internacia Lingvo principe devus esti senigita de ĝia simbola funkcio, ĉar ĝi ne devus flegi senton ke ĝi reprezentas apartan popolon, kulturon aŭ filozofian doktrinon. Tial lernado de Esperanto devus havi tre malmultan simbolan sencon por ordinara homo. Por ĝi unuavice gravas la fakto ke facileco kaj reguleco de la lingvo kaj ĝia uzado samtempe solvas multajn ĝiajn klerigajn kaj praktikajn problemojn en la internacia komunikado.

Ĉu tamen la E-lingva komunumo havas, kreas kaj evoluigas siajn mitojn? Kiuj kaj kiel kreiĝas la Esperantaj mitoj, estas interesa temo, valora por aparta esplorado. Nia historiografio tiurilate ludas sian nemalhaveblan rolon.

La plej fekunda tereno por produktado de "niaj" mitoj ŝajne estas rilatoj de la Movado

kun aktualaj soci-politikaj fluoj kaj biografioj de elstaraj gvidantoj de la movado enlande aŭ internacie. Ekzemploj eble povus esti biografioj de De Beaufront, Drezen, Verda Majo.

La kazo de Ivo Lapenna

El ĉiuj figuroj de la internacia Esperanto-movado ŝajne la plej altiran forton por produktado de mitoj havas la vivo kaj agado de Ivo Lapenna, nekontestebla konstruinto de la moderna UEA. Lia agadstilo kaj precipe ambivalenca karaktero nutris sufiĉe da materialo por kreado de propraj mitoj. El pluraj aliaj eventoj estas almenaŭ du temoj pri kiuj en la Esperanta historiografio jam plektiĝis mitoj, kaj kiuj povus reduktiĝi en la du preskaŭ elipsaj demandoj:

- kial I. Lapenna forlasis Jugoslavion en 1949/1950?

- kial I. Lapenna ne venis al Jugoslavio en 1973?

Jen kion instruas nin pri la afero aktuala historiografio citita el kvar fontoj:

En la eldonaĵo "Utila Estas Aliĝo" (UEA, Rotterdam 2008), okaze de la 100-jariĝo de UEA, verkita de Ulrich Lins, tucerte la plej grava historiografo de la moderna Esperanto-movado, trionon okupis eseo pri "Ivo Lapenna kaj komunistoj". Sur la paĝo 86 de la verko oni konstatas ke "Lapenna, kiu per mallongaj vizitoj al okcidento jam gustumis la tiean vivon en *libero**, simple ne plu povis elteni la atmosferon en Jugoslavio", kaj en piednoto sur la paĝo 85 Lins skribas: „En 1973 Lapenna intencis partopreni la 58-an UK en Beograd,

sed devis rezigni, ĉar la registaro *signalis* ke li ne estas bonvena".

En la memorlibro "Eseoj memore al Ivo Lapenna" (ISIL, Danlando 2001), redaktita de Carlo Minnaja, Mariane Vermaas, eksa direktorino de la CO de UEA (1955-1968) en kontribuajo "Amikeco kaj Laboro", paĝo 161, skribis: "Li antaŭvidis la eblecon, ke iam li estos de Tito *vokita* al alta posteno. Vidinte kiel evoluis la postmilita situacio en Jugoslavio, li sciis ke, akceptante tion li *konfliktos* kun sia konscienco, ne akceptante li *konfliktos* kun Tito."

En la kontribuajo "Hamburgo, plurfoje" en la sama libro, Werner Borman, paĝo 231, skribas: "Sed je la 5-a de julio 1973 li komunikis al siaj estraraj kolegoj, do ankaŭ al mi, ke li ne vojaĝos al la UK. La jugoslavaj instancoj *informis* UEA-n ke kongreso sub prezido de foririnto el ilia lando ne trovos iun ajn oficialan atenton."

En la broŝuro "UEA en la periodo 1970-1980", (Kalmouth, 2002) redaktita de Wim de Smedt, en la kontribuajo de Unuel (Nikola Aleksiev) sur paĝo 24 oni legas: "Lapenna fuĝis el Jugoslavio kaj eklaboris en Britio, kie li ricevis duan ŝtatanecan. La prezidanto de Jugoslavio Josip Broz Tito traktis lin kiel perfidulon kaj *deklaris*, ke dum la UK en Beograd (1973) li "ne deziras sidi ĉe unu tablo kun tiu perfidulo". (Tito estis honora prezidanto de la UK.)

En la plej freŝa "Historio de UEA" verkita de Ziko van Dijk (Espero, Partizanske 2012) sur p. 272, verŝajne surbaze de la supraj fontoj, la aŭtoro skribas: "Mallonge antaŭ la kongreso la prezidanto aŭdis, ke la alta protektanto Tito ne volas sidi apud la "perfidanto"

* Ĉiuj grasigoj en la citaĵoj estas faritaj de Senad Čolić.



kaj ne venos. Lapenna, kiu jam estis planinta partopreni la kongreson, jen preferis foresti.”

La mito konstruiĝis jene: Lapenna, antifaŝisme orientita intelektulo, partizano, komunisto, kandidato por altrangaj partiaj kaj ŝtataj postenoj, pro amo al **libero** por ne **konfiksi** kun jugoslaviaj komunistoj kaj kun Josip Broz, antaŭ la **alvoko** al altranga posteno elmigris en 1949 el la lando al Okcidento petante en 1950 politikan azilon, kaj kiam kiel brita ŝtatano li volis reveni al Jugoslavio en 1973 pro la UK la jugoslavia registaro kaj Tito persone tion **malpermesis**; li fariĝis martiro de politikaj suspektoj kaj persekutoj kiujn li kiel liberama intelektulo ĥeroe rezistis.

La mito ĉi-rilate do kompletigis. Restas nur al historiografoj per dokumentoj kaj deklaroj de "atestantoj" streĉe priskribi ĉion kaj al belartistoj verki legendojn.

Sed kiuj estas la veraj cirkonstancoj en kiuj okazis la famaj eventoj pri foriro/neveno de Lapenna el/al Jugoslavio ni klopodos almenaŭ parte esplori.

La jaro 1973 kaj la sekvo

Estante samtempulo kaj kunludanto de la eventoj almenaŭ en 1973, ni unue prilumos tiun jaron surbaze de disponeblaj dokumentoj kaj rememoroj. Fakte veran respondon al la demando – kial Lapenna en 1973 ne venis al Jugoslavio – oni trovos ne en ĉefludo – partopreno de Lapenna en la 58-a UK, sed en antaŭludo – la "studvizito" de Lapenna al Jugoslavio en printempo 1973!

En 1971 oni jam sciis ke la 58-a UK okazos en Beogrado, kaj la 29-a IJK en Sarajevo. Komence de 1972 Josip Broz Tito konsentis honorofici kiel alta protektanto de la 58-a UK. Samtempe alta protektanto de la 29-a IJK konsentis esti Hamdija Pozderac, prezidanto

de Respublika Parlamento de Bosnio kaj Hercegovino (la plej alta tiutempa politika posteno en respubliko Bosnio kaj Hercegovino).

Kiel juna politikaganto mi estis de 1970-1974 aktive engaĝita en sfero de internaciaj rilatoj en Jugoslavia Junulara Ligo (ĝenerala junulara fronto, tamen ne ideologia organizo kompare al komsomolo, sed jes influata de ŝtata politiko). Ĉar mi membris en ties bosnia kaj partatempaj jugoslavia komisionoj por internaciaj rilatoj, mi ofte vojaĝis de Sarajevo al Beogrado. Mi havis eblecon esti en kontakto kun pluraj eminentaj politikagantoj kaj ekkoni funkciadon de diversaj ŝtataj organismoj. Estante jam funde en la movado kaj konante ĝian (jugoslavian kaj internacian) historion, konante preskaŭ ĉiujn iom gravajn postmilitajn gvidantojn de jugoslavia movado, ankaŭ min intrigis la situacio de Lapenna, precipe lia forlaso de Jugoslavio kaj neniam posta vizito.

Pri la temo mi kelkfoje interparolis kun d-ro Ante Ramljak (1893-1972), juĝisto kaj alta funkciulo de Supera tribunalo de Bosnio kaj Hercegovino. D-ro Ramljak estis la advokato en Zagrebo ĉe kiu juna juristo Ivo Lapenna estis aŭspicianto kaj kies oficejo antaŭ la dua mondmilito (1929-1941) famiĝis pro (senkosta) defendo ĉe tribunalo de komunistoj kaj de aliaj progresemaj homoj. D-ro Ramljak ankaŭ partoprenis ekde 1941 kontraŭfaŝisman, popolliberigan movadon, kaj postmilite estis deputito de Jugoslavia Konstitucia Parlamento kaj la unua urbestro de Zagrebo, kvankam li neniam estis ano de la Komunista Partio. Post translokiĝo al Sarajevo, ĉar devene li estis el Hercegovino, li okupis gravajn poziciojn en la socipolitika vivo, precipe tribunala sistemo kaj loke estis konata kaj influa persono. Li bone konis Lapenna, kaj sekve de lia influo d-ro Ramljak postmilite fine ellernis Esperanton. Li plurfoje diris al mi, konante bonege

jugoslavian juran sistemon, ke Lapenna havas nenian problemojn por reveni aŭ viziti Jugoslavion. Kial li ne faris tion, laŭ Ramljak temis pli pri specifa "kaprico" ol pri racia konduto.

Tiutempe, prezidanto de Esperanto-Ligo de Bosnio kaj Hercegovino estis Ante Degan, juĝisto de la Supera Tribunalo de Bosnio kaj Hercegovino, kiu ankaŭ post sia esploro diris al mi ke ekzistis neniam juraj baroj por eniro de Lapenna en Jugoslavion. Laŭ ĉiuj kompilitaj informoj Lapenna ne troviĝis sur iu ajn listo de nedezirindaj personoj por havi eventualajn malagrablaĵojn en la lando kiel ordinara civitano. Cetere li havis britan ŝtatanecon kaj eĉ sen enirvizo li rajtis eniri Jugoslavion en kiu ajn momento.

Socia vivo en Jugoslavio komence de la 70-aj jaroj de pasinta jarcento sufiĉe demokratiigis, precipe post la politikaj ŝanĝoj en 1965¹⁾, ekonomia reformo en 1966²⁾, konstituciaj amendoj en 1969 kaj 1971³⁾. Eĉ la personoj kiuj suferis en politikaj procesoj en 1948 (IB-uloj)⁴⁾, 1949 (junaj muzulmanoj)⁵⁾, 1954 (liberaluloj de Dilas)⁶⁾ kaj 1965 (polica aparato, Rankoviĉ)¹⁾ povis denove partopreni en socia vivo (ne en tagpolitika), aktivi en sociaj organizaĵoj aŭ asocioj de civitanoj. Al Jugoslavio revenis pluraj elmigrintoj el Okcidento, escepte de ekstrema faŝisma elmigrintaro, sed ankaŭ el Oriento (Sovetunio), eĉ eksstalinistoj.

Post esploro de aferoj je adekvata maniero kaj konsultiĝo kun pluraj personoj mi konkludis ke ne estis obstakloj por vizito de Lapenna al la patrolando, ĉar lia biografio kaj konduto dum la jaroj de ekzilo estis rilate Jugoslavion senmakula. Li distanciĝis de ekstrema politika elmigrantaro, ne partoprenis publikajn agadojn, verkis nek politikajn nek fakajn artikolojn kontraŭ la jugoslavia politika sistemo. En fakaj rondoj kiel fakulo pri internacia juro lia nomo estis konata. En juraj fakultatoj por

la studobjekto "internacia juro" inter la konsultinda literaturo daŭre estis lia verko "Historio de diplomatio I/II" eldonitaj en Zagrebo (1948). Oni sciis pri lia poresperanta agado kaj gravaj funkcioj en UEA. Pluraj konsultitoj opiniis ke por kontaktoj de Lapenna kun fakaj kaj esperantistaj organizaĵoj estas bezonata nenia speciala permeso, sed por oficialaj kontaktoj kun adekvataj organoj de Socialisma Unuiĝo⁷ aŭ la registaro sur kiu ajn nivelo necesas antaŭpreparo pri planata kontakto aŭ celo de la akcepto.

Konsiderante ĉion, konvinkita ke la vizito de Lapenna al Jugoslavio estus en intereso de la tutmonda kaj jugoslavia Esperantomovado kaj en lia persona intereso, la 11-an de oktobro 1972 mi sendis al la Administra komitato (Estraro) de Jugoslavia Esperanto-Ligo (JEL) proponon "*ke en kadro de ĝenerala plano pri maksimuma utiligo de la 58-a UK por vastskala kaj diversflanka informado pri Esperanto kaj la Movado oni tute serioze esploru eblecojn pri invito al d-ro Ivo Lapenna, prezidanto de UEA, fari studviziton al Jugoslavio en printempo 1973*". En posta detalo de la ideo mi emfazis ke "*d-ro Lapenna povus esti gasto de sciencaj akademioj, universitatoj kaj asocioj de juristoj*". "*Se li emos havi kelkajn publikajn prelegojn – kion la plano eksplicite ne antaŭvidis – tion oni povus organizi en asocioj de juristoj pri fakaj temoj kaj eble en laboristaj universitatoj pri ekzemple internacia komunikado. Aparta flanko de lia programo estus vizitoj kaj publikaj aŭ internaj prelegoj en la Esperanto-asocioj*". La plano antaŭvidis ke la vizito okazu "*en marto aŭ aprilo 1973. Ĝi daŭrus du semajnojn. La urboj vizitindaj estus ekz-e Beogrado, Sarajevo, Zagrebo kaj Ljubljana kun eventuala aldono de Novi Sad kaj Split. Nepre necesus tre aktiva engaĝiĝo de Esperanto-societoj el la koncernaj urboj pri altnivela organizo de la vizito surloke*".

La AK de JEL rapide reagis. Jam en protokolo de la kunveno de la 16-a de oktobro 1972 subtagordero⁴ oni povis legi: "*S-ano Senad Čolić sendis leteron, kiu alvenis ĝuste antaŭ la kunsido, kun propono inviti prezidanton de UEA d-ron Ivo Lapenna fari studvojaĝon tra Jugoslavio (Beograd, Sarajevo, Zagreb, Ljubljana eble Novi Sad kaj Split). Lia propono kaj buŝa al prof. Popović kaj en la letero, estas ke la inviton ne faru JEL aŭ esperantistoj, sed esplori eblecojn ke tion faru iu el la institucioj, kiel Akademio de sciencoj, asocioj de juristoj k.s. Pri la samo informis nin ankaŭ s-ano Ivo Rotkvić kiu en sia letero al LKK de la 58-a UK (kopio sendita al JEL) mencias ke en la interparolo kun d-ro Lapenna s-ano Lapenna akceptis tian vojaĝon. Ĝi okazus en printempo venontjare. Estas decidite unue esplori eblecojn. La taskon transprenis la prezidanto prof.d-ro B. Popović*".

En Sarajevo la vizito de Lapenna estis jam sondita. Li havus akcepton en la Jura fakultato ĉe katedro pri internacia juro, li estus akceptita en la Asocio de juristoj sub prizorgo de Ante Degan, kadre de tribuno de Universitata Esperantoklubo Lapenna publike prelegus pri "lingva aspekto de internacia kunlaboro" kaj dum vespermanĝo renkontiĝus kun sarajevaj (bosniaj) esperantistoj.

Al la afero la AK de JEL denove revenis en kunsido okazinta nur la 26-an de januaro 1973 en kies protokolo estas notite: "*Pri la invito al d-ro Lapenna al Beograd kaj aliaj lokoj, la prezidanto (B. Popović) klarigis ĉiujn kontaktojn kiujn li faris. Fine estis proponite kontakti Osibov⁸) kiu povus doni eblajn temojn kaj tiamaniere pli interesigi pri la prelegvojaĝo sciencajn instituciojn. B. Popović skribis al s-ano Ivo Osibov antaŭ du semajnoj, sed la respondo ankoraŭ ne venis*".

Kompreninte ke la plano pri la vizito ne bone evoluas, meze de februaro 1973 mi utiligis vojaĝon

al Beogrado por renkontiĝi kun B. Popović kaj estraranoj de JEL. Laŭ mia memoro ni lunĉis en loĝejo de familio Ŝaponjić, ĉeestis do prof. Božidar Popović, prezidanto de JEL, s-ino Jelena Ŝaponjić, ĝenerala sekretario de JEL, prof. d-ro Momčilo Ŝaponjić, prezidanto de LKK de la 58-a UK kaj mi kiel prezidanto de LKK de la 29-a IJK. Ni parolis pri pluraj aspektoj de kongrespreparoj kaj kompreneble pri fiaskanta ideo de la vizito de Lapenna. Prof. Popović resume informis ke kontaktoj kiujn li havis kun la Serbia Akademio de Sciencoj (pere de d-ro Mehmed Begović), la Beograda Jura fakultato kaj la Serbia Asocio de juristoj renkontis plenan indiferenton kaj certan antaŭjuĝon. Malhelpis la fakto ke Lapenna estas "kroato kaj politika disidentito" kio sufiĉis por sindetenemo de la institucioj. Nur de Split (Osibov) kaj Sarajevo oni ricevis pozitivajn respondojn, silenton de Ljubljana kaj privatan subtenon el Zagrebo (Rotkvić).

Min surprizis la fakto ke tia traktado de Lapenna estas verŝajne sekvo de lia prezento fare de la kontaktintoj. En Sarajevo ni kutime informis ke temas pri prezidanto de UEA, kiu vizitas Jugoslavion pro okazontaj kongresoj sub altaj aŭspicioj, ke li estas profesoro ĉe la londona universitato pri internacia juro kaj por fakaj rondoj interesa kunparolanto. Evidente en Beogrado prezento de la afero havis tute alian enhavon.

Dum la lunĉo mi insistis ke la viziton oni klopodu tamen realigi laŭ la aktuala situacio kaj koncentri nin al (publikaj) vizitoj en Split (la naskiĝurbo de Lapenna) kaj Sarajevo, kaj ke en Beogrado kaj Zagrebo okazu nur renkontiĝoj en Esperanto-asocioj, kaj ke eble pro la UK oni klopodu atingi akcepton ĉe la Federacia Konferenco de Socialisma Unuiĝo (sekretario de la organizo aŭ almenaŭ en la komisiono pri sociaj organizaĵoj) por informi pri la kongrespreparoj.

Prof. Ŝaponjić komentis:



"Se Lapenna venos en Beograd, ni akceptos lin en la E-societo "R. Klajić", kio do inkludis ke krom la renkontiĝo en la asocia sidejo kaj verŝajne interparoloj pri la kongrespreparoj, nenion plian oni pretas fari. Mi konstatis ke ĉe la gvidaj personoj en la tiama jugoslavia movado en Beogrado regis ia apatio, skeptikemo kaj ke ankaŭ ili ŝajne konformiĝis kun la tradicia (grand)serba ideologia matricio laŭ kiu Lapenna estas, unue, kroato (ne tro fidinda elemento), due disidentulo (potenciala endanĝeriganto de la ŝtato) kaj nur trie esperantisto (eĉ ne nepre "samideano" en laŭvola interpreto de tiu signifo fare de ĉiu individuo).

En tiu tempo prof. Popović (1913-1993) instruis ĉe la Universitato en Niš, prof. Ŝaponjić (1920-1983) ĉe la Universitato en Novi Sad, al kiuj ili ĉiusemajne devis vojaĝi, kaj rutinajn kontaktojn kaj laborojn de JEL fakte plenumadis Jelena Ŝaponjić, kiel ĝenerala sekretario, tiutempe plentempa oficistino de JEL kaj ĉefredaktorino de "La Suda Stelo". Jelena Ŝaponjić (1926-2008) estis filino de beograda pioniro Radomir Klajić (1874-1954), Esperanto estis funde ŝia familia kaj post edziniĝo al prof. Momčilo Ŝaponjić privata afero. Ŝi havis senliman sindonemon kaj bonvolemon, sed ŝia mezgrada laborsperto estis gravaj limigoj por eksteraj kontaktoj, precipe por rilatoj kun politikaj kaj publikaj instancoj.

Mi komprenis ke J. Ŝaponjić tuj plulaboros pri la afero en Beogrado ĉe federaciaj instancoj. Sed baldaŭ mi estis informita ke la tuta afero ne estas realigebla. En protokolo de la AK de JEL de la 9-a de majo 1973 estas notite:

"Por organizi prelegojn de s-ano I. Lapenna estas ricevita principa konsento nur el Split kaj Sarajevo, sed intertempe d-ro Lapenna rezignis pri sia vojaĝo, esperante ke tion li povus fari aŭtune."

Monaton poste, je la 13-a de junio 1973 mi estis en Beogrado pro kunveno de komisiono por internaciaj rilatoj de Jugoslavia Junulara Ligo, kaj posttagmeze mi partoprenis kunsidon de la beograda LKK. Interparolante kun Jelena Ŝaponjić (B. Popović ne ĉeestis en la kunsido) pri la vizito de Lapenna, ŝi informis min ke fine de marto 1973 ŝi vizitis Federacian Konferencon de Socialisma Unuiĝo, kaj ke certa funkciulo akceptis ŝin kaj post kiam ŝi informis lin pri eventuala baldaŭa alveno kaj akcepto de Lapenna en Socialisma Unuiĝo, la koncerna funkciulo⁹⁾ ne aprobis tion, sed ke ŝi anstataŭe sukcesis atingi ke prezidanto de Socialisma Unuiĝo de Jugoslavio, Veljko Milatović, akceptu la delegacion de JEL por informiĝi pri la kongrespreparoj. Pri la afero verŝajne prof. Popović informis I. Lapenna, kiu komprenis ke li estas nedezirinda en Jugoslavio kaj sekve li rezignis ankaŭ de la kongresvojaĝo. Pri tio Lapenna informis la estraron de UEA.¹⁰⁾

Ĝi do estas pli malpli plena historio pri la nealveno de Ivo Lapenna en 1973 al Jugoslavio. La tuta ideo pri la "prelegvojaĝo" (tute ne temis pri serio de publikaj prelegoj) kaj akcepto (de "disidentulo") en Socialisma Unuiĝo de Jugoslavio pri la afero kiun aŭspicias prezidento Tito pro nekompetenta, eĉ antaŭjuĝema prezento, "pritraktata" sur tre malalta nivelo, kompromitiĝis en triangulo de kelkaj beogradaj intelektuloj, malaltrangaj burokratoj kaj aŭtocenzuremaj "samideanoj". La rezulto estis konata. Ĝi ne povis esti alia ol plena fiasko, ĉar kutima kompreno de nekompetentuloj kaj burokratoj estas ke prefere okazu nenio ol okazu io pri kio oni riskas kaj kion oni tute ne komprenas.

Iom koincide en la sama tempo, la 30-an de aprilo 1973, Beogradon vizitis Nikola Aleksiev, prezidanto de Mondpaca Esperanto-Movado kun proponoj al la estraro de JEL organizi dum la beograda UK novan sesion de "Interlanda

renkontiĝo" de najbaraj (balkaniaj) Esperanto-asocioj kaj oficialigi en JEL MEM-sekcion kaj peranton de revuo "Paco". Verŝajne dum neformalaj interparoloj oni tuŝis la temon pri la "prelegvojaĝo" kaj la "akcepto" el kio Aleksiev eltiris siajn konkludojn kaj diskonigis la aferon tra "konspiraj" kanaloj de la Esperanto-movado.

Estas do tute certe ke jugoslavia registaro neniam okupiĝis pri Lapenna, eĉ ne pri la UK ĉar ĝi estis en kompetento kaj socia atento de Socialisma Unuiĝo, sekve ĝi neniam ion ajn "signalis" al kiu ajn. Estas tute certe ke Tito neniam aŭdis pri alvenemo de Ivo Lapenna (kiu entute povis lin informi pri tio?), ke li eĉ ne planis sidi ĉe "kongresa tablo" (kiu entute kapablis politike-diplomate sondi tion ĉu ene de UEA aŭ de JEL?) – ĉar ja tute evidente Lapenna rezignis iri al la kongreso kaj Tito tamen ne venis "sidi ĉe la tablo". Estas tute certe ke jugoslaviaj instancoj neniam informis UEA (kiun en UEA – estraron, prezidanton, KKS-n, CO-n... – kie estas tiu dokumento?) ke la kongreso sub prezido de la "foririnto" el la lando havos nenian oficialan atenton. Lapenna do ne venis kaj la oficiala "atento" apenaŭ okazis. Kiu ene de UEA aŭ de JEL enute kapablis animi la deziran oficialan atenton?

Restis nur onidiroj kaj mitoj

Estus interese scii ke samtempe la sama JEL-Estraro kaj la LKK klopodis pri tri gravaj aferoj ĉe oficialaj ŝtataj instancoj:

- akcepto de la JEL-delegitaro ĉe Tito,
- grava ŝtata subvencio por la kongreso,
- aprobo de ŝtata loterio por JEL por financi ĝian agadon kaj precipe revuon "La Suda Stelo".

Ĉiuj tri projektoj plene fiaskis (laŭ Popović pro "burokratoj") kaj tio eble plej bone

ilustris kapablon kaj kompetenton de la tiutempe aktuala gvidantaro de JEL.

El la sama epoko estas ege instrua riproĉo de Slovenia Esperanto-Ligo (d-ro Peter Zlatnar) al la estraro de JEL¹¹⁾ ke al diversaj eksteraj vizitoj iru "reprezentantoj kiuj konas la aferon kaj ne laŭ la funkcioj", al kio J. Ŝaponjić ofendite respondis ke "personoj kiuj okupas iun funkcion en socia organizaĵo ne rajtas ne koni 'la aferon' " kvazaŭ kompetento kaj funkcio estas aŭtomate ligitaj.

Sed koncerne Lapenna, nur jaron poste, en 1974 en iom dramecaj cirkonstancoj dum la UK en Hamburgo, okaze de la elekto de nova Estraro de UEA, Ivo Lapenna ekŝiĝis el membreco kaj el ĉiuj funkcioj en UEA kreante ŝajne sufiĉe seriozan krizon en la monda Esperanto-movado. Lapenna interpretis la hamburgajn eventojn kiel kontraŭneŭtralecan politikan konspiron kaj puĉon en UEA. En sia studo "Hamburgo en retrospektivo" Lapenna per diversaj dokumentoj kaj materialoj eksponis ĉiujn okazaĵojn en sia longjara Esperanto-kariero kiuj havis koncerne lin persone negativan politikan fonon, kun kiuj li konfrontiĝis kaj kiujn li publike rezistis en intereso de la (neŭtrala) Esperanto-movado. Interese ke epizodon pri planata vojaĝo en 1973 al Jugoslavio kaj laŭ liaj historiografoj politika malpermeso de liaj "publikaj rilatoj", Lapenna, kvankam tre freŝa evento, eĉ ne piednote tuŝis, nek aludis al politikaj motivoj kaj kalumnioj kontraŭ li direktitaj.

Se Lapenna volis kuraĝe servi la ideojn de libero kaj de Esperanto luktante "per sia nuda brusto kontraŭ potenca malamiko", kiel li ofte ŝatis oratori, la invitoj de la universitatoj de Sarajevo kaj Split en printempo 1973 estis sufiĉa kialo kaj unika ŝanco por tuj forvojaĝi al Jugoslavio. Se li kiel brita ŝtatano estus haltigita ĉe jugoslavia landlimo kaj se oni malpermesus al la prezidanto de UEA eniron al la

lando, tia skandalo aŭtomate igus lin martiro de la "libera mondo" kaj publika reeĥo de tia eventuala evento estus multe pli granda kaj pli grava por la afero de Esperanto ol dekoj da anonimaj UK-oj aŭ aliaj Esperanto-konferencoj.

Restas tamen la fakto ke unu jaron post nesukcesa reveno aŭ vizito al la patrolando Lapenna pli malpli finis sian imponan karieron en la monda E-movado, specife en UEA.

La jaro 1949 kaj la sekvo

Kial Lapenna forlasis Jugoslavion en 1949 aŭ pli precize ne revenis post unujara studvojaĝo al Francio en 1950, estas alia mito liverata al la movado dum jardekoj. Lapenna mem neniam donis klarigon pri tio, sed ege flatis lin altmoralaj kaj esence nebulecaj tezoj de diversaj personoj kiuj nutris la miton.

Kelkaj "atestantoj" asertis ke li foriris "ĉar li amis la liberon"¹²⁾, pro "timo de komunista partio"¹³⁾ aŭ eĉ por eviti la vokon de Tito al alta posteno (justicministro laŭ Lins). Plej multaj asertoj fakte tute bone korespondis kun la tiutempa okcidenta ideologia propagando dum la "malvarma milito", kio ŝajnis tre oportuna por okcidentaj esperantistoj pro ekstera vizaĝo de la Esperanto-movado kaj ŝajne ne malalloga por la Esperanto-publiko de alia flanko de la "fera kurteno".

Laŭ ĉiuj disponeblaj informoj Lapenna en sia vivo neniam okupiĝis pri politika agado. Malgraŭ sia humanisma eduko kaj demokrataj konvinkoj, li prefere distanciĝis de tio, ĉar li neniam politike aktivis ĉu en Jugoslavio, ĉu en Okcidento. Lia membreco ĉe Jugoslavia Komunista Partio restis ŝajne mistera, sed tio estis tute malgrava afero bone konata al personoj kiuj iam okupiĝis pri publika politika agado. En tiu tempo

ĝi estis ankaŭ ne multe grava por universitata kariero, ĉar nemembroj de Jugoslavia Komunsita Partio okupis gravajn sociajn poziciojn kaj precipe tre altrangis en fakaj rondoj.

Definitive, Lapenna ne foriris pro ideologia devojiĝo, pro politikaj persekutoj aŭ intrigoj, li ne foriris pro profesia kariero.

La plej ĝustan komprenon de tiu enigmo en la ĝisnuna Esperanto-historiografio donis Ziko van Dijk en sia studo "Historio de UEA". Temis sole pri Esperantaj motivoj.

La ĉefa kialo por la foriro estis plena sindediĉo de Lapenna al la monda Esperanto-movado, specife al UEA. Jam de la Unua mondmilito UEA estis en senĉesa krizo, la movado unue ideologie polariziĝis je "neŭtraluloj" kaj "laboristoj", UEA mem disdubiĝis en 1936, ĝi estis en mizeriga stato post kunfandiĝo en Berno (1947) post la Dua mondmilito, kaj en nova arĥitekturo de internacia vivo apenaŭ en la movado estis subjektivaj fortoj kiuj scipovis porti la torĉon. Lapenna ne certis ke el Jugoslavio en la ekestanta "malvarma milito" li povos plenumi sian mision en UEA, kiun li konsideris esence grava por sorto de la Esperanto-movado, kaj li preferis oferti profesian karieron kaj eventualan socian pozicion (esti prezidanto de JEL tiutempe estis socia pozicio!), por povi neŝarĝita de ideologiaj etikedoj, sed jes flatata de mitoj, sin dediĉi al UEA kaj al la Esperanto-movado ĝenerale.

Kiel eksperto pri internacia juro li funde kredis ke novaj internaciaj politikaj strukturoj fondiĝis post la kataklisma Dua mondmilito, iaspeca superregistaro konjektata tra la sistemo Unuiĝintaj Nacioj, ŝajnis unika ŝanco por antaŭenigo de la afero de la Internacia Lingvo kaj li kompletan sian intelektan kaj spiritan energion investis tiucele. Krome, historio de agadoj pri Esperanto en la sino de la Ligo de Nacioj post la unua mondmilito (1920-1925) estis tre instruaj kaj inspiroplenaj.



Post la forlaso de Jugoslavio, Ivo Lapenna en 1949, sub ŝildo de UEA, lanĉis mondan kampanjon kolektante subskribojn de gravaj organizaĵoj kaj unuopuloj por Deklaracio (Peticio) favore al Esperanto transdonita al Unuiĝintaj Nacioj en aŭgusto 1950, transdonita poste al Unesko. Post insistaj kaj persistaj klopodoj tra la proceduroj dum 1952-1953, Ivo Lapenna fine sukcesis atingi ke la Ĝenerala Konferenco adoptu en 1954 en Montevideo la faman rezolucion pri Esperanto.

En 1965 UEA sub prezido de Ivo Lapenna lanĉis novan Proponon al Unuiĝintaj Nacioj ke ĝi "solvu la lingvan problemon per efektiva kaj efika helpo al disvastigo de Esperanto", subtenita de amaso da individuaj kaj kolektivaj

subskriboj el 74 landoj. Ĝi estis en 1966 transdonita al la Sekretariato de UN, sed ĝi restis sen reeĥoj en la aktivecoj de UN.

Se Montevideo (1954) estis ŝajna triumfo kaj konfirmo de bona vojo por antaŭenigo de Esperanto tra interŝtataj organizaĵoj, Novjorko (1966) estis verŝajne por Lapenna plena disreviĝo. Post tiu konfrontiĝo kun la real-politiko la ideoj de Lapenna evidente estis elĉerpitaj.

Tamen, en la jaroj post 1949 Lapenna dediĉis la ĉefan energion al konstruado de fortika UEA. Ekde la unua kongresa festparolado en Parizo (1950) ĝis la lasta en Hamburgo (1974) Lapenna demonstris kiel sian ĉefan organizan celon krei el UEA internacie respektindan organizon

ne nur por esperantistoj, sed por la tuta ekstera mondo. La plej gravaj atingoj tiuvoje estis translokigo de la Centra Oficejo el angla vilaĝo al nederlanda ŝiphaveno Roterdamo (1955), fondo de Centro de Esploro kaj Dokumentado (1951), lanĉo de ĝia scienca revuo *La Monda Lingvo-Problemo* (1968) (poste modifita al *Lingvaj Problemoj kaj Lingvo-Planado*).

Profesoro d-ro Ivo Lapenna en la historio de la Esperanto-movado, malgraŭ liaj multflankaj kaj enormaj kontribuoj al la zagreba, kroata kaj jugoslavia Esperanto-movadoj, restos senmite kaj unuavice memorata, specife por la periodo 1949-1974, kiel la plej grava figuro kaj ĉefa kreinto de la moderna aŭ prefere laŭtempa Universala Esperanto-Asocio.

- 1) La kvina plenkunsido de Centra Komitato de Jug. Komunista Ligo, forlaso de centralismo, reorganizo de ŝtata sekureca sistemo, eksigo de Aleksandar Ranković, ĉefo de la ŝtata polica-sekureca aparato kaj proksima "fortamana" kunlaboranto de Tito.
- 2) Liberaligo de socia kaj ekonomia vivo ebliganta facilan ricevon de pasporto (sekve de kio centmiloj da jugoslavoj foriris al Okcidento kiel gastlaboristoj kun duobla ekonomia efiko - liberigante lokan labormerkaton kaj stimulantante asignadon de firma valuto al la lando) kaj abolante enirvizojn kun ĉiam pli multe da ŝtatoj (el kio sekvis amasa turismo kaj plia alfluo de okcidentaj valutoj).
- 3) Ili estis bazoj por plena malcentriĝo de la ŝtato kaj establo de suverenecoj de respublikoj kaj aŭtonomaj regionoj kiuj konsistigis federacian ŝtaton, ĉio definitive konfirmata en la nova Konstitucio en 1974.
- 4) Lokaj adeptoj de la Rezolucio de la (Kominterna-komunista) Inform-Buroo (IB) okazinta en Bukareŝto en junio 1948, kiu akuzis estraron de Jug. Komunista Partio pro devojiĝo kaj el kiu rezultis fama konflikto Stalino-Tito, kaj sekve forlaso de soveta ideologia kaj politika modelo fare de jugoslavaj komunistoj sub Tito.
- 5) Disbato de adeptoj de organizo de muzulmana junularo en Bosnio-Hercegovino aktivinta dum la dua mondmilito kaj pledanta por religiaj rajtoj de islamanoj sub faŝismo kaj poste sub komunismo.
- 6) Eksigo de Milovan Đilas, proksima kunlaboranto de Tito, el partia kaj ŝtata vivo, gvidanto de liberala alo ene de JKP kaj porparolanto de "okcidentaj" reformoj.
- 7) Socialisma Unuiĝo de Labor-Popolo (eksa Popola Fronto), amasa soci-politika organizo de la laborpopolo reflektanta ĝiajn diversajn interesojn (ofte nepolitikajn) kun propra organiza strukturo ekde lokaj filioj ĝis federacio ariganta ankaŭ amasajn sociajn organizaĵojn, fakajn asociojn, asociojn de civitanoj.
- 8) Ivo Osibov (1937-), juristo, docento ĉe la Univesitato en Split, prezidinto de TEJO, eksa ĝenerala sekretario de UEA.
- 9) Temis kutime pri sekretario de la komisiono por asocioj de civitanoj aŭ oficisto-referanto en la concerna organo, ĉiuokaze malaltranga burokrato, kies nomon mi ne notis ĉar mi ne opinis tion grava.
- 10) Kion ĝustan komunikis B.Popović en sia letero mi sensukcese provis havigi el la arĥivoj de B.Popović kaj JEL (detruitaj) kaj de I.Lapenna (laŭ B. Lapenna la dokumento konsultebla nur post 80 (!) jaroj).
- 11) Protokolo de la kunsido de la AK de JEL de la 9-a de majo 1973 (p.2-3).
- 12) Michael Zander en "Memore al Ivo Lapenna", Kopenhago 1988, p.42.
- 13) Nada Gropuzzo en "Utila Estas Aliĝo", Rotterdam 2008, p.86

LA JUBILEA 80-a KONGRESO DE BLINDAJ ESPERANTISTOJ

Antun Kovač

La jubilea 80-a Internacia Kongreso de Blindaj Esperantistoj (IKBE) okazis de la 13-a ĝis la 19-a de julio 2014 en la hungaria urbeto **Harkány**, kiu konatas pro la saniga termal-akvo. Inter la partoprenintoj el 12 landaj Esperanto-organizaĵoj, troviĝis ankaŭ la ses-membra delegacio de **Kroata Unuiĝo de Nevidantaj Esperantistoj (KUNE)**. Kvankam la kongreson ne organizis asocio de hungariaj blindaj esperantistoj, sed la firmao **“Orbis Pictus”** de **Viŝnja Branković**, helpe de Ligo Internacia de Blindaj Esperantistoj (LIBE), la aranĝo havis ĉiujn kvalitojn de niaj ĝisnunaj kongresoj.

La kongresa temo estis **“Niaj kongresoj - plaĉa diverseco”**, kaj inter la prelegoj pri tiu temo troviĝis ankaŭ la prelego de la verkinto de ĉi tiu raporto titolita **“Miaj 15 Esperanto-kongresoj”**. Speciale impresis la prelego **“Hungario kaj Aŭstrio ne estas nur najbaroj”**, prezentita de sinjorino **Veronika Haupt** el

Aŭstrio, en kiu ŝi tuŝis ankaŭ la kroatan historion, ĉar preskaŭ dum kvar jarcentoj ni vivis en komuna ŝtato. Krom en la prelegoj, la kongresanoj partoprenis ankaŭ en kelkaj kulturaj programoj. Okazis jam tradicia **Internacia vespero**, kaj vespero dediĉita al la Jubilea jaro de ĉeĥa muziko, kaj estis organizitaj ankaŭ du ekskursoj. Duontage la kongresanoj ekskursis al la urbeto **Siklós** kaj tutage al **Pécs**. Je iniciato de **Gradimir Kragić** el Bosnio kaj Hercegovino, okazis kunveno de esperantista grupo de komputil-uzantoj, dum kiu estis interŝanĝitaj spertoj el konkreta laboro kaj kono de komputiloj, kaj estis interkonsentite, ke interparoloj kaj interŝanĝo de spertoj plue okazu en la interretaj paĝoj de LIBE. Por interesiĝantaj kongresanoj ĉiutage okazadis kursoj de Esperanto. La komencantan kurson gvidis **Pier-Luigi Da Costa** el Italio, kaj la progresigan **Natalia Kasymova** el Germanio. Kiel jam kutime, enkadre de la kongreso okazis ankaŭ jarkunveno de LIBE, dum kiu estas akceptitaj programaj kaj

financaj dokumentoj pri la laboro de ĉi tiu organizaĵo, prezentitaj mallongaj raportoj pri aktivecoj de landaj Esperanto-organizaĵoj kaj asocioj, analizita kaj pozitive taksita la redaktado de la informilo **“Esperanta ligilo”**, kiun plenumas la redaktorino **Olena Pošivina**, kaj akceptita la decido pri eksmembriĝo de LIBE el la Eŭropa Blindula Unuiĝo (EBU).

Dum la jarkunveno estis prezentita la iniciato, ke la sekva IKBE okazu en Francio, ĉu kiel memstara aranĝo, ĉu enkadre de la Universala Kongreso de Esperanto, kaj la definitivan decidon faros la Estraro de LIBE.

La kongresanoj honorigis sinjorinon **Viŝnja Branković** pro la sukcesa organizado de la kongreso, kaj mi permesas al mi aliĝi al tiu ĉi honorigo, kaj esprimi ankaŭ mian zorgon, ĉar oni konstatas, ke estas ĉiam malpli da organizaĵoj de blindaj esperantistoj, kiuj estonte kapablos organizi niajn kongresojn. Ĉu troblevos aŭ denove aperos tiel entreprenemaj personoj kia estas nia **Viŝnja**, restas al ni nur esperi!



 *Marija Štoković*

EŬROPA ESPERANTO-UNIO KONGRESIS EN RIJEKA

 Mihaela Cik

Kial Rijeka estas malgranda Eŭropo?

Pasis nur iom pli ol unu jaro post kiam Kroatio fariĝis membroŝtato de Eŭropa Unio. Aliflanke Kroatio jam delonge estas grava parto de la Esperanta movado. Kaj ĝuste la membriĝo al Eŭropa Unio kaj la longa kaj forta tradicio de Esperanto en Kroatio, estis bonegaj kialoj por elektadi Kroation kiel gastiganton de la **10-a Kongreso de Eŭropa Esperanto-Unio**. Sed kial Rijeka? En Rijeka en jaro 1907 estis fondita la unua Esperanto-societo en Kroatio kaj esperantistoj de Rijeka ĉiam estis kaj restis tre viglaj en sia agado. Krome, laŭ la salutletero de la urbestro de Rijeka sendita al kongresanoj, *"Rijeka dum sia tuta historio ĉiam tumaniere estis malgranda Eŭropo ĝuste pro sia multietnismo kaj malfermiteco"*. La etoso de Rijeka do bone konvenas al la ideoj, kiujn subtenas kaj Eŭropa Unio kaj la Esperanto-movado.

Mallonge pri la kongreso

Inter la 6-a kaj 12-a de julio **Rijeka** havis oportunon por montri sian eŭropan karakteron al esperantistoj el proksimume 20 landoj, kiuj partoprenis la **10-an Kongreson de Eŭropa Esperanto-Unio**.

La unua kongresa tago, nomita "Kroata tago" kaj dediĉita al kroataj esperantistoj, estis trafa okazo por prezentado de nove elektitaj estraranoj de **Kroata Esperanto-Ligo**. Dum la diskuto pri la Esperanta movado en Kroatio aperis ankaŭ demando pri gejunuloj pri ilia rolo en la estonteco de la movado. Estas menciinde, ke la kongresanoj volonte diskutis pri la problemoj kaj pozitive taksis la

opiniojn de gejunuloj. Lundo estis rezervita por salutvortoj kaj solena malfermo de la kongreso, dum kiu al **Kroata Esperanto-Ligo** estis transdonita "**Premio Cigno**" por informado pri Esperanto. Krome, oni enkondukis la kongresan ĉeftemon - *Justa Eŭropo kun justaj lingvaj rilatoj - malmultekosta demokratia komunikado*. Pri tiu temo prelegis prezidanto de EEU **Seán Ó Riain**, universitataj profesoroj kaj fakuloj pri lingvistiko kaj sociologio. Aliaj prelegoj temis pri diversaj okazaĵoj, sciigoj kaj projektoj, ekzemple pri la **Zagreba metodo** instrui Esperanton, pri la kolekto de Esperanto-muzeo en Vieno, pri novaj projektoj de E@I, aparte pri la projekto nomata **lingvo.info**, en kiu kunlaboras ankaŭ EEU ktp. Aldone, estis prezentitaj novaj libroj kaj projekciitaj filmoj pri ekspedicio "Sur la spuroj de Tibor Sekelj" kaj dokumentaj filmoj pri la historio de Esperanto. Merkredon oni povis ekskursi al la insulo Krk aŭ duoninsulo Istrio por ekkoni vidindaĵojn de tiu regiono. Ĉiuvespere la kongresanojn amuzis muzikistoj, dancistoj, kantistoj kaj aktoroj kun siaj kulturaj programoj.

Junularo en la kongreso

Dank' al la financa helpo de **Urbo Zagrebo**, la 10-an Kongreson de Eŭropa Esperanto-Unio partoprenis ankaŭ grupeto de kroataj gejunuloj. Ili plejparte estas komencantaj esperantistoj, kiuj eklermis Esperanton ĉi-jare en la kurso organizita de **Studenta Esperanto-klubo** en Zagrebo. Tiu ĉi kongreso estis ilia unua kongreso kaj bonega ŝanco por paroli Esperanton kun eksterlandanoj. La ĉefa misio de la junularo estis lerni kiel organizi kongresojn kaj tial **Zlatko Tišljar**, unu el la kongresaj organizantoj, prelegis pri aferoj

kiujn oni devas prizorgi antaŭ ol la kongreso mem okazos. La gejunuloj povis mem vidi kiel funkcias kongreso, ĉar ili estis je dispono al la organizantoj kaj kongresanoj kiel helpantoj. Ili zorgis pri teknikaj aferoj, gvidis Libroservon, informis ĵurnalistojn pri kongresaj novaĵoj, portis instrumentoj kaj faris ĉion alian bezonatan. Grava parto de la restado en Rijeka por ili estis ankaŭ seminarioj kaj interparolado pri Esperantaj aferoj kun estrarano de TEJO **Veronika Poór** kaj komitatanino de TEJO **Dorota Rodzianko**. Veronika kaj Dorota helpis en plibonigo de lingvaj spertoj per diversaj ludoj. Plej gravas, ke ili prezentis kongresojn kaj rekontiĝoj, kiujn gejunuloj povas partopreni, kaj rekomendis, ke ili kandidatiĝu por stipendioj. Veronika ankaŭ parolis pri la agado de TEJO kaj proponis, ke ĉiu mem trovu taskojn kiujn li/ŝi ŝatus plenumi por reaktivigo de la Esperanta movado inter gejunuloj en Kroatio. Kun espero, ke tiuj taskoj estos baldaŭ plenumitaj, la gejunuloj adiaŭis la kongreson.

Post la kongreso

Partopreno en la kongreso helpis al la gejunuloj senti la veran etoson de Esperantaj renkontiĝoj kaj eklerni kion Esperanto ofertas. Anoj de Studenta Esperanto-Klubo decidis daŭrigi kun siaj kursoj kaj ĉiusemajnaj renkontiĝoj. Ili ankaŭ kandidatiĝos por stipendioj kaj konkursoj por partopreni en junularaj aranĝoj. Studenta Esperanto-Klubo nun havas celon disvastigi Esperanton inter junularo en Kroatio kaj la unua paŝo estas revivigi la kluban retpaĝaron **SEK (Studentski Esperantski klub / Studenta Esperanto-Klubo)** ĉe **Facebook**. Aliaj paŝoj sekvas. Paŝon post paŝo, ni espereble atingos la celon.



 <http://www.esperanto.hr/>



RECIPROKA VIZITO AL SZEGED

✍ "Bjelovara folo" n-ro 3

Bjelovara Esperantista Societo organizis la 19-an de julio vojaĝon al **Szeged** (Hungario) por dudek kvar membroj de Esperantaj societoj el Bjelovar kaj Đurdevac, realiginte tiel reciprokajn vizitojn al siaj hungariaj kolegoj. La vojaĝo estis daŭrigo de la jam komenciĝinta kunlaboro inter esperantistoj de Szeged kaj Bjelovar, kiuj kolektiĝis en la tradicia **5-a Memortago**, dediĉita al la memoro pri la unua hungara esperantisto **Gábor Bálint**, unu el la plej grandaj Esperanto-poetoj **Julio Baghy** kaj la vojaĝkronikisto **Tibor Sekelj**. La programo, kiun partoprenis centoj da esperantistoj el kelkaj landoj de la regiono, okazis en la **Biblioteko Somogy**. La partoprenintoj el Kroatio prelegis kaj projekciis pri la unua bjelovara esperantisto **Fran Kolar - Krom**, prezentis la libron de **Tibor Sekelj "De Patagonio ĝis Alasko"** kaj recitis la poezion de **Julio Baghy**. Sur la naskiĝdomo de la poeto **Baghy** estis metita florkrono, kaj ĉiuj kune tagmanĝis en la tradicia hungara restoracio **"Gödör"**. En la posttagmezaj horoj oni daŭrigis

interparolojn pri plua kunlaboro de kroataj kaj hungariaj esperantistoj, kaj mallonge vizitadis la urbon. **Dokumentan Esperanto-Centron**, la nacian Esperantan arkivkolekton situantan en Đurdevac, la Hungaroj riĉigos per donaco de valoraj presaĵoj en Esperanto, kiujn ili alportos kaj transdonos al siaj kroataj kolegoj dum Tago de la urbo Bjelovar. Konfirmiĝis, ke septembre Bjelovaron vizitos ankaŭ la vidvino de la konata vojaĝkronikisto kaj esploristo **Tibor Sekelj**, s-ino **Erzsébet Sekelj**, por kiu Bjelovaranoj organizos plurtagan programon. Prepariĝas ankaŭ interŝanĝo de pentrajekspozicioj kaj vizito al la hungara minoritato en la Departemento Bjelovar-Bilogora. Ĉiuj ĉi aktivecoj estos parto de la manifestacio **"Esperantistoj de Bjelovar al sia urbo"**, kiu ĉi-jare akiras ankaŭ videble internacian karakteron, ĉar estas anoncita alveno de gastoj el kelkaj eŭropaj landoj. Bjelovaranoj por ĉi tiu jaro elektis Hungarion kiel partneran landon, kaj do la kunlaboro inter Bjelovar kaj Szeged aperas ĝustatempe.

AMO KREAS PACON

✍ Arijana Tkalčec

Bjelovara Esperantista Societo la 19-an de julio vizitis la urbon **Szeged**. Tie la hungaraj esperantistoj festis la 123-an naskiĝdatrevenon de konata hungara esperantisto **Julio Baghy**, la 102-an naskiĝdatrevenon de **Tibor Sekelj** kaj la 170-an naskiĝdatrevenon de **Gábor Bálint**. En la **Biblioteko Somogy** okazis interesaj projekcioj kaj prelegoj pri la triopo. Post la formala programparto kaj interparoloj, ni komune tagmanĝis, gustumante hungarajn specialaĵojn, kia estas malvarma fruktosupo. Ĉe la fino **Ana Lulić** kaj mi deklamis la poemon **"Siberia lulkanto"**, originale verkitan en Esperanto de **Julio Baghy**. La renkontiĝo finiĝis per kantado de Esperantaj kantoj akompane de piano. La tago pasis tre rapide, sed mi kredas, ke al ni ĉiuj ĝi restos en bela memoro. Mi volas ĉe la fino citi la moton de la aranĝo: "Amo kreas pacon, Paco konservas homecon".



RESUMANTE LA AKTIVECOJN DE UZE

Josip Pleadin

La 5-an de septembro 2014 en Kroatia Ekonomia Ĉambro - Zagreba Ĉambro, okazis jarkunveno de UZE, kiu resumis la aktivecojn kaj skizis la programojn por 2014 kaj 2015

La 5-an de septembro, en la malgranda salono de Kroatia Ekonomia ĉambro - Zagreba ĉambro, en Draškoviĉeva strato 45, post preskaŭ 19 monatoj, Unuiĝo de Zagrebaj Esperantistoj (UZE) okazigis sian jarkunvenon (la pasinta okazis la 20-an de februaro 2013!). Partoprenis 14 membroj (**Radenko Milošević**, **Antun Kovač**, **Nikola Turk**, **Marija Jerković**, **Mato Špekuljak**, **Vlado Jurković**, **Srećko Radulović**, **Jozo Marević**, **Tibor Littvay**, **Boris Ĉović**, **Milena Borjan**, **Josip Pleadin**, **Tihomir Lovrić** kaj **Teodor Mikić**) kaj 4 gastoj (**Anto Mlinar** kiel reprezentanto de Kroata Esperanto-Ligo - KEL, **Roža Brletić-Višnjić** kaj **Zlatko Hinšt** kiel reprezentantoj de Kroata Fervojista Esperanto-Asocio - KFEA kaj **Nijolė Petraitytė**, gastino el Litovio). Forestis la UZE-anoj **Željko Zurl**, **Stjepan Žarina** kaj **Damir Prpić** pro privataj kaŭzoj.

En la laborraporto (por la jaro 2013) la prezidanto **Radenko Milošević** kritikis la manieron per kiu KEL invitis membrojn de Esperanto-societoj eksmembriĝi kaj fariĝi individuaj membroj de KEL, kio kaŭzis malkreskon de la membraro de UZE, kiu fine de 2013 havis 16 regulajn membrojn.

Laŭ la raporto, bone funkcias la portalo de UZE, gvidata de **Ivica Milovan**, kaj la aperritmo de "Zagreba Esperantisto" reguliĝis, kaj estis eldonitaj ĉiuj planitaj (6) numeroj por 2013, dank' al la klopodoj de ĝia plenumredaktoro.



Ekde 2013 la tuta laboro pri ZE okazas en Ĝurevac per helpo de **Dokumenta Esperanto-Centro** kaj ĝi estas daŭre presata ĉe **Grafokom**. Dum 2013 UZE eldonis "*Bibliografion de artikoloj aperintaj en ZE*", la longe atendatan "*Jarlibron de UZE 2013*" kaj kunlabore kun la societoj el Sisak kaj Petrinja la libreton "*La Tilia urbo*" de **Marija Horžinek**. Tiujare estis eldonita ankaŭ la 4-voluma verko de **Nikola Turk** "*Tri košćice - kvarat mesa*", kiun financis la Urbo Zagrebo, kaj kiu estis prezentita en la solena salono de **Matica hrvatska** en Zagrebo, la 20-an de septembro. Kune kun la Kroata Unuiĝo de Blindaj Esperantistoj (KUNE), estis eldonita kompaktdisko kun la sona versio de "Mirindaj aventuroj de

metilernanto **Hlapić**". Esperanto-kurso estis gvidita de **Marija Jerković** en la zagreba kvartalo Utrine.

El aliaj aktivecoj estas menciite, ke **Josip Pleadin** en "*Monato*" publikigis artikolon pri la kroataj generaloj liberigitaj en Hago, kaj **Mato Špekuljak** funkciigis la retan forumon de kroataj esperantistoj. La 2-an de marto UZE-anoj partoprenis la 2-an renkontiĝon de societaj reprezentantoj en Sisak, kie ili subskribis la interkonsenton de kvar societoj por inviti ILEI-konferencon al Kroatio.

Kelkaj UZE-anoj partoprenis la prelegon "Esperanto - ĉu genia projekto aŭ stultaĵo" en la **Unuiĝo pri la rusaj lingvo kaj**

kulturo, kun kiu UZE subskribis kontrakton pri kunlaboro.

La 1-an de junio UZE-anoj partoprenis la preparan kunvenon por la jarkunveno de KEL en Vrbovec, kaj la 8-an de junio ankaŭ la jarkunvenon de KEL en Zagrebo, post kio la rilatoj inter KEL kaj la Esperanta opozicio en Kroatio, al kiu apartenas ankaŭ UZE, draste reduktiĝis.

En junio **Marija Jerković** partoprenis la ILEI-konferencon en Herzberg am Harz (Germanio), kie ŝi transdonis la interkonsenton el Sisak pri invito de la ILEI-konferenco, al la prezidantino de ILEI **Mireille Grosjean**.

UZE estis kunorganizanto de la *5-a boatado sur la rivero Kupa*, kiun ĉeforganizis Esperanto-societo "Sisak" inter la 31-a de julio kaj 5-a de aŭgusto.

Dum la *Adriatika feriado* organizita en aŭgusto en Prvić Luka, estis prezentita la laboro de UZE, antaŭ ĉio la revuo "Zagreba Esperantisto", kaj kelkaj UZE-anoj partoprenis la aranĝon "*Esperantistoj de Bjelvoar al sia urbo*" la 21-an kaj 22-an de septembro, kie ili prezentis la eldonajoj de UZE.

Invite de **Esperanto-societo "Sisak"**, okaze de la 35-a datreveno de ĝia fondiĝo, en la urba biblioteko en Sisak la 4-an de novembro, UZE starigis ekspozicion de "*Zagreba Esperantisto*" kaj estis prezentita la libro "*La Tilia Urbo*". Dum 2013 tri membroj de UZE partoprenis la komunan tradukprojekton "*De Patagonio ĝis Alasko*", kaj la UZE-membro **Tihomir Lovrić** tiujare ilustris la libron "*Padma, la eta dancistino*".

Kunlabore kun d-ro **Velimir Piškorec**, en 2013 komenciĝis pretigo de libro pri la kroata lingvisto **Tomo Maretić**, kiu enhavas ankaŭ la tekston de Maretić "*Pensoj pri artefarita monda lingvo*", kie estas planata por eldono sub la eldonmarko de UZE.

La plej granda kaj la plej grava aranĝo de UZE en 2013 estis la *Zamenhofiaga festo*, organizita en la Ekonomia ĉambro kun ĉeesto de ĉirkaŭ cent personoj. Pri la detaloj de tiu aranĝo bonvolu legi en "Zagreba Esperantisto" 6/2013, pagoj 176-177.

En 2013, pro la forpaso (Josip Štajcar kaj Josip Vrančić) kaj la jam menciita individuigo de la membraro de KEL, UZE perdis 5 membrojn.

En 2013 UZE anoncis lanĉon de la *Literaturan konrusion "Ivo Rotkvić"* kaj la *Premio "Degenio Velebita"*.

La prezidanto konkludis, ke la jaro 2013, kvankam malfacila, tamen havis bonajn rezultojn kaj gravajn aktivecojn, kaj ke ĝi montris kiel ni devus agadi en sekvaj jaroj.

Financa raporto konsistis el du partoj: el la raporto de UZE mem, kaj el la raporto pri "Zagreba Esperantisto", kiun pretigis DEC, pere de kies konto okazas ĉiuj pagoj por la revuo.

Laŭ la financa raporto, en la jaro 2013 UZE notis 10.370,46 kunaĵojn da enspezoj kaj 165,70 kunaĵojn da elspezoj. La 31-an de decembro 2013 UZE havis pozitivan saldon de 10.204,76 kunaĵoj. Je la sama dato ankaŭ la saldo de "Zagreba Esperantisto" montris pozitivan rezulton de 1.759,20 kunaĵoj, ĉar en 2013 estis notitaj la enspezoj de 27.954,30 kunaĵoj kaj la elspezoj de 26.195,10 kunaĵoj. Gravas menciigi, ke en 2013 estis likvidita la ŝuldo de 8.843,20 al la presisto "**Grafokom**", kiun montris la financa raporto de la pasinta jarkunveno. Tio eblis nur dank' al kelkaj favoraj cirkonstancoj: la sponsora kontrakto kun la firmao "**Pastor**" el Zagrebo, kaj du eksterlandaj donacoj.

Ambaŭ financaj raportoj estis unuanime akceptitaj, kaj por la laborraporto ekzistis kelkaj kompletigoj:

La sekretario de UZE

Srećko Radulović menciis, ke la 18-an de februaro 2013 estis petita ejo por la beznoj de UZE ĉe Mjesni odbor Donji grad, kaj ke dumjare estis registritaj personoj por reprezentado de UZE, konforme al ŝanĝoj akceptitaj de la pasinta jarkunveno. UZE reklamis sin per T-ĉemizoj, kiujn la sekretario donacis al la medicina personaro de hospitalo en Varaždinske Toplice. La sekretario laboris en la statuta komisiono de KEL.

En la diskuto partoprenis pluraj membroj. **Teodor Mikić** bedaŭras ke la membronombro malkreskas, kaj subtenas la laboron de UZE kaj DEC. **Marija Jerković** akcentis, ke la membroj de UZE ne devas esti nur Zagrebanoj kaj ke estas nepre organizi rondan tablon pri nesolvitaj problemoj de la enlanda movado, ĉar la senco de Esperanto estas kunlaboro. **Anto Minar** salutis la jarkunvenon nome de KEL kaj invitis la ĉeestantojn al la du gravaj aranĝojn kiuj baldaŭ okazos: la *Verkista renkontiĝo* kaj *Esperantistoj de Bjelovar al sia urbo*.

En la diskuto partoprenis ankaŭ **Jozo Marević** (pri la konkordo inter esperantistoj en Primošteno kaj pri sia oklingva medicina vortaro) kaj **Roža Brletić - Višnjić**, kiu bedaŭras, ke la reprezentantoj de UZE ne partoprenis la diskutojn en la "Kroata tago" en Rijeka kaj la jarkunvenon de KEL, vidante en tio nekunlaborem de UZE. Respondis al ŝi **Radenko Milošević**, kiu diris, ke li estis invitita al neniu el tiuj aranĝoj, kvankam li estis vicprezidanto de KEL.

Zlatko Hinš salutis la jarkunvenon nome de KFEA, kaj pri la nova Lego pri asocioj mallonge informis **Srećko Radulović**. Siajn pozitivajn impresojn pri la labo de UZE esprimis **Tibor Littvay**, kaj **Milena Borjan** pledis por trovo de modelo por altiri gejunulojn al UZE.

La 30-an de septembro 2014, en la malgranda salono de Kroatia Ekonomia Ĉambro - Zagreba Ĉambro, okazis kunsido de la proponintoj de Kroatio por organizanto de la **49-a ILEI-konferenco en 2016**. Dum la kunsido estis pritrakitaj ĉiuj ĝis nun faritaj taskoj, kaj definitive decidite, ke oni transdonu la detaligitan inviton al ILEI, kiu malfermis konkurson por kadidatiĝo por la jaro 2016. Kiel definitiva kandidato por la ILEI konferenco en 2016, estis proponita Bjelovar.

La 30-an de septembro **Josip Pleadin** kiel reprezentanto de Unuiĝo de Zagrebaj Esperantistoj (UZE), renkontiĝis kun la estraro de Kroata Fervojista Esperanto-Asocio (KFEA) en ĝia sidejo en Zagrebo, por proponi eventualan kunlaboron okaze de la 60-a fondiĝ-datreveno de KFEA. Ĉar UZE decidis ankaŭ ĉi-jare organizi festadon de Zamenhofa tago en Zagrebo, kiel unu el la temoj estis proponita ankaŭ la jubileo de KFEA. Tiu propono ne kongruas kun la antaŭaj planoj de la zagrebaj fervojistoj esperantistoj, kaj dum la kunveno la 30-an de septembro, ĝi estas rifuzita flanke de la Estraro de KFEA.

Inter la 21-a kaj 23-a de marto apud la hungara ĉefurbo Budapeŝto okazis *JER* – Junulara Esperanto-renkontiĝo.


La renkontiĝo konsistis el pli-malpli kvindek homoj, kaj kadre de *JER* por la unua fojo okazis seminario por junaj aktivuloj - *SPAMO* (Seminario pri Aktivula Maturigo). La bela vilaĝo Horány, kiu situas sur la Szentendreinsulo norde de Budapeŝto donis la hejmon por ambaŭ renkontiĝoj, el kiu *JER* okazas ĉiujare kaj estas organizata de la Hungara Esperanta Junularo. En *JER* partoprenis 3 esperantistoj el Kroatio (Siniša Dvornik,

Vladimir Kamenski kaj Tomislav Divjak). Ĉar ni ĉiuj jam partoprenis *JER*, ni ĝuis vere familiecan etoson. Estis bele denove renkonti malnovajn amikojn kaj konatiĝi kun kelkaj novaj, ekskursi en la urbo, partopreni urboludon kaj ĝui vesperan koncerton en internacia etoso. (Ĵ Tomislav Divjak)

En la Verkista renkontiĝo en Hraščina ĉi-jare estis diskonigita la novaĵo, ke s-ino **Blanka Pavlović-Devčić** donacis al Kroata Esperanto-Ligo la sumon de 5000 eŭroj, por repago de kreditoj por aĉeto de ĝia sidejo en Vodnikova strato en Zagrebo. La saman informon diskonigis la duobla numero de "Tempo" n-ro 121-122 (majo-julio), kiu aperis septembre.



"*La heliko Slavek en la sunflora kampo*" estas porinfana bildlibro de **Sonja Zubović**, kun ilustraĵoj de kroata pentristino **Marina Badurina Cindrić**. La verkon Esperantigis **Judita Rey**



Hudeček, kaj eldonis "Tekston" en Zagrebo. La libro, en kiu la heliko Slavek instruas al la plej juna generacio respekti la interhomajn diferencojn, nobligas la infanojn dum ili maturiĝo. La libro estis prezentita en la 10-a Kongreso de Eŭropa Esperanto-Unio en Rijeka kaj en la Verkista renkontiĝo en Hraščina.

En la nova studsesio de la Interlingvistikaj studoj, kiu startis ĉi-septembre ĉe la Universitato Adam Mickiewicz en Poznano (Pollando), en la plurnacia grupo de studentoj troviĝas ankaŭ **Dalibor Šeatović** el Zaprešić, la novelektita membro de la Estraro de Kroata Esperanto-Ligo.

Revenante el sia vojaĝo tra Albanio kaj Kosovo, meze de septembro tra Kroatio per busete pasis grupo de polaj esperantistoj gvidita de **Tomasz Chmielik**. La celo de ilia vojaĝo estis projektoj pri diskonigo de la albana kulturo kaj literaturo, pri kio jam de kelkaj jaroj okupiĝas **Tomasz Chmielik**. Ilian tranakton apud Omiš prizorgis **Davor Grgat**, kaj en Bjelovar **Josip Pleadin**. La restadon en Kroatio ili eluzis por viziti la pilgrimejon Marija Bistrica kaj por partopreni la Verkistan renkontiĝon en Hraščina, kie **Tomasz Chmielik** parolis pri siaj albanaj (kaj aliaj) projektoj.

“PADMA” KRONITA KIEL INFANLIBRO DE LA JARO

La porinfana romano "Padma, la eta dancistino" de Tibor Sekelj, eldonita pasintjare de "Grafokom" en Đurđevac, fariĝis "Infanlibro de la jaro". Tiel decidis la ĵurio de Belartaj konkursoj de Universala Esperanto-Asocio, kiu proklamis sian decidon ĉe la fino de la 99-a Universala Kongreso de Esperanto en Bonaero (Argentino). Tiu premio jam la trian fojon

estis aljuĝita al Kroatio. En 1999 ricevis ĝin Kroata Esperanto-Ligo por "Mirindaj aventuroj de metilernanto Hlapić" de Ivana Brlić-Mažuranić, tradukita de Maja Tišljar, kaj en 2005 Esperanto-societo "Liberiga Stelo" el Osijek por "Rakontoj sub la lito" de Antoaneta kaj Ana Klobučar, tradukita de Davor Klobučar.



Publike pri Esperanto

- La retejo de *Novi list* (Rijeka) la 19-an de junio 2014 publikigis la artikolon "Esperanto na Wikipediji češći jezik od engleskog".

- La 8-an de julio la retejo *Moja rijeka* publikigis la artikolon de sia ĵurnalistino Smiljana Radović Lagator sub la titolo "Otvoren 10. kongres Europske esperantske unije u Rijeci".

- *Slobodna Dalmacija* (Split) en sia numero de la 11-a de julio 2014, publikigis la artikolon de Davor Grgat "Europski esperantisti u Rijeci".

- La *Portalo de Podstrana*, la 15-an de julio 2014 publikigis la tekston de Davor Grgat "Kongres za sjećanje".

- La *Portalo de Dugi Rat* la 16-an de julio 2014 publikigis la artikolon de Davor Grgat "Kongres za sjećanje".

- La 22-an de julio 2014 Davor Grgat gastis en *Radio Split*, invitita de ĝia redaktoro Mladen Vuković. En la interparolo kun la ĵurnalistino Dragica Lemešić, Davor

Grgat parolis pri siaj spertoj el la 10-a kongreso de Eŭropa Esperanto-Unio en Rijeka. La tekston pri tiu temo sub la titolo "Esperantisti u spomen na Ivo Lapennu" publikigis ankaŭ la retejo de *Radio Split* la 22-an de julio 2014.

- En *Bjelovarac* (Bjelovar), n-ro 30 de la 31-a de julio 2014, sur la paĝo 32 aperis la artikolo "Predstavili rad prvog bjelovarskog esperantista".

- La 1-an de aŭgusto 2014, la *portalo de Departemento Karlovac* publikigis la artikolon "Obilježavanje Oluje 5. spustom niz Kupu."

- *Večernji list* n-ro 18.160, de la 2-a de aŭgusto 2014, sur la paĝo 20 publikigis la artikolon "Esperantisti krenuli Kupom do Siska."

- *Bjelovarski list* (Bjelovar) n-ro 306, de la 4-a de aŭgusto 2014, sur la paĝo 11, publikigis la artikolon "Dogovoren i posjet Mađara Bjelovaru", kaj sur la paĝo 45 la artikolon "Bjelovarski list čita se i u Szegedu".

- La 5-an de aŭgusto 2014 la *portalo de Petrinja* publikigis la artikolon titolitan "Esperantski spust Kupom" de sia ĵurnalistino Marin Fran.

- La 15-an de aŭgusto la retejo *Danas.hr* publikigis la artikolon "Preporuke kongresa Europske esperantske unije vladama država članica EU".

- La 1-an de aŭgusto la retejo *www.tekston.hr* publikigis la artikolon "Puž Slavek u polju suncokreta".

- La 1-an de septembro 2014, la *portalo de Rijeka* publikigis la artikolon "10. kongres Europske esperantske unije u Rijeci".

- En aŭgusto la 10-an kongreson de Eŭropa Esperanto-Unio menciis ankaŭ la *Turisma asocio de Rijeka* en la interreta kalendaro de eventoj.

- *Radio-Koprivnica* (91,7 MHz), en sia prieduka elsendo "Zvon", disaŭdigis la 26-an de septembro je la 13,30 la 20-minutan intervjuon kun prof. Zdravko Seleš pri Esperanto kaj la aranĝo "Esperantistoj de Bjelovar al sia urbo".

- La litovlingva gazeto *Šiaulių kraštas* en sia numero 197 (6870) publikigis la artikolon "Svečiuose par Kroatijos ir Slovėnijos esperantininkus" de Nijolė Petraitytė pri ŝia vizito al Kroatio.

VERKANTE PRI AMERIKO KUN RAVIĜO DE AMANTO

 Orlando Raola

En la literatura tradicio de la mondo, vojaĝrakontoj okupas certe privilegian lokon. Pensu nur pri la heroaj aventuroj de Marko Polo. Ili estis certe granda atingo, sed ilia graveco eksterordinare multobliĝis ĉar la aventuroj estis surpaperigitaj en *La Libro de la mirindaĵoj*, aŭ *La priskribo de la mondo*, tiamaniere ke la legado kaj imagpovo povis provizi al la ordinaraĵoj homoj tra jarcentoj la sperton esti en alia loko, konatiĝi kun aliaj homoj, vojaĝvagadi tra nia mirindaĵplena planedo.

La pli ol centjara literatura tradicio de Esperanto certe pliriĉiĝis, ĉar ĝi entenas la kontribuon de Tibor Sekelj (Poprad, Slovakio, 1912 - Subotica, Serbio, 1988). Li estis nelacigebla mondvojaĝanto kaj same aŭ eĉ pli grave, li dokumentis la mirindaĵojn kaj belecon de la mondo, kiun li priskribis sur miloj da paĝoj, verkitaĵoj en tri diversaj lingvoj (lia denaska serbokroata, hispana kaj Esperanto).

La nuna libro enhavas vojaĝimpresojn registritajn dum kvin vojaĝoj tra malsimilaj regionoj de Norda kaj Suda Ameriko, okazintaj inter la jaroj 1939 kaj 1984. Ĝi komenciĝis kiam Sekelj loĝis en Bonaero dum dekkvin jaroj (1939-1944) kaj de tie esploris Argentinon kaj la najbarajn Brazilon kaj Bolivion. Poste li pasigis tempon en Venezuelo kaj Meza Ameriko (1949-1954). Li fariĝis ĵurnalisto kaj verkisto en la hispana lingvo, unue amatore, kaj poste profesie. En la libro, la aŭtoro ĉarme esprimas la allogon de vivo

**Tibor Sekelj: "De Patagonio ĝis Alasko"
"Grafokom" Ĝurdevac, 2014, 250 paĝoj. 20,5 cm
ISBN: 978-953-7814-04-3**



**S-ro Orlando Raola
prezentis la libron de Tibor Sekelj
en la 99-a UK en Bonaero**

de la esploristo, kiu perlaboras per vojaĝ-ĵurnalismo, sufiĉe por financi nur la venontan vojaĝon.

Sekvis la esplorado de Norda Ameriko en 1973 kaj la longa aventuro de Argentino ĝis Meksikio dum tri monatoj en 1978, kiam li gvidis serban televidan skipon dum filmado de dokumenta filmo. Fine, Sekelj entreprenis du vojaĝojn, motivigitajn per la okazigo de Universalaj Kongresoj de Esperanto en Brazilo en 1981 kaj Kanado en 1984. Dum tiu lasta li faris longan vojaĝon de Novjorko ĝis la kongresa urbo Vankuvero.

La ĝenerala aliro al vojaĝpriskribo en la libro estas plej efike esprimebla per la vortoj de la verkinto mem: "*Mi konfesas, ke al Ameriko mi ĉiufoje aliradis*

kun raviĝo de amanto, kiu ne iras al rendevuo kun la amatino por science percepti ŝiajn ecojn, por esplori ŝin per mikroskopo kaj mezuri per milimetro, sed por halti dummomente antaŭ ŝiaj belaj okuloj, por eksenti molecon de ŝia haŭto, por admire orelkapti ŝian voĉon aŭ en certa momento kun miro kaŝatiskulti neritman spiradon aŭ malkovri verukon sub ŝia akselo".

La longa vojaĝsperto tra tiu ĉi mondoparto donis al Tibor Sekelj unikan perspektivon por aprezi ŝin la kultuajn valorojn, realigitajn malgraŭ tio, ke la enormaj eblecoj estis frakasitaj dum kvin jarcentoj de eŭropa koloniismo. Komence de la libro troviĝas interesa referenco al lia polemiko kun la elstara hispana saĝulo Juan Régulo Pérez, kiu ne kapablis kompreni la kialojn de la relativa subevoluiteco socia kaj kultura de la tiel nomata Nova Mondo. Sekelj respondis konvinke: "*La historio de Ameriko ne komenciĝas en 1492, male tiu estis katastrofa jaro*". Li taksis la ĉefajn karakterizojn de la koloniistoj: "*oravido, kuraĝo kaj krueleco*".

Tibor Sekelj plej intime rilatis kun la homoj, kiujn li renkontis sur la vojo, kaj estas ĝuste tiuj interhomaj rilatoj, kiuj transdonas la plej agrablan guston al tiuj ĉi paĝoj. Plurfoje li rakontas siajn rilatojn kun indiĝenoj en pluraj landoj. Li ankaŭ profunde studis la historion de la forpasintaj civilizoj de la kontinento, kaj eĉ malkovris

gravajn arkeologiajn lokojn profunde en la densaj ĝangaloj de Meza Ameriko. Unu el tiuj malkovroj, bunte rakontitaj en la libro, estis tiu pri la "Blanka urbo" de la Majaaj, kie li trovis kaj la unuan fojon priskribis por la cetera mondo ŝtonan "dokumenton", verŝajne packontrakton inter la Majaaj kaj la praloĝantoj de norda Honduro.

Troviĝas sennombraj ekzemploj de la emociaj rilatoj de Sekelj al la geografiaj lokoj kaj al la historiaj heredaĵoj de la popoloj, kie li gastis. Mi citos unu el tiuj teneraj sentoelverŝadoj: kiam li

havis okazon viziti kaj ekkoni la misteroplenan kaj ege impresajn templojn de Teotihuakano en Meksikio, forte impresita antaŭ la demando pri la naturo kaj deveno de la tolteka mitologia figuro Kecalkoatl, li petis al sia kunvojaĝantino, ke ŝi fotu lin rapide, ĉar la ŝtona skulptita kapo de la dio estis tiom reala ke ...*"mi havas la impreson, ke nun ĝi reviviĝos kaj li kaptos min"*.

Fine de tiu ĉi juvelkolekto troviĝas abunda glosaro kiu klarigas la biografiajn, antropologiajn kaj geografiajn nomojn uzitajn tra

la paĝoj. La Esperantigon de tiu ĉi verkaro, origine serbokroata, entreprenis ol dudek kvin tradukintoj kaj du reviziantoj, sub la ĝenerala redaktado de Josip Pleadin. Por la tuta teamo mi esprimas plej grandan laŭdon, ĉar ili produktis prozon tre agrable legeblan, senartifikan, sed tute ne senantan lingvaĵon, kun la flueco kaj brilo de plejparto de la elstare bonaj Esperantaj originaloj. La teknika realigado de la projekto estas simile tute laŭdinda, ĉar ĝi kondukis al tiu ĉi alkvalita libro, kiun mi sincere rekomendas al ĉiuj legantoj.

ESPERANTO-CENTROJ KUNSIDIS EN BONAERO

 LEE Jungkee

La 31-a de julio, enkadre de la 99-a Universala Kongreso de Esperanto en Bonaero, en la salono Hess okazis faka kunsido de Esperanto-centroj, kiun malfermis LEE Jungkee, estrarano de UEA pri Esperanto-Centroj.

En la kunsido partoprenis dudeko da kongresanoj.

Komence s-ino **Mireille Grosjean** (prezidantino de ILEI) prezentis ĝeneralan situacion de Esperanto-centroj, kiujn ŝi mem vizitis kaj spertis. Sekvis prezento de la geedzoj **Giuseppe kaj Ursula Grattapaglia** pri la historio kaj nuna agado de "Bona Espero" en Brazilo kaj pri la aktivecoj de "Kvinpetalo" parolis s-ro **Brian Moon**.

La ĉeestintoj unuanime emfazis, ke la agado de Esperanto-centroj estas grava por plifortigi nian movadon.

En la fino de la kunsido LEE Jungkee sugestis, ke UEA havu planon fari premion por

kuraĝigi la agadon de Esperanto-centroj. En la ferma ceremonio de la kongreso, li menciis la rolon de Esperanto-Centroj en sia raporto pri la kongresa semajno:

"Estas notinde, ke la graveco de Esperanto-centroj ĉiam pligrandiĝas, por ekspansiigi la kampon de la movado de Esperanto kadre de UEA. Ju pli multe da Esperanto-centroj ekzistos, des pli multe ili kontribuos por disvastigi nian movadon en diversaj terenoj, konservante sian propran karakteron kaj movadmanieron.

En interreta erao, neeviteble elŝpruco de diversaj opinioj kaj agado-manieroj estas natura fenomeno. UEA garantios ilian agadon kaj plie stimulos kaj kuraĝigos ilian viglan aktivecon.

Aliflanke, estas emfazinde, ke por kreskigi la membronombro de UEA Esperanto-centroj okazigu Esperanto-kursojn diversmaniere por civitanoj, kiuj ankoraŭ ne konas Esperanton. Tio devas esti unu el la gravaj taskoj de Esperanto-centroj."




“La triĝiba monto” estas la romano de la sikula verkisto **Ferenc Szemlér** (1906-1978), kies Esperanta eldono aperis en 2014 ĉe la eldonejo **Grafokom** en Ĝurĉevac. La romanon el la hungara originalo tradukis **Lenke Szász**. La temo de la romano estas la vojaĝo de sikula familio al/ de Adritiko ĉirkaŭ la komenco de la unua mondmilito.

ISBN 978-953-7818-05-0
20,5 cm, 111 paĝoj
fortike bindita
Prezo: 9,00 eŭroj

SUB LA SIGNO DE IVO LAPENNA

 Redakcia kompilo



La ĉi-jara Zamenhoftaga festo, kiun la 15-an de decembro organizis Unuiĝo de zagrebaj esperantistoj, okazis tute sub la signo de **Ivo Lapenna**. Nemirinde, ĉar en 2014 estas festata la 60-jara datreveno de la Unesko-rezolucio favore al Esperanto, 40-jara datreveno de la "Hamburga puĉo", kaj en decembro la 105-a naskiĝ-datreveno kaj 27-a morto-datreveno de la ĉefa protagonisto de tiuj eventoj – **Ivo Lapenna** mem.

La Zamenhoftaga festo okazis en la tradicia loko por UZE-programoj – Kroata ekonomia ĉambro – Zagreba ĉambro, en Draškovićevea strato 45. Sed, ĉi-foje ĝi havis ankaŭ specialan gaston, s-inon **Birthe Lapenna** el Kopenhago, la vidvinon de **Ivo Lapenna**, kiu venis pro la prezento de la libro "Esploro kaj Dokumentado", aperinta ĉe

Ivo Lapenna: Esploro kaj Dokumentado.

Redaktita kaj korektita represo de artikoloj el la rubriko "Esploro kaj Dokumentado", aperinta en la revuo "Horizonto" (1976-87). Eldonis Grafokom Đurđevac, 2014, 221 paĝoj. Mendebla ĉe UEA. Prezo: 30.00 €

"Grafokom" nelonge antaŭ la Zamenhofa tago.

En la pli ol kvarhora programo, kiu komenciĝis je la 10h00 kaj finiĝis ĉirkaŭ la 14h30, estis prezentitaj pluraj eroj. Komence estis ludita la Esperanta himno, post kiu la prezidanto de UZE **Radenko Milošević** per

enkonduka parolado salutis la ĉeestantojn. Sekvis disaŭdigo de parolado de **Ivo Lapenna**, kiu en klara kaj konata oratora stilo parolis pri Esperanto. Eĉ post tiom da jaroj en la salono regis silento, karakteriza por publiko, kiu aŭskultas kun granda ĝuo.

La ĉefa parto de la programo estis prezento de la libro *"Esploro kaj Dokumentado"*, kiu estas daŭrigo de *"Esperanto en Perspektivo"* kaj *"Hamburgo en Retrospektivo"*. Sen la laste aperinta libro ne eblas kompreni la movadajn eventojn ĉesojle kaj post la "Hamburga puĉo". La libro mem estis eldonita en tre mallonga tempo, kaj ĝi enhavas "redaktitan kaj korektitan represon de artikoloj el la revuo *Horizonto* (1976-87)". Pri la libro mallonge parolis s-ino **Birthe Lapenna** kaj la eldonisto **Josip Pleadin**. **Marija Jerković** legis citaĵojn el la libro pri la Rezolucio favore al Esperanto, el la ĉapitro 6.

Pri la longa kaj glora historio de la fervojista movado en nia lando, kiu datumas ekde 1924, parolis en sia prelego s-ro **Zlatko Hinšt**.

Post la seriozaj temoj, sekvis pli leĝeraj programeroj, kiujn

per deklamado de poemo de **Emilija Obradović**, anoncis lernantino **Marija Vešnik**. Neatenditan sukceson akiris la *Literatura konkurso "Ivo Rotkvić"*, renovigita de UZE en 2014. Pri la rezultoj kaj laŭreatoj informis la publikon la prezidanto de la konkursa ĵurio profesoro **Zdravko Seleš** (vidu pli detale en ĉi tiu numero).

Ankaŭ la decido pri atribuo de la *Premio Degenio Velebita* estis farita sen dilemoj. Kiel la plej bona kunlaboranto de "Zagreba Esperantisto" estis proklamita **Davor Grgat** el Split.

En la daŭrigo de la programo profesoro **Zdravko Seleš** prezentis sian libron *"Galović i zadne stvari"* (Galović kaj la lastaj aferoj), kaj klarigis la nealtrudeman manieron reklami Esperanton.

La abundan literaturan kaj eldonan aktivecojn, kiuj evoluis inter Pollando kaj Kroatio, mallonge prezentis **Josip Pleadin**.

Kiel kremo sur torto, la jam konata infangrupo *"Gajuletoj"* prezentis al ni mallongan kantan kaj dancan programon. Nelonge antaŭ ili alveno sur la scenejon, estis ricevita ankaŭ la oficiala letero de Urbo Zagrebo, per kiu tiu institucio atribuis al "Gajuletoj" 20.000 kunaĵojn por kovri la kostojn de ilia partopreno en la Festivalo de eŭropaj kantoj en Esperanto en Vroclavo (Pollando), kiu okazos en majo 2015.

Dum la tuta programo funkciis malgranda libroservo kaj ĉiuj ĉeestintoj estis regalitaj per manĝaĵoj kaj trinkaĵoj, kaj pasigis agrablan tempon en amika interparolado.

Resume ni diru, ke temis pri bele organizita aranĝo, kiu altiris la atenton de preskaŭ cent geesperantistoj. Per tio ripetigis la sukceso de la pasintjara aranĝo, okazinta en decembro 2013.

MIA ZAMENHOF-TAGO EN ZAGREBO

 Birthe Lapenna

Antaŭ proksimume tri monatoj mi ekhavis la ideon, ke la *Fondaĵo Ivo Lapenna* – www.ivolapenna.org – eldonu la artikolojn de Ivo Lapenna, mia edzo, el la revuo *Horizonto*. Li mem ofte diris kaj skribis, ke la artikoloj sub la rubriko ED el la revuo *Horizonto* devas esti publikigitaj libroforme.

Mi esploris la situacion kaj venis al la konkludo, ke la plej bona eldonisto estus Grafokom en Kroatio, kion mi neniel bedaŭras.

Mia intenco estis, ke la libro aperu printempe 2015, sed subite Josip Pleadin skribis al mi, ke estus pli bone eldoni ĝin en tiu ĉi Unesko-jaro. Kompreneble, ke mi konsentis, sed tio signifis, ke ni havis nur proksimume du monatojn je dispono. Ni devis rapidege labori, por ke la libro estu preta kaj prezentita la 15-an de decembro 2014.

Mi devas konfesi, ke mi estis sufiĉe streĉita dum tiu periodo – proksimume du monatoj – antaŭ ol la libro estis presita kaj bindita. – Pro tio mi deziras esprimi mian dankon al mia filo, Pierre, kaj al miaj du nepoj, Lucas kaj Niclas, pro ilia pacienco, ĉar ili



certe iom suferis pro mia neglektado de pluraj aferoj dum tiu periodo.

Rilate al Josip Pleadin mi deziras ankoraŭfoje esprimi mian varman dankon pro lia tre kompetenta kaj efektive grandega laboro. Malgraŭ tio, ke li malsaniĝis dum certa periodo, li tamen daŭrigis sian senlacan laboron pri la libro. Nekredeblan energion li havas. ▶

Finfine la libro estis preta por la prezento dum la Zamenhof-festo la 15-a de decembro 2014.

Unuiĝo de Zagrebaj Esperantistoj (UZE) tre afable invitis min al Zagrebo okaze de tiu evento. La aranĝo estis absolute perfekta. Estis paroladoj de la prezidanto, s-ro Radenko Milošević, s-ro Josip Pleadin, s-ino Marija Jerković, s-ro Zlatko Hinšt kaj kelkaj vortoj de mi.

Oni ankaŭ montris fotoraportojn el la vivo de Ivo Lapenna, origine prezentitan dum la Lapenna-vespero la 6-an de novembro 2009, en la Kopenhaga Esperanto-Kulturgrupo, Danio, okaze de lia 100-jara datreveno.

Krom tio oni aŭdigis komunan kanton de mia edzo kaj mi en la kroata.

Ĉe la fino grupo de infanoj venis rekte de sia lernejo por danci kaj kanti ĉarmajn kantojn en la kroata kaj en Esperanto por la ĉeestantoj.

Post la programo estis bela akcepto kun tipe kroataj delikataj manĝaĵoj kaj trinkaĵoj.

La festo komenciĝis je la 10h00 matene kaj finiĝis proksimume je la 14h30.

Laŭ mi ĉeestis iom malpli ol 100 personoj. Kelkaj homoj venis iom poste, ĉar estis lundo kaj labora tago.

Post la aranĝo la prezidanto de UZE, s-ro Radenko Milošević, invitis kaj akompanis s-inon Marija Jerković, s-ron Zlatko Hinšt kaj min per sia aŭtomobilo al mia luksa hotelo (kie mi havis ankaŭ luksan ĉambron). Tie li invitis

nin al ĝia altkvalita restoracio. La direktoro de la hotelo estas amiko de la prezidanto. Pro tio li venis al nia tablo por saluti.

La tuta tago estis absolute admirinda, kaj mi ĝuis esti inter geamikoj.

Fine, mi deziras tutkore danki al la organizintoj, la s-roj Radenko Milošević kaj Josip Pleadin pro memorinda tago, datreveno de la naskiĝo de D-ro Zamenhof, la 60-jara jubileo de la fama Montevidea Rezolucio de Unesko (la 10-an de decembro 2014), la tago de la prezento de la libro de Ivo Lapenna, *Esploro kaj Dokumentado*, kaj la 27-jara datreveno de la forpaso de mia edzo (precize la 15-an de decembro 1987).

LA DRAMECA ATMOSFERO DE MONTEVIDEO EN 1954

 Ivo Lapenna

*Ĉapitro el la libro "Esploro kaj Dokumentado",
legita de Marija Jerković dum la Zamenhofa tago en Zagrebo*

Trista kaj naŭza fariĝas la historio. ... En Parizo mi laboregis. En Parizo mi ĉe la fino malsaniĝis. Mi povas diri nur unu aferon: ĉi tie la situacio estas milfoje pli malfacila, postulas multe pli da pacienco, argumentado, englutado de tre amaraj piloloj, kelkfoje tolerado de rektaj ofendoj. ... Oni devas ĉe ĉio-ĉi montriĝi ege ĝentila, nealtrudiĝema... En tiaj kondiĉoj mi sukcesis paroli kun eble 300 delegitoj de kvindeko da delegacioj. Praktike kun ĉiuj, krom kun tiuj de Orienta Eŭropo kaj de Usono. ... Pri propono de rezolucio neniu volis eĉ aŭdi. Eĉ ne tiuj, kiuj donis la plej favorajn respondojn al Unesko.

En tiaj kondiĉoj mi sukcesis jaŭdon matene (la 2-an

de decembro) interesigi sinjorinon Vallarta, membrinon de la Meksikia Delegacio, pri nia afero. Mi iris kun ŝi al la ekspozicio kaj ŝi estis tre frapita. Ŝi prezentis min al la edzo, kiu estas ĉefo de la Meksikia Delegacio. Post multaj klarigoj, mi sukcesis konvinki lin, ke Meksikio faru la proponon de rezolucio.

Subtenon promesis: Brazilo, Nederlando, Italio, Luksemburgo, Hispanio, Norvegio, Liberio, Vjetnamio, Indonezio, Filipinoj, Ĉinio, Panamo, Nikaragvo, Kubo, Aŭstrio, Kostariko, Hondu-raso... Entute, kune kun tiuj, kiuj respondis favore al la Sekretariato kaj pri kiuj mi kalkulis, ke ili voĉdonos favore, mi havis proksimume 25 delegaciojn, kiuj

promesis subteni. Mi komencis esperi, ke la miraklo tamen okazos...

Estis normale, ke mi ricevu la parolon, ĉar, ja, mi reprezentas la subskribintojn kaj, krome, antaŭ pluraj tagoj mi anoncis min. Sed subite petis la parolon, samtempe kun mi, Prof. Blinkenberg.

Prof. Blinkenberg diris, ke li parolas kiel lingvisto kaj en tiu kvalito li asertis, (I) ke Esperanto tute ne estas internacia, ĉar ĝi konsistas nur el eŭropaj elementoj; ke ekzistas aliaj lingvoj internaciaj, ekzemple Basic English, Interlingua kaj aliaj, kiuj estas multe pli bonaj ol Esperanto, sed ke li entute estas kontraŭ tiuj "artefaritaĵoj", en kiuj oni eble povas esprimi la urugvajan



menuon, sed ne la literaturajn valorojn; (II) ke Esperanton "inventis" amato, kiu nenian ideon havis pri lingvoj kaj ke tial Esperanto havas mizeran aspekton, povran vortaron, primitivan sintakson, en kiu oni nenion povas diri kaj ankoraŭ malpli esprimi la grandajn sentojn de amo ... ; (III) ke Esperanto estas la neom mem de kulturo kaj tute ne povas servi al kulturaj celoj. "Kvankam ekzistas grupeto da personoj, eĉ tre aktivaj, kiel vi povis konstati – li daŭrigis en ironia tono – tamen tio estas sensignifa grupeto." Li finis en absolute neserioza atmosfero dirante, ke estus ofendo por Unesko, se ĝi donus ian ajn apogon al Esperanto. Lia celo estis ridindigi la tutan aferon. Li sukcesis. Li sukcesis tial, ĉar li estis terure akra kaj neniu el la ĉeestantoj – krom la esperantistoj – povis kontroli la neobjektivecon, nesciencecon de liaj stultaj, klaŭnaj diroj.

En tia atmosfero la prezidanto donis la vorton al mi. ... La tutan paroladeton mi faris per glacie malvarma vizaĝo, tiel ke post 30 sekundoj revenis la seriozeco. Post mi parolis bonege la Urugvaja delegito, kiu protestis, ke pri tiel serioza afero oni parolis tiel nedigne kaj neserioze.

La rezulto de la voĉdono estis malbonega: 3 por (Meksikio, Ĉinio, Urugvajo), 23 kontraŭ, 19 sindetenoj. La meksikia rezolucio, do, estis rifuzita.

En tiu komento kaj diskutado ni venis al ideo, ke oni devus almenaŭ protesti en la gazetoj. ...

Mardon, la 7-an, mi kun granda ĝojo konstatis, ke la grava matena gazeto *El Pais* alportis preskaŭ la kompletan tekston de la Deklaracio de la Urugvaja Societo. ... Mardon, la tutan tagon mi estis terure ekscitita, iris al Unesko por vidi la efikon, sed rimarkis nenion specialan: mi plu estis ignorata. Ŝajnas, ke la artikolo de *El Pais*

ankoraŭ ne atingis la delegitojn, nek la Sekretariaton. ... La saman tagon posttagmeze la granda gazeto *El Debate* alportis la kompletan tekston de la Deklaracio, sed ne en formo de Deklaracio de la Urugvaja Societo. Ĝi tion faris en la propra nomo, do sen la subskribo de Fernandez kaj Cao. Tio estis bonega. La publika opinio komencis esti por ni en tiu ĉi afero (mi menciis, ke lundon ĉiuj gazetoj alportis la informon pri la malvenko kaj Unesko donis la informon al ĉiuj presagentejoj).

Malfrue en la nokto mi venis en mian ĉambbron, legis kaj relegis la artikolojn, cerbumis kaj, kiel leono en kaĝo, senpove promenis laŭlonge kaj laŭlarĝe. Ĉ. la 3-a matene la ideo maturiĝis: mi skribos protestan leteron al la Prezidanto de la Konferenco kun kopioj al la Ĝenerala Direktoro kaj al la Prezidanto de la Plenumkomitato.

La afero fariĝis bombo. Ni montris la detojn. Ni montris, ke oni ne povas nur tiel trakti nian Movadon...

Delegitoj, unu post la alia, venadis al mi por konsenti, ke la sabata kunveno ne estis serioza kaj por esprimi sian bedaŭron.

Tiam subite mi decidiĝis – por fari pli da premo – postuli la parolon en la Pleno de la Konferenco vendredon matene.

Kia estis mia konsterniĝo, kiam Evans diris, ke li opinias min prava, kaj kiel batis mia koro en tiu momento, mi ne povas diri al vi.

En tiu kunveno la Pleno unue konfirmis la elekton de la membroj de diversaj komitatoj. ... La Prezidanto Zavala Muniz (poste) anoncis: "Ni transiras al la sekvanta punkto de la tagordo: la Internacia Peticio favore al Esperanto. La parolon havas la delegito de Meksikio".

Sinjoro Vallarta aliris la tribunon kaj komencis paroli. En la salonego estis bruego... Multaj delegitoj tute ne havis la aŭskultilojn, sen kiuj estas maleble ion ajn

aŭdi... En tia agordo la meksikia delegito parolis proksimume dum tri minutoj. Bone, sed ne aŭskultata. Mi leviĝis kaj signis per la mano, ke li ĉesu. Mi timegis, ke jeno, denove, pro ekstera incidento la afero malsukcesos. En tiu momento la prezidanto sonorigis ĉiujn sonorilojn. La parolanto feliĉe ĉesis paroli. La silento estis restarigita. La delegitoj metis la aŭskultilojn. Zavala Muniz flustris al Vallarta (kion oni bone povis aŭdi en tiuj perfidaj aŭskultiloj) "Rekomencu", kaj li fakte rekomencis: "Señor Prezidente...". Post li, sinjoro Bourgeois diris, ke fakte la voĉdono okazinta la pasintan sabaton okazis en tia atmosfero, ke li opinias necesa la revoĉdonon en la Pleno. Li aldonis, ke Svislando subtenos la projekton de Meksikio, kaj ke li proponas, ke oni pri ĝi voĉdonu sendiskute, ĉar ĉiuj delegacioj havas klaran bildon pri la afero surbaze de la dokumentoj.

La Prezidanto voĉdonigis la Rezolucion kun tiu eta amendo brita, kiun Meksikio kaj Svislando akceptis. "Kiu estas por?" – demandis la Prezidanto. Tridek manoj leviĝis. Mi nombris ilin, sed ne povis noti ĉiujn landojn de la por-voĉdonintoj. ... Mi sentis la gambojn paralizitaj. Mia korpo algluiĝis al la seĝo. En la salonego la decido estis salutita per forta aplaŭdo, apogata precipe de la galerioj. Homoj leviĝadis de sur siaj seĝoj kaj venadis al mi por gratuli...

Estis la 17.30 h., vendredon, la 10-an de decembro, kiam okazis tiu historia momento ne nur por nia Movado, sed ankaŭ por la kulturo de la mondo. Unesko oficiale rekonis la valoron de Esperanto por la scienco, edukado kaj kulturo. La sama konferenco, kiu nur antaŭ 6 tagoj moke priridis la lingvon kaj neis ĝian kulturan valoron, nun en la plej solena kunsido, en maniero la plej digna nuligis sian propran antaŭan decidon.

90-JARIĜO DE LA FERVOJISTA ESPERANTO-MOVADO EN ZAGREBO KAJ KROATIO

Zlatko Hinšt

La 15-an de decembro 2014 en la malgranda salono de Kroatia ekonomia ĉambro en Zagrebo, organizita de Unuiĝo de zagrebaj esperantistoj (UZE), okazis solenaĵo honore al Zamenhofa tago. Unu el la programeroj estis la prelego titolita "90-jariĝo de la fervojista Esperanto-movado en Zagrebo kaj Kroatio" de Zlatko Hinšt el Kroata Fervojista Esperanto-Asocio (KFEA).

En ĉi-tiu prelego mi volas prezenti tri elstarajn esperantistojn, kiuj almenaŭ unu parton de sia vivo pasigis en Kroatio. La prelego estas preparita okaze de la 90-jariĝo de la fervojista Esperanto-movado en Zagrebo kaj Kroatio. Ĝi rilatas al la internacia kaj enlanda Esperanto-movadoj inter fervojistoj kaj iliaj organizaĵoj: la Internacia Asocio de la Esperantistaj Fervojistoj (IAEF), kiu en la jaro 1924 translokiĝis al Zagrebo, la Klubo de Esperantistaj Fervojistoj kaj la Fervojista Esperanto-Societo (FES), kiu fondiĝis en Zagreb en la jaro 1954. Plejparte ĉiujn menciitajn eventojn oni dankas al la agado de la tri "kolonoj", la plej aktivaj fervojistoj esperantistoj: **Ilija Puhalo**, **Stevan Stojnić** kaj **Josip Zupanić**, kaj al eldonado de la gazetoj "La Fervojisto" kaj "Jugoslavia fervojisto".

La menciitaj estis aktivaĵoj de la Internacia Asocio de la Esperantistaj Fervojistoj (IAEF), kies sidejo de 1924 ĝis la 1930-aj jaroj troviĝis en Zagrebo.



En la komenco okazis konfliktoj en la tiama internacia fervojista organizaĵo pro la decido translokiĝi al Zagrebo. En 1924 aperis la unua numero de la oficiala organo de IAEF "La Fervojisto", kiun sekvis aliaj numeroj ĝis la jaro 1930.

Jam en 1925 fondiĝis la unua Klubo de Esperantistaj Fervojistoj en Zagrebo (Kroatio) kaj samnoma fervojista klubo en 1926 en Beogrado (Serbio). Sed kelkajn jarojn poste, tiuj kluboj ĉesis funkcii. Pasis tri jardekoj ĝis la fondiĝo de Fervojista Esperanto-Societo (FES) en Zagrebo (1954), kiu funkcias ankaŭ nuntempe sub la nomo Kroata Fervojista Esperanto-Asoco (KFEA).

Ilija Puhalo naskiĝis la 13-an de marto 1899 kaj mortis la 20-an de junio 1937 en Koprivnički

Sabaton matene ĉiuj gazetoj alportis la novaĵon. La gazeto *La Tribuna Populara* de la 11-a de decembro alportis ĝin sub la titolo "Triunfo del Esperanto". Estis, fakte, vera triumfo.

La 10-an de decembro

Kun tremantaj manoj kaj malsekaj okuloj mi skribas al vi

tiun ĉi leteron. Antaŭ duono de horo mi sendis telegramon pri la belega novaĵo atingita en la lasta duonhoru de la Konferenco. Estas por mi absolute maleble priskribi kion mi faris en la lastaj 5 tagoj, nome de lundo ĝis la nuna momento. Mi nur diru, ke dum tiuj 5 tagoj mi – jam lacega de pli frue – ne dormis entute pli ol 18-20 horojn, trinkis centon da kafoj kaj fumis ĉ. 1000

cigaredojn. Mi estas plene, sed vere plene elĉerpita kaj verki kion ajn en la nuna stato estas absolute maleble. Tial mi donas nur la rezulton: je la 17.30 la Pleno de la Konferenco, en ĉeesto de ĉiuj delegacioj kaj kun plenŝtopitaj galerioj, akceptis per 30 voĉoj por, 5 kontraŭ kaj 17 sindetenoj (la aliaj ne voĉdonis) jenan Rezolucion "...





Ilija Puhalo

Bregi, vilaĝo apud urbeto Koprivnica, kiu estas centro de la regiono Podravino. Puhalo estis vicprezidanto de Internacia Asocio de la Esperantistaj Fervojistoj (IAEF), kies sidejo estis en Zagreb. Tiam li laboris kiel fervoja oficisto en la zagreba laborunuo por trajtrakcio – lokomotivejo ("hejtejo") en Strojarska cesta. Inter la jaroj 1924 kaj 1930 li eldonis kaj redaktis la fakrevuon "La Fervojisto" (en 1923 ĝi aperis unue en Ĉeĥio en Olomouc, redaktata de Josef Rebiček). Ekde 1924 li estis prezidanto de Esperanto-klubo Koprivnički Bregi kaj kursgvidanto. En la jaro 1925 li estis kunfondinto kaj estrarano de la unua fervojista Esperanto-societo fondita en Zagreb. Inter la jaroj 1924 kaj 1928 li estis landa sekretario de Universala Esperanto-Asocio por Reĝlando de Serboj, Kroatoj kaj Slovenoj – Jugoslavio.

Stevan Stojnić naskiĝis en la jaro, kiam aperis Esperanto (1887), kaj mortis en 1963 en Beogrado. Stojnić estis prezidanto de Internacia Asocio de la Esperantistaj Fervojistoj (IAEF) kaj kunlaboris kun Ilija Puhalo en la



Stevan Stojnić

fakrevuo "La Fervojisto" (precipe pri fakaj terminoj). Li vivis en Novi Sad, Sarajevo, Beogrado (kie li laboris kiel fervojisto kaj konsilanto de Ĉefa fervoja direkcio), Vršac en Serbio kaj Pula en Kroatio (kie li estis prezidanto de Esperanto-Societo "La Adriatika Stelo"). Li estis aktiva kunlaboranto de "La Suda Stelo" kaj "Jugoslavia Fervojisto". En 1957 li estis unu el la organizantoj de Internacia Fervojista Kongreso en Rijeka. Lia grava merito estas lernolibro de Esperanto (aperinta unue en 36 kajeretoj) kaj apliko de mnemoniko (mnemotekniko) dum Esperanto-kursoj.

Josip Zupanić naskiĝis en 1896 en Lupoglav (Istrio) kaj mortis en 1990 en Zagreb. Li estis kunfondinto kaj la plej elstara membro de Fervojista Esperanto-Societo (FES) en Zagreb (1954), ĝia vicprezidanto de 1972 ĝis 1981, multjara redaktoro de "Jugoslavia Fervojisto", la oficiala organo de FES en Zagreb kaj ekde la kvara numero (1956) de la tiamia Jugoslavia Asocio de la Fervojistaj Esperantistoj (JAFE). Li tradukis fervojajn regularojn kaj

kunverkis kun Ludoviko Sekereš "Fervojan Terminareton". Inter la du mondmilitoj li estis aktivulo de la iama IAEF kiel ĝia asesoro por tiamia Reĝlando de Serboj, Kroatoj kaj Slovenoj (Jugoslavio). Li laboris kiel fervoja oficisto en Slovenio, Beogrado kaj Zagreb (de 1941 ĝis 1990). Zupanić tre fervore agadis en la periodo inter la du mondmilitoj kaj post la dua mondmilito en la enlanda kaj internacia fervojistaj Esperanto-movadoj. En 1971, dum la IFEF-kongreso en Maribor, li ricevis Arĝentan medalon de Internacia Fervojista Federacio por kulturaj kaj libertempaj aktivecoj (FISAC), pro la laboro kaj meritoj en la fervojista Esperanto-movado. Okaze de sia 90-a naskiĝdatreveno, li fariĝis honora membro de Internacia Fervojista Esperanto-Federacio (IFEF).

LITERATURO

- Josip Pleadin: *Biografia leksikono de kroataj esperantistoj*, Grafokom, Durdevac, 2002.
- *Niaj Kvindek Jaroj 1954 – 2004*, Kroata Fervojista-Asocio, Zagreb, 2004.
- Informoj el biografioj kaj fotoj el Interneto (Vikipedio), inkluzive Ipernitaj paĝojn de Dokumenta Esperanto-Centro Durdevac.
- *Kongresa libro de la 9-a Internacia Fervojista Esperanto-Kongreso* Rijeka (Jugoslavio), 1957.
- *Internacia Fervojista Esperanto-Federacio - Historio 1909-1984, Historia Retrorigardo*, eldonita en 1984 okaze de la 75-jara jubileo de la fervojista Esperanto-Movado



RAPORTO PRI LA LITERATURA KONKURSO "IVO ROTKVIĆ 2014"

En decembro 2013, okaze de la Zamenhoftaga festo en Zagrebo, Unuiĝo de zagrebaj esperantistoj anoncis renovigon de la Literatura konkurso "Ivo Rotkvić", kies tasko estus daŭrigi la tradiciojn de la antaŭa samnoma konkurso de Zagreba Esperanto-Ligo. Literaturemaj esperantistoj estis invititaj sendi siajn konkursaĵojn en kvar branĉoj:

- 1) originala poezio
- 2) originala prozo
- 3) tradukoj el la kroata
- 4) tradukoj el aliaj lingvoj

Ĝis la 31-a de oktobro 2014, kiu estis la limdato de la konkurso, alvenis entute 32 verkoj, el kiuj 23 en la branĉo de originala poezio, 7 en la branĉo de originala

prozo, 2 en la branĉo de tradukoj el aliaj lingvoj, dum en la branĉo "tradukoj el la kroata" venis neniu konkursaĵo.

La Estraro de UZE elektis la trimembran konkursan ĵurion, kiu konsistis el **Zdravko Seleš** (prezidanto), **Jozo Marević** kaj **Zlatko Hinšt** (membroj). La konkursa ĵurio tralegis la alvenintajn konkursaĵojn, markitajn per pseŭdonimoj, kaj decidis, ke:

En la branĉo "**Originala poezio**", la plej bonaj konkursaĵoj estas:

1. "Sed kial, avinjo?" de **Emilija Obradović** (Kroatio)
2. "Mia avo" de **Suso Moinhos** (Hispanio)
3. "Almonte" de **Suso Moinhos** (Hispanio)

En la branĉo "**Originala prozo**", la plej bonaj konkursaĵoj estas:

1. "La akordiono" de **Georgi Mihalkov** (Bulgario)
2. "La petveturantino" de **Ewa Grochowska** (Francio)
3. "Savo" de **Pascal Vilain** (Francio)

En la branĉo "**Tradukoj el aliaj lingvoj**", la plej bonaj konkursaĵoj estas:

1. Sara Teasdale: Venos molpluvoj – tradukita de **Timo Pähler** (Germanio)
2. Eudore Evanturel: Malpezigo – tradukita de **Stéphane Brault** (Francio)

La tria premio ne estas aljuĝita.

En la branĉo "**Tradukoj el la kroata**" la premioj ne estas aljuĝitaj pro manko de konkursaĵoj.

Ĉiuj laŭreatoj ricevis diplomojn kaj libropremiojn, kaj la premiitaj verkoj aperas en ĉi tiu numero de "Zagreba Esperantisto".

PREMIO "DEGENIO VELEBITA" ATRIBUITA AL DAVOR GRGAT

La pasintan decembron Unuiĝo de zagrebaj esperantistoj establis la ĵurnalistan premion "**Degenio velebita**", por la plej bona kunlaboranto de sia gazeto "Zagreba Esperantisto". La premio estas principe nur honora, kaj konsistas el respektiva diploma.

Diskutinte por la unua fojo pri la kandidatoj, la redakcio de la gazeto "Zagreba esperantisto" decidis la ĉi-jaran diplomon atribui al **s-ro DAVOR GRGAT el Spit**.

S-ro Davor Grgat naskiĝis en 1935. Esperantisto li fariĝis en 1954, do ĉi-jare li festas la 60-jariĝon de sia esperantisteco. Li estas

multflanka esperantista aktivulo, sed aparte aktivas kiel ĵurnalistamatoro. En la loka taggazeto "Slobodna Dalmacija" en Split, dum 40 jaroj li aperigis centojn da artikoloj pri Esperanto, informante pri niaj aranĝoj kaj eventoj. Li estas unu el malmultaj membroj de TEĴA en Kroatio, kaj dum la 70-a UK en Augsburg, li estis elektita ankaŭ estrarano de TEĴA. Li kunlaboris en "Internacia ĵurnalistoj", sed ankaŭ en multaj aliaj Esperanto-gazetoj, ekz.: "La suda stelo", "Jugoslavia esperantisto", "La Progreso", "Jugoslavia Stelo", "Tempo", "Monato", "Esperanto Revuo" kaj

aliaj. Li partoprenis la historian 1-an kongreson de esperantistoj-ĵurnalistoj en Vilnius (Litovio). Kiel esperantista ĵurnalistoj li estas menciita ankaŭ en la ampleksega ĵurnalista leksikono aperinta kroatlingve en 2002 en Split. Ekde la komenco de aperado de "Zagreba Esperantisto" li apartenas al plejado de ĝiaj kunlaborantoj.

La decidon pri la atribuo de la Premio "Degenio velebita" al s-ro Davor Grgat, UZE publikigos en sia oficiala gazeto, en sia retejo kaj diskonigos en la naciaj kaj internaciaj informmedioj.



Literatura konkurso "Ivo Rotkvić"

Unuiĝo de Zagrebaj Esperantistoj (UZE), konforme al sia laborprogramo, en 2014 renovigis la *Literaturan konkurson "Ivo Rotkvić"*, lanĉitan de la iama *Zagreba Esperanto-Ligo*, kun la celo stimuli ĉiaspecan literaturan kreadon en Esperanto, malkovri literaturajn talentulojn kaj konigi iliajn verkojn en Esperantujo per premiado kaj publikigo en "Zagreba Esperantisto" aŭ libroforme.

UZE anoncis ĉi tiun konkurson okaze de *Zamenhofa tago*, kiu dekomence estis konsiderata *Tago de Esperanta libro*.

UZE invitas ĉiujn literaturemulojn de Esperantujo partopreni en 2015 en la jenaj konkursaj branĉoj:

1) *Originala prozo*. (inkluzive de teatraĵoj). Maksimuma longo de konkursaĵoj nefiksita, sed preferataj mallongaj prozaĵoj.

2) *Originala poezio*. Maksimuma longo nefiksita, sed preferataj mallongaj poeziaj formoj.

3) *Tradukaĵoj el la kroata*. Maksimuma longo nefiksita, sed preferataj mallongaj prozaĵoj aŭ poeziaĵoj de aŭtoroj mortintaj antaŭ pli ol 70

jaroj aŭ de tiuj kiuj donis skriban permeson traduki kaj senpaga publikigi iliajn verkojn.

3) *Tradukaĵoj el aliaj lingvoj*. Maksimuma longo nefiksita, sed preferataj mallongaj prozaĵoj aŭ poeziaĵoj de aŭtoroj mortintaj antaŭ pli ol 70 jaroj aŭ de tiuj kiuj donis skriban permeson traduki kaj senpaga publikigi iliajn verkojn.

Konkursi povas nur la ĝis nun nepublikigitaj verkoj, aŭ la verkoj kiuj aperis en interreto. Ĉiu konkursaĵo estu aparta *word* aŭ *pdf*-dokumento, subskribita per pseŭdonimo kaj alkröĉita al la retmesaĝo, en kiu estu skribita la vera nomo de la aŭtoro/tradukinto kaj lia/ŝia retadreso. UZE elektos la ĵurion kiu prijuĝos la ricevitaĵojn konkursaĵojn. Laŭreatoj estos premiitaj per diplomoj kaj libropremioj. UZE retenos dum unu jaro la ekskluzivan rajton publikigi ĉiujn premiitajn (kaj nepremiitajn) konkursaĵojn en "Zagreba Esperantisto" aŭ en apartaj libretoj.

Konkursajojn oni sendu antaŭ la 30-a de oktobro 2015 rete al zagreba.esperantisto@gmail.com.

Unuiĝo de Zagrebaj Esperantistoj
establis la premion

Premio "Degenio velebita"

Degenio velebita (lat. *Degenia velebitica*) estas floro, unu el la plej maloftaj endemiaj specioj en Kroatio, severe protektita, simbolo de la plej alta kroata montaro *Velebit*. Ĝi troviĝas sur la reverso de la 50-lipaa monero.

La Premion "Degenio velebita" establis UZE kiel ĉiaspecan ĵurnalistan premion por kunlaborantoj de "Zagreba Esperantisto" kaj la portalo www.zagreba-esperantisto.hr.

La Premion "Degenio velebita" ĉiujare atribuas la redakcio de "Zagreba Esperantisto" al la plej aktiva artikol-verkanto en difinita unujara periodo. La Premio estos aljuĝata laŭ la kvanto kaj kvalito de aperintaj artikoloj, kaj proklamata okaze de Zamenhofa tago. La unuan fojon ĝi estis proklamita en decembro 2014.

Partopreni en la konkurado en 2015 povas ĉiuj legantoj, kunlaborantoj kaj membroj de la redakcio, escepte de la ĉefa redaktoro kaj la plenumredaktoro. Ankaŭ la legantoj povas sendi siajn proponojn por la plej bona kunlaboranto.

La Premio estas honora, kaj konsistas el respektiva diplomo. Laŭ eventuala decido de la redakcio, la Premio povas konsisti ankaŭ el materia aŭ mona rekompenco.



MODELA KAJ SUKCESA REGIONA AGADO



Laŭ "Bjelovara folio" 4/2014

Berislav Rubčić, József Németh, Josip Pleđin

“ESPERANTISTOJ DE BJELOVAR AL SIA URBO”

Bjelovaraj esperantistoj ankaŭ ĉi-jare (jam la duan fojon) partoprenis en la festado de Tago de la urbo per sia aranĝo "Esperantistoj de Bjelovar al sia urbo", kiu daŭris tri tagojn: de la 20-a ĝis la 22-a de septembro. Kiel konfirmo de seriozeco kaj kvalito de la aranĝo, ĉi-jare la ekspozicio de la hungara pentristino-esperantistino **Orsolya Ombódi** estis menciita ankaŭ sur la oficiala afiŝo de la bjelovaraj eventoj.

Sabaton, la 20-an de septembro la esperantistoj metis florkronon sur la tombon de bjelovara poeto kaj esperantisto **Željko Sabol**, kaj la reston de la tago, kune kun siaj hungaraj gastoj, ili pasigis en la festivalo de minoritatoj en Končanica.

Dimanĉe, la 21-an de septembro, kiu estis la ĉefa tago

de la aranĝo, kolektiĝis pli ol cent partoprenantoj el diversaj lokoj de Kroatio, Hungario kaj unu Litovino (**Nijolė Petraitytė**) kiuj vizitis la ekspozicion "Nekonata Hungario", partoprenis prelegojn kaj deklamkonkurson, kaj amikumis en la Hotelo "Central".

Lundo, la 22-a de septembro, estis rezervita por la programo "La vivo kiel aventuro",

dediĉita al Tibor Sekelj, kaj okazinta en la Ekonomia kaj bureteknika lernejo de Bjelovar.

REMEMORO PRI ŽELJKO SABOL

Delegacio konsistanta el 9 membroj de Bjelovara Esperantista Societo, en posttagmezaj horoj de la



Esperantistoj sur la tombo de poeto kaj esperantisto Željko Sabol



20-a de septembro, metis florkronon sur la tombon de bjelovara poeto kaj esperantisto **Željko Sabol** (1941-1991), en la urba tombejo de sankta Andreo. La lokaj esperantistoj regule faras tion okaze de la aranĝo "Esperantistoj de Bjelovar al sia urbo".

MINORITATA FESTIVALO EN KONČANICA

Dank' al kunlaboro inter esperantistoj kaj la Hungara unuiĝo en la Departemento Bjelovar-Bilogora, establita helpe de **Šandor Toth**, prezidanto de la Hungara unuiĝo, la partoprenantoj de la aranĝo "Esperantistoj de Bjelovar al sia urbo", kiuj atingis Bjelovaron jam sabate (la 20-an de septembro), havis la eblecon viziti la 1-an festivalon de minoritata kreado, okazinta en la vilaĝo Končanica. En multkultura kaj multnacia Daprtemento Bjelovar-Bilogora vivas dudeko da minoritatoj. En la riĉa folkloro programo de la unua festivalo prezentiĝis la ĉeĥa, hungara, serba, romaa kaj albana minoritatoj. Krom la folkloro, estis prezentitaj ankaŭ malnovaj tradiciaj manĝaĵoj. La kultura programo okazis en la loka sporthalo, kaj la festa programo en la socia domo, kie la gastigantoj regalis nin per abunda vespermanĝo, muziko kaj dancado ĝis malfruaj horoj. La festivalo estis belega prezento de la kunvivado de minoritatoj en la Departemento.

Bjelovaraj esperantistoj kaj iliaj gastoj el Hungario, vizitis la vilaĝon Končanica per "karavano" de 7 aŭtomobiloj.

Ni uzas ĉi tiuon okazon por danki al s-ro **Šandor Toth** pro la realigo de ĉi tiu kunlaboro kaj pro la afabla gastigado, kaj esperas daŭrigi ĝin ankaŭ estonte.



Malfermo de la ekspozicioj en la Popola biblioteko

PROGRAMOJ EN LA POPOLA BIBLIOTEKO

Pogramoj de la ĉi-jara aranĝo "Esperantistoj de Bjelovar al sia urbo" estis dediĉitaj ĉefe al la partnera lando Hungario, pro kio ne surprizas partopreno de esperantistoj el Pécs, Szeged, Tatabánya, Pápa kaj aliaj urboj.

La ĉefa programparto okazis en la Popola biblioteko "Petar Preradović" dimanĉe, la 21-an de septembro. Tie jam ekde la 12-a de septembro (ĝis la 13-a de oktobro) estis vizitebla ekspozicio "Nekonata Hungario". La urbajn aŭtoritatojn en la ekspozicio reprezentis

anataŭantino de la urbestro de Bjelovar s-ino **Lidija Novosel**, kaj parolis direktoro de la biblioteko s-ro **Marinko Ilinčić** kaj la prezidanto de Bjelovara esperantista societo **Franjo Forjan**. Aparte akcentita temo estis "Tuŝpunktoj de la kroata kaj hungara historioj", pri kio en sia prelego "Ok jarcentoj de la kroata kaj hungara kunvivado - personoj kaj eventoj", prelegis la prezidanto de UZE **Radenko Milošević**.

En la biblioteko okazis ankaŭ la tradicia deklamkonkurso por lernantoj de elementaj kaj mezaj lernejoj, kunorganizata de Bjelovara esperantista societo kaj Unuiĝo de prelegantoj de Esperanto el Zagrebo. La programon gvidis **Marija Jerković**, kaj kiel la plej bonaj



Parto de la tradukintoj de la libro "De Patagonio ĝis Alasko"

deklamantinoj estis proklamitaj **Katarina Sokač** el Đurđevac, **Dora Jambrošić** kaj **Lucija Oroz** el Zagreb kaj **Marija Halusek** el Virje. Ekster konkurenco la poemojn de **Željko Sabol** "Fingringo de mia morta patrino" tre impresive deklamis **Mihaela Cik** kaj "Cantata profana" de **Béla Bartók** **Judith Szücs** el Pápa.

En la literatura parto la vojaĝlibron "De Patagonio ĝis Alasko" de **Tibor Sekelj** prezentis profesoro **Zdravko Seleš** kaj la vidvino de la aŭtoro s-ino **Erzsébet Sekelj**. Parton el la 25 tradukantoj de tiu libro prezentis la eldonisto **Josip Pleadin**.

Post la programoj en la biblioteko, favorataj de la belega kaj varma tago, la **Berislav Rubčić** faris komunan foton de la partoprenantoj ĉe la pavilono en la urba parko.

PENTRAĴ- EKSPOZICIO DE ORSOLYA OMBÓDI

Post la komuna fotado, ĉiuj iris al la Kafejo kaj dolĉaĵejo "Zagorje", kie **Franjo Forjan** kaj **Josip Pleadin** oficiale malfermis pentraĵekspozicion de la hungara pentristino kaj esperantistino **Orsolya Ombódi** el Tatábanya. La malfermon ĉeestis, kaj al la esperantistoj pro la vizito dankis la posedanto de la galerieto s-ro **Božidar Zagorac**, konata kiel ŝatanto de pentroarto. Li regalis nin per trinkaĵoj kaj dolĉaĵoj, kaj transprenis donace unu pentraĵon por sia kolekto.

La konatiĝon kun la pentraĵoj de **Orsolya Ombódi** ni devas aparte danki al du **Jozefoj** el Hungario (**Baksa** kaj **Németh**), kiuj dediĉis multe da organiza laboro, kaj aparte al la pentristino mem kaj ŝia filo, kiuj transportis la eksponaĵojn al Bjelovar per propra aŭtomobilo.



S-ro Božidar Zagorac salutas la esperantistoj dum la malfermo de la ekspozicio en sia galerieto.

La ekspozicio restis malfermita ĝis la 6-a de novembro.

la eksponaĵojn al Bjelovar per propra aŭtomobilo. La ekspozicio restis malfermita ĝis la 6-a de novembro.

aranĝo promene atingis la Hotelon "Central", kie estis organizita komuna tagmanĝo kaj plurhora amikumado, dum kiu **Andrija Maronić** el Đurđevac amuzis la esperantistojn per zimbazona muziko, prezentante hungarajn kantojn.

Dum la programo estis proklamita la ĵuria decido de la 2-a deklamkonkurso (**Radenko Milošević**, **Grozdana Grubišić-Popović** kaj **Mihaela Cik**). La plej bona deklamantino ricevis pokalon, kaj la ceteraj laŭreatoj medalojn. Ĉiuj deklamantoj ricevis diplomojn

PROGRAMOJ EN LA HOTELO "CENTRAL"

El la Kafejo kaj dolĉaĵejo "Zagorje", la partoprenantoj de la



Laŭreato en la Deklamkonkurso Katarina Sokač transprenas sian premion el la manoj de Franjo Forjan

kaj libropremiojn. Nome de la organizantoj la laŭreatojn proklamis **Marija Jerković** kaj la premiojn disdonis **Franjo Forjan**.

Novan kaj ankoraŭ pli plaĉan programon prezentis **Silvija Fostaĉ** kaj ŝiaj lernantoj el Zagrebo, kiuj jam de antaŭe konatas al la publiko kiel "**Gajuletoj**".

Ne malgrandan intereson vekis la libro "La triĝiba monto" de la sikula verkisto **Ferenc Szemlér** el la rumania Transilvanio, kiun Esperantigis **Lenke Szász** kaj eldonis "Grafokom" el Đurđevac. La verko priskribas eventojn en Mošćenička Draga en Kroatio, sojle de la Unua mondmilito, kaj prezentis ĝin la eldonisto **Josip Pleadin**, dum ĉapitron el la libro legis profesoro **Zdravko Seleš**.

Multaj novaj ideoj naskiĝis dum ĉi tiu aranĝo, sed pri ili vi legos alifoje.

LA VIVO KIEL AVENTURO

"En la regiono, kie finiĝas la ŝoseoj, vojoj, vojetoj izolaj; kie la parolo mortas, cedante lokon al la susuro mistera de praarbaroj kaj tero virga; kie ĉiuj horizontoj malaperadas, sen eblo, por iu ajn, ekscii kial kaj kiel; jen tie estas la limoj de la lando, en kiu mi sentas min kontenta. Nomiĝas ĝi la AVENTURO". Tiel en sia libro "Tra Lando de Indianoj" skribis **Tibor Sekelj**, kaj tiu citaĵo donis la nomon al la programo "La vivo kiel aventuro", per kiu la 22-an de septembro estis omaĝita la granda verkisto kaj vojaĝanto. La programon kunorganizis Ekonomia kaj buroteknika lernejo de Bjelovar kaj Bjelovara esperantista societo, dum la librojn de **Tibor Sekelj** por la porokaza ekspozicieto pruntis Dokumenta Esperanto-Centro el Đurđevac. La programo okazis en la belega lerneja biblioteko, kaj partoprenis ĝin ankaŭ s-ino **Erzsébet Sekelj**, la vidvino de la aŭtoro, kiu



S-ro Vojislav Kranželić, la lernejestro (supre), per sia parolado enkondukas la publikon (malsupre) en la programon "La vivo kiel aventuro"



parolis pri "Kelkaj rigardoj al la vivo de Tibor Sekelj". Kialo por la menciita programo estis prezento de la libro "De Patagonio ĝis Alasko", en kies tradukdo partoprenis ses bjelovaraj esperantistoj, kiuj kolektiĝis ankaŭ en la lerneja biblioteko. En la inspira programo, realigita de la esperantistino prof. **Radmila Radić-Parlov** kaj gvidita de la lerneja direktoro prof. **Vojislav Kranželić** (mem esperantisto), ĉapitron el la poemo "Mi vizitas mian farmon" de **Tibor Sekelj** en Esperanto recitis la esperantistino prof. **Dunja Šverko** kaj en la kroata lernanto **Mateo Jukić**. Pri

la libro "De Patagonio ĝis Alasko" parolis la eldonsito **Josip Pleadin**, kaj interesajn pensojn de Tibor legis la lernantoj **Martina Malčić** kaj **Mateo Jukić**. La komputilan projekcion de fotoj pri la vojaĝoj de Tibor pretigis prof. **Radmila Radić-Parlov**. La aranĝon fotis prof. **Blaženka Urh** kaj filmis **Enad Margetić**, kaj demandojn al s-ino **Sekelj** starigis pluraj ĉeestantoj. S-ino **Sekelj** donacis al la lerneja biblioteko kelkajn ekzemplerojn de la serblingva eldono de "Kumeŭaŭa, la filo de la ĝangalo", kaj la aranĝo finiĝis per agrabla babilado de la ĉeestintoj.

Unuiĝo de Zagrebaj Esperantistoj

Literatura Konkurso "Ivo Rotkvić" 2014

1-a premio
en la kategorio
ORIGINALA POEZIO

Emilija Obradović
(Kroatio)
por
"Sed kial, avinjo?"



SED KIAL, AVINJO?

Jen, Nino,
nebuloj sur la ĉielo
kuregas, rapidegas!

Sed kial, avinjo?

Por ke ili
pli rapide
al sia celo alvenu.

Sed kial?

Por ke la ĉielo
iĝu densa kaj griza
pro la nebuloj vagabondoj!

Sed kial?

Por ke pluvo
falu
sur la teron soifantan
kaj abunde ĝin surverŝu.

Sed kial, avinjo?

Por ke Nino, dujarulo
en la herbo
verda, freŝa, mola, rosa
ĝoje ĝin piedpremu!

Emilija Obradović naskiĝis en 1936 en Stolac, Bosnio kaj Hercegovino. Pensiita profesoro de pedagogio kaj psikologio (diplomiĝinta en Sarajevo). Esperantistino ŝi fariĝis en 1953 en la Porinstruista lernejo en Slavonski Brod (Kroatio). Ŝi organizadis Esperanto-kursojn por plenkreskuloj kaj infanoj. Nuntempe ŝi vivas en Nova Gradiška (Kroatio) kaj, interalie, tradukas kaj verkas en Esperanto.

Suso Moinhos (Jesus Moinhos Pardavila) naskiĝis en 1970 en Vigo, Galegio, nordokcidenta Hispanio. Li lernis Esperanton en 1986 per koresponda kurso. En la Universitato de Santiago de Compostela li studis Galegan Filologion, kaj tie li instruis Esperanton dum du jaroj en la Instituto pri Lingvoj. Li studis ankaŭ en Lisbono, kie li ofte ĉeestis la kunvenojn de Portugala Esperanto-Asocio. Poste li estis Esperanto-instruisto en Vigo, ĉe privataj lingvolernejoj. En 2013 li instruis Esperanton dum kvar monatoj en Mazara del Vallo, Sicilio. Nuntempe li okupiĝas pri la redaktado de la literaturaj temoj de la ret-kurso por E-instruistoj RITE, de Katalin Kováts. Al la revuo Beletra Almanako li kontribuas per originaloj kaj tradukoj. En 2014 li unuafoje partoprenis la Belartajn

Unuiĝo de Zagrebaj Esperantistoj

Literatura Konkurso "Ivo Rotkvić" 2014

2-a premio
en la kategorio
ORIGINALA POEZIO

Suso Moinhos
(Hispanio)
por
"Mia avo"

Unuiĝo de Zagrebaj Esperantistoj

Literatura Konkurso "Ivo Rotkvić" 2014

3-a premio
en la kategorio
ORIGINALA POEZIO

Suso Moinhos
(Hispanio)
por
"Almonte"



Konkursojn de UEA, en la branĉo poezio, kaj ricevis la unuan premion. En septembro 2014 li komencis la postgradajn Interlingvistikajn Studojn ĉe la Universitato Adam Mikiewicz en Poznano, Pollando.

MIA AVO

Mia avo estis maristo.
 En l'okuloj li distilis bluan
 kaj matenobrumon el sep maroj trairitaj.
 Mi lin banis kaj parkere legis
 lian fabelplanan haŭtolibron:
 jen la pafotruoj
 kaj tra ŝaŭmbobeloj, ombrozaj tatuoj.
 Li bravegis oceane
 sed surtere vinodronis kaj alvenis al ni rampa,
 post ŝiprompo,
 ungotrene sur kahelostrando
 sub ĉiel' el frakasitaj birdoj.
 Forsavon li petis
 kapleve, per algoplana buŝo.
 Helpoŝnuron mi alĵetus,
 sed ne havis.

Georgi Mihalkov (verkanta sub la pseŭdonimo **Julian Modest**) naskiĝis la 21-an de majo 1952 en Sofio, Bulgario. En 1977 li finis bulgaran filologion en Sofia Universitato "Sankta Kliment Ohridski", kie en 1973 li komencis lerni Esperanton. Jam dum la studado li aperigis Esperantajn artikolojn kaj poemojn en la revuo "Bulgara Esperantisto". En 1977 li akiris diplomon pri instruado de Esperanto en gimnazioj, superaj lernejoj kaj universitatoj. De 1977 ĝis 1985 li loĝis en Budapeŝto, kie li estis aktiva kunlaboranto de la revuoj "Hungara Vivo", "Budapeŝta Informilo", "Literatura Foiro", "Fonto", "Monato" kaj aliaj. Tie aperis liaj unuaj Esperantaj noveloj, recenzoj kaj artikoloj. Li estas aŭtoro de la Esperantaj libroj: "Ni vivos!" – dokumenta dramo pri Lidia Zamenhof, "La Ora Pozidono" – romano. "Maja pluvo" – romano, "D-ro Braun vivas en ni", "Mistera lumo" – novelaro, "Beletraj eseoj" – esearo, "Songe vagi" – novelaro, "Invento de l'jarcento" – komedioj, "Literaturaj konfesoj" – esearo, "La fermata konkono" – novelaro, "Mara Stelo" – novelaro kaj aliaj bulgarlingvaj libroj. De 1999 li estas ĉefredaktoro de la revuo "Bulgara Esperantisto".

ALMONTE

Almonte kuras mia sango,
 almonte
 por vin trovi ie sur la tero,
 en kverko, en kratago, en betulo,
 kaj viajn karesojn
 ĉifone pendantajn el la branĉoj
 en anguloj disaj.

Almonte, ĉiam almonte,
 supren, alten ĝis mi spertas
 sur la polmoj kreskantajn leontodojn
 kaj la odoron de viaj pulmoj-
 ĝi sufokas viajn bovajn okulojn
 aŭtuneske.

Mi hastu, ĉar la vento min avertas
 per likenoj, per musko, per korodo.
 Jam sur la ventro mi sentas hederajn,
 jam la proksimon de l' hakista klingo.



LA AKORDIONO

Pluvis. La pluvo estis forta kaj torenta. Kalojan delonge ne vidis tian pluvon. La ĉielo grizis kiel tanko-kirasoj kaj estis kvazaŭ falanta krake post minuto sur la urbon. Subitaj fulmoj eklumegis kaj aŭdeblis surdigaĵoj tondroj.

Kalojan ŝoforis malrapide, silentis, sed li estis streĉita kaj kolera al sia patro. „Kien ni iras en tiu damna pluvo?” – li diris al si. – „La aŭto paneos kaj mi ne povos daŭrigi veturadon. Kial ĝuste nun paĉjo decidis, ke ni devas ekvojaĝi kaj kion li bezonas?”

Tamen Kalojan devis konfesi al si, ke jam de kelkaj tagoj la patro petis veturigi lin al iu homo, kun kiu li volas renkontiĝi. Kalojan prokrastis kaj ĉiam elpensis novajn kaŭzojn por ne plenumi la patran peton. Foje li diris, ke li havas urĝan laboron. Poste, ke

li devas veturigi Ivan, sian edzinon, al kuracisto. La trian fojon li intencis diri, ke kun Svetla, ilia filino, li devas iri ien, sed antaŭ ol ekparoli, rimarkis, ke la rigardo de la patro malheliĝis kaj Kalojan tuj komprenis, ke la patro ofendiĝos kaj poste ne interparolos longe kun li. Kalojan tre bone sciis, ke en la vortoj de la patro estos riproĉo kaj ĉagreno. Tre mallaŭte la patro diros: „Kalojan, nur foje mi petis vin helpi kaj vi ne helpis min.” Poste la patro eksilentos kaj en liaj malhelaj okuloj estos bedaŭro kaj doloro. Tial hodiaŭ Kalojan diris, ke li havas nenion por fari kaj ili povas veturi tien, kien la patro deziras.

– Paĉjo, nun ni povas ekiri.

La patro ekĝojis, liaj okuloj brilis kaj li komencis rapide surmeti pli novan kostumon.

Kiam ili sidiĝis en la aŭton, Kalojan demandis:

– Kien ni iros?

– En gazeto mi tralegis anoncon kaj mi deziras vidi, pri kio temas – respondis la patro.

– Tamen diru, en kiu direkto ni veturos? – demandis Kalojan iom senpacience.

– Al la loĝkvartalo Tagiĝo, vi ja scias, kie ĝi troviĝas, estas iom malproksime, sed ni veturos per aŭto.

– Bone – diris Kalojan. – Mi scias, kie ĝi troviĝas.

La loĝkvartalo Tagiĝo estis ĉe la urborando kaj Kalojan neniam estis tie.

– Ĉu vi havas la adreson? – li demandis la patron.

– Jes – respondis la patro – mi skribis ĝin el la gazeto. Ĉe la strato Libereco, numero kvin – kaj la patro montris la papereton, sur kiu estis skribita la adreso, sed Kalojan ne rigardis ĝin.

Kiam ili ekveturis, la pluvo plifortiĝis. Kalojan volis reveni hejmen, sed la patro obstiniĝis:

– Ja ni sidas en la aŭto

kaj pluvo ne malsekiĝos nin. Estas somera pluvo kaj ĝi baldaŭ ĉesos.

Tamen la pluvo pli kaj pli fortiĝis. Fulmis kaj tonbris. Ili atingis la centron de la urbo kaj laŭ vasta ŝoseo daŭrigis la verturon al la loĝkvartalo Tagiĝo. La aŭto preterveturis negrandan parkon kaj la patro diris:

– Nun ni veturu dekstren.

Kalojan direktis la aŭton dekstren sur mallarĝan straton. Post kvincent metroj la patro denove ekparolis:

– Nun maldekstren.

La maldekstra strato estis tre malbona. Sur ĝi estis truoj, plenaj de akvo kaj oni ne sciis kiom profundaj ili estas. Kalojan ŝoforis tre malrapide kaj lia kolero pligrandiĝis, sed li silentis, ĉar li ne volis, ke la patro vidu lin kolera. Subite la antaŭa maldekstra rado de la aŭto enfalis en truon kaj Kalojan ne eltenis:

– Paĉjo, ĉi tie la aŭto rompiĝos.

Sed la patro ŝajniĝis, ke ne li aŭdis lin kaj nur diris:

– Ni jam estas proksime.

Kalojan suspektis, ke la patro ne nur bone scias kien ili veturas, sed certe li jam estis ĉi tie. La stratoj en la loĝkvartalo estis mallarĝaj, la domoj – malgrandaj kaj malnovaj. Preskaŭ ĉiuj estis unuetaĝaj, ili kaŝis sin timeme ĉe la kortoj kun fruktarboj kaj florbedoj. La tegmentoj estis klinitaj, la tegoloj – malhelaj kaj malnovaj. La lignaj bariloj de la kortoj ie-tie estis rompitaĵoj kun truoj en la tabuloj.

„Kion ni serĉas en tiu mizera loĝkvartalo?” – demandis sin Kalojan. Post minuto la patro diris:

– Haltu antaŭ tiu ĉi domo – kaj li montris malgrandan domon ĉe la dekstra flanko de la strato. Ili eliris el la aŭto kaj eniris la korton, kie kreskis herbaĉo. Antaŭ la domo leviĝis alta pinarbo. Ili haltis antaŭ ligna pordo. Dekstre de la pordo videblis eta fenestro,

sed tre malpura. Verŝajne jam de jardekoj neniu lavis ĝin. En la fenestro pendis maldika kurteno, kiu iam estis blanka, sed nun – tute griza. La patro frapetis sur la pordo. Neniu malfermis. Ili atendis kelkajn sekundojn kaj la patro denove frapetis. Pluvigis senĉese kaj ili jam estis preskaŭ malsekaj. Al Kalojan ŝajnis, ke iu kaŝe observas ilin tra la fenestro, malantaŭ la malpura kurteno, sed kiam Kalojan turniĝis, la viro malaperis. La patro frapetis por la tria fojo kaj baldaŭ la pordo malfermiĝis. Sursojle, antaŭ ili, staris maldika oldulo kun tute blankaj haroj. Li similis hometon el infana fabelo.

– Ĉu sinjoro Genadiev? – demandis la patro de Kalojan.

– Jes – respondis la oldulo tre mallaŭte, preskaŭ flustre.

– Mi tralegis vian anoncon en la gazeto kaj mi venis.

– Jes, jes, la anonco – ekridetis la maljunulo. – Bonvolu eniri.

En la domo ĉio aspektis tre mizere. La oldulo invitis ilin en la ĉambron, kiu ŝajne nun estis kaj kuirejo, kaj gastĉambro, kaj dormoĉambro, plena je malnovaj mebloj: granda lito, ligna tablo, skribotablo, amaso da polvokovritaj libroj, komodo kun spegulo, sur la muroj – portretoj, kaj sur la skribotablo – flaviĝintaj fotoj.

– En la anonco vi skribis, ke vi vendas akordionon? – demandis la patro.

– Jes, sinjoro. Mi vendas akordionon – jesis la oldulo.

– Bonvolu montri ĝin.

– Kompreneble. Tuj mi alportos.

La maljunulo eliris en la ĉambron apude kaj post minuto revenis kun la granda akordiono, kiun li pene enportis. La maljunulo stumblis je la elfrotita tapiŝo kaj Kalojan nur nun rimarkis, ke liaj pantofloj estas disŝiritaj kaj la pantalono tre malnovas, ke estus malfacile diri ĉu ĝi estis nigra aŭ

bruna. Same malnova estis lia ĉemizo, sur kiu videblis flikoj, tre mallerte alkudritaj.

– Jen la akordiono, sinjoro – diris la oldulo kaj metis ĝin antaŭ la patron. – Tre bela akordiono. Ĝi apartenis al mia panjo, Dio liberigu ŝin de la pekaj. Ŝi ludis akordionon. Por mi ĝi estas tre kara memoraĵo. Kiam mi rigardas ĝin, mi memoras mian panjon. Ŝi estis instruistino, ŝi instruadis en elementa lernejo. La infanoj tre amis ŝin...

– Kial vi vendas ĝin? – demandis la patro.

– Mi loĝas sola. Mia edzino forpasis. Mia pensio estas tre malgranda kaj ne sufiĉas por aĉeti kuracilojn. Mi jam havas okdek ses jarojn, mi estas grave malsana, kaj la kuraciloj kostas tre multe.

– Kiom da mono vi deziras por la akordiono?

– Jes, ĝi estas malnova kaj mi opinias, ke okdek eŭroj sufiĉos – respondis la oldulo kaj li respiris profunde.

Kalojan rimarkis timon kaj maltrankvilon en liaj grizaj, preskaŭ senkoloriĝintaj okuloj. Eble

li timis, ke li deziras tro grandan sumon por la akordiono kaj verŝajne ili ne aĉetos ĝin. La patro de Kalojan prenis la akordionon kaj komencis fingropremi klavojn, kiuj eligis tonojn de la gamo. Tiumomente la patro estis tre serioza kiel vera muzikanto.

– Ĝi sonas tre bone. Mi aĉetos ĝin. Mi donos al vi ne okdek, sed cent eŭrojn.

La oldulo surpriziĝis kaj pro emocio lia voĉo ekstremsis.

– Koran dankon, sinjoro, koran dankon. Estu sana kaj longe vivu, kaj ĝoje ludu per ĝi. Nun mi ne havis monon eĉ por aĉeti panon.

La patro elprenis sian monujon kaj donis al la oldulo cent eŭrojn, kiujn li prenis per siaj tremantaj vaksflavaj fingroj.

– Ĝis revido, sinjoro Genadiev.

La oldulo akompanis ilin al la pordo.

La patro kaj la filo eniris la aŭton. Jam ne pluvus. Tra nuboj ridetis la suno. Kiam la aŭto elveturis el la loĝkvartalo, Kalojan

demandis la patron:

– Kiucele vi bezonas tiun malnovan akordionon? Neniam en la vivo vi ludis akordionon kaj neniu hejme ludas, eĉ ne intencas ludi.

– Mi donacos ĝin al iu stratmuzikanto – respondis la patro.

Kalojan rigardis lin mirigite kaj tuj ekpensis, ke la patro frezeziĝis. Ĝus li donis cent eŭrojn por la akordiono kaj nun volas donaci ĝin al nenkonata stratmuzikanto. Tuj poste la patro ekparolis:

– Sinjoro Genadiev estis mia unua instruisto en la elementa lernejo. Tiam li estis juna kaj forta. Kiam mi hazarde tralegis la anoncon en la gazeto, mi tuj komprenis, ke temas pri li. Iam miaj gepatroj kaj mi loĝis en tiu kvartalo. Se mi donus al li monon, li ne akceptus ĝin. Li estas viro, kiu havas dignon kaj memestimon. Do, mi decidis aĉeti la akordionon.

La patro eksilentis, aŭdiĝis nur zumego de la aŭto.

Sofio, en aŭgusto 2014



Ewa Grochowska naskiĝis en la okcidenta parto de Pollando sed poste kun la gepatroj migis al Bjalistoko. Ŝiaj gepatroj estis esperantistoj, ambaŭ tre aktivaj membroj de loka klubo en Bjalistoko. Apud la gepatroj ankaŭ



Ewa okupiĝis pri Esperanto dum sia junaĝo. Poste ŝi studis ekonomion kaj laboris en grava komerca firmao. Esperanto revenis en ŝian vivon en 1996, kiam ŝi jam loĝis en Francio. Post la forpaso de sia patro, ordigante liajn paperojn, ŝi malkovris la

esperantajn membrokartojn de siaj gepatroj. Tiuj, ŝajne sensignifaj dokumentoj, kortuŝis ŝin kaj revigligis en ŝi la deziron restudi Esperanton. Ŝi faris tion en la klubo "Esperanto-Grenoble" kaj, kuraĝigita de sia amikino, Louise Marin, ŝi partoprenis la Universalan Kongreson de Esperanto en Montpellier (1998). Nun ŝi estas membro de "Esperanto-Grenoble", kie ŝi profitas de la ĉeesto de altnivela instruisto – Claude Gerlat. Dum kvar jaroj ŝi studis en interaĝa Universitato en Grenoble diversajn verkteknikojn, kiuj stimulas la imagon kaj faciligas la skribadon. La verkado en Esperanto ebligas al ŝi plibonigi la nivelon de siaj verkoj, do ŝi partoprenas en literaturaj konkursoj (ekzemple en Belartaj Konkursoj, en kiuj ŝi jam ricevis tri premiojn kaj honoran mencion).

LA PETVETURANTINO

Li veturis pli rapide ol kutime, kolerhumore pro neantaŭvidita, tro frua reveno hejmen. La naturo ŝajnis kundividi lian animstaton. Subita malhelo anstataŭis la blindigan lumon de la somera posttagmezo. Li apenaŭ vidis kelkajn metrojn de la ŝoseo. Ŝtormo proksima tondris. La fulmoj zigzagis freneze sur la horizonto kaj pezaj, nigraj nuboj minacis per baldaŭa ekpluvego. Bedaŭrinde, li devis interrompi la veturadon por replenigi la benzinujon. Li ĵus reveturis, kiam forta pluvo ektamburis sur la aŭtoteĝmento. La glacoviŝiloj penis sensukcese por purigi la vitrojn. Li haltis momenton. Neatendite, sur la senhoma alirejo al la aŭtovojo, de dekstre, aperis virino. Ŝi mansignis. Jordano hezitis. Principe, li neniam akceptis petveturantojn, tamen en tiu situacio, li nenion decidis. La virino kaptis la manilon kaj malfermis la pordon. Ŝi estis malseka de la piedoj ĝis la kapo.

– Ĉu vi permesas ?

Ŝi parolis kun slava akĉento, tuj enaŭtigis kaj falsidiĝis sen atendi la respondon. La scivola rigardo de Jordano glitis sur la nekonatino, dum li demandis sin: "Ĉu oni rajtas repuŝi gravecan virinon, kiu troviĝas sola rande de aŭtovojo?"

Lia vojaĝantino elpoŝigis paperajn naztukojn, forŝovis malsekajn harojn el frunto kaj diris timeme :

– Ĉu vi veturas rekten? Mi volas diri... al Parizo ?

– Jes, jes, mi revenas en Parizon, kapjesis Jordano sopirante. Li estis reveturanta hejmen dum lia edzino ferios plian semajnon sola en ilia kampara domo. La komputila programo, kiun Jordano instalas antaŭ unu monato ĉesis funkcii kaj lia ĉefo postulis, ke

li urĝe reagordu ĝin. Jordano pripensadis la eblajn kaŭzojn de la misfunkcio. Li multfoje kontrolis la programon antaŭ ol ekuzigi ĝin kaj ĝi bone funkciis. La intrudiĝo de la petveturantino konsternis lin. Li ŝtelrigardis ŝian ventron. Jordano kaj lia edzino, post sensukcesa sepjara strebado por havi bebon, akceptis sian sorton. Ambaŭ kvardekjaraj, ili praktikis interesajn profesiojn. Ili harmonie akordis kaj aŭskultante geamikojn, gepatrojn de adoleskantoj, ili konsentis, ke la seninfana vivo certe enhavas kelkajn avantaĝojn.

Jordano denove observis la profilon de la vojaĝantino kaj ektemis: li vidis la vizaĝon de sia edzino, kiam ŝi estis dudekjara. Tiu stranga simileco perturbis lin: "De kie ŝi alvenas?" Tamen, absorbata de profesia problemo, li ne pridemandis ŝin. "Pli bone estas eviti la konversacion. Post du horoj, mi forlasos ŝin en Parizo kaj iros en la laborejon". Pro la urĝeco plej frue revizii la komputilan programon, li akcelis malgraŭ la pluvo. Li malfacile elviciĝis por devanci longan kamionon. Subite, sen kompreni la sintenon de la ŝoforo, Jordano ekvidis, ke la radoj de la ŝarĝaŭto alproksimiĝas rapide. Li hupegis sed la kamiono pli kaj pli puŝis lian aŭton kontraŭ la sekurrelon. La petveturantino malfermis sian sekurzoonon, freneze ekkriis kaj alkroĉiĝis ĉe la brako de Jordano. La aŭtomobilo plu veturis. Jordano aŭdis la bruon de la frakasata lado. La glacoj eksplodis. Multaj vitretoj disĵetiĝis enen. Kelkaj pecoj skrapvundetis la vizaĝojn de Jordano kaj de la virino, kiuj eksangadis. Jordano, senpova, jam vidis sian veturilon sub la kamiono, kiam kvazaŭ mirakle la infera bruo ĉesis. Brakumante unu la alian, Jordano kaj lia malbonsorta kunulino, senvolaj, senfortaj pro la timesto, apenaŭ spiris. La kamionŝoforaĉo aperis ĉe la rompita

fenestro: "Ne moviĝu, ambulanco venas".

Post longa, komplika eltiro el la ladvrako de la aŭtomobilo, la sukurstoj transportis ilin en la plej proksiman hospitalon. Kvankam la vundoj estis supraĵaj, la kuracisto decidis gardi ilin la tutan nokton.

– Ni devas ekzameni vian edzinon, ĉar ŝi kaj la infano spertis fortan ŝokon en la akcidento. Se morgaŭ matene vi ambaŭ bone fartos, vi foriros posttagmeze.

Konsternita de la fakto, ke oni konsideras lin kiel la edzon de nekonata virino, Jordano ne kapablis protesti kaj iris en la ĉambron, kie akuŝistino jam konektis monitoron.

– Via edzino havas multajn kontraĥiĝojn; tamen la bebo bone fartas. Tio pleje gravas.

Post ŝia foriro, Jordano demandis:

– Kiel vi fartas ? Ĉu la ventro doloras vin ?

La gravedulino kapneis senparole.

– Mi bedaŭras, mi ne estis sufiĉe singarda sur la aŭtovojo. Mi ne konas viajn nomojn, nek personan, nek familian. Kiel vi nomiĝas? Ĉu vi deziras, ke mi kontaktu iun el viaj familianoj ?

– Mi estas Irina. Dankon, neniun mi volas informi.

– Do, nun ripozu. Morgaŭ mi ricevos alian aŭton de la asekura kompanio kaj mi veturigos vin en Parizon. Tien vi deziras veturi, ĉu ne ?

Ŝi returnis la kapon. Ŝia vizaĝo estis tiel pala, kiel la blanka littuko. Jordano ne insistis kaj post kelkaj minutoj li ekdormis en najbara ĉambro. Lia vekigo ne estis agrabla. La kapo doloris lin kaj li malkovris pansaĵon sur frunto. Kiam li pene rememoris la teruran akcidenton, alvenis la kuracisto.

– Kiel vi fartas, "Miraklulo"? La regionaj novaj-bultenoj parolas pri vi.



Jordano grimacis sidiĝante.

– Ne tre bone? Tamen, nenion gravan vi havas. Via edzino telefonis; ŝi baldaŭ alvenos.

– Mia edzino? miris Jordano. Ŝi do eksciis pri la akcidento, ĉu ?

– Jes, hieraŭ vi indikis al ni la numeron de ŝia poŝtelefono. Ĉu vi forgesis ?

– Kaj la juna gravedulino, kiel ŝi fartas?

– La juna ...? Pri kiu temas?

– Mia kunvojaĝantino! Ŝi estis kun mi en la aŭtomobilo kiam okazis la akcidento !

– Mi bedaŭras, sed laŭ mia informo, vi estis sola en la aŭto. Mi timas, ke vi havos postempan amnezion. Se tiuj simptomoj persistos, venontan semajnon vi devos viziti la skanografion.

Jordano refalis sur la kusenon, fermis la okulojn. Silenta angoro premis lian gorĝon. Li ja scias, ke akcidentaj viktimoj foje suferas pro memorperdo, sed tamen tio ne estas lia kazo. La kapo de Jordano eksplodis pro intensa pripensado: li ne komprenis, kiun malicaĵon ludas lia menso. Por li nenio estas malklara, male, li tre klare memoras ĉiujn detalojn de la evento: la renkonton kun la junulino, la sinsekvaĵojn de la akcidento kaj ilia alveno en hospitalon. Ŝi eĉ diris al li sian personan nomon: Irina. Jordano precize revidas ŝin sur la lito kun la sensoratoj de la monitoro sur nuda ventro. Li rememoras, ke la murhorloĝo en la koridoro indikis la dudekan horon.

– Jordano! Karulo mia, ĉu vi aŭdas min? Estas mi, via Kristina! Kiel vi fartas?

La voĉo de la edzino venis al li kvazaŭ ŝi estus for. Li devigis sin malfermi la okulojn. Fakte, lia edzino estis ĉi-tie, apud la lito.

– Mi malkvietiĝis sed la kuracisto trankviligis min: vi povos

reveni hejmen.

Jordano fiksrigardis la vizaĝon familieran kaj premis la manon de Kristina.

– Nur tion mi atendas. Vi scias, ke mi abomenas la malsanulejojn. Krome, mi devas revizii la komputilan programon.

– Nekredeble! Hodiaŭ, mi malpermesas al vi pensi pri laboro! Ĝi atendas ĝis lundo.

Reveninte en la laborejon post tiu ĉi malfacila semajnfino Jordano rapide solvis la informatikan problemon. Li ĝojas, ĉar tio konfirmas, ke li ne perdis sian profesiajn kapablecojn, do principe, li ne suferos pro postakcidenta memorperdo.

Jordano ofte deziris rakonti al sia edzino la strangan renkonton kun Irina, sed ĉiuj gazetoj, kiuj raportis pri la akcidento ne menciis duan vojaĝanton. Do, tagon post tago, li prokrastis rakonti sian version al Kristina. Pasis du monatoj kaj finfine, li decidis nenion riveli: eble lia edzino kredus, ke lia kapo malbone funkcias. Krome, ne estis la momento nervozigi ŝin: ŝi atendas bebon. Ili jam ne plu esperis iĝi gepatroj, do la novaĵo surprizis ilin tiel, ke ili eĉ ne elpensis nomon por la infano. Kristina ekparolis pri tio tuj post la unua eĥografio.

– Se ĝi estus knabino, mi ŝatus nomi ŝin Irina.

– Jordano paliĝis, haltis subite kaj ekkriis.

– Kial Irina ? De kie venis al vi la ideo tiel nomi nian filinon ?

– Nu, Jordano, kio okazas ? Ĉu ĝi ne plaĉas al vi ? Vi povus diri tion pli milde.

– Pardonu min! Mi nur volus scii, kie vi aŭdis tiun nomon.

– Mi malkovris ĝin en letero, kiun mi trovis en la paperoj de mia patro post lia forpaso. Legante la leteron, mi komprenis, ke la patro treege amis tiun Irina-n, sed li neniam parolis pri ŝi, eĉ neniam elvokis ŝian nomon. Mi

demandis mian patrinon sed ankaŭ ŝi nenion sciis. Laŭ la dato de la letero, temis pri malnova amafero, antaŭ geedziĝo de miaj gepatroj.

Jordano ne volis kontraŭdiri sian edzinon.

– Se plaĉas al vi, nia filino nomiĝos Irina. Tiu nomo estas malofta. Tamen, se la destino donos al ni knabon, mi elektos mem la nomon. Konsentite ?

– Konsentite, ekridis Kristina.

La gravedeco de Kristina progresis senzorge. La dua eĥografio konfirmis la inan sekson de la bebo. La sola zorgo de Kristina estis la farto de ŝia patrino, do ŝia malsano trafita de Alzheimer-malsano. La malsanulino havis maloftajn lucidajn momentojn, do la vizitoj en la maljunulejo iĝis pli kaj pli lacigaj. Por malŝarĝi sian edzinon, Jordano ofte anstataŭis ŝin. Li ĉiam bone rilatis kun bopatrino, do ŝia malsano malĝojigis ankaŭ lin. Li neniam sciis, ĉu la maljunulino komprenas pri kio li parolas, tamen li persiste rakontis al ŝi kelkajn anekdotojn pri sia laboro. Li eĉ anoncis al bopatrino, ke baldaŭ ŝi iĝos avino sed la povrulo nur klinis la kapon sen manifesti iun ajn emociion.

Iam, sen scii kial, Jordano rakontis la akcidenton kaj parolis pri la gravedulino Irina. Subite bopatrino rektiĝis en sia fotelo. Ŝiaj okuloj iĝis febraj. Neatendite, ŝi metis sian fingron sur la lipojn.

– Ĉit, ĉit, silentu! Vi ne rajtas rakonti tion! Irina ja mortis, antaŭ longe. Mi estis ŝia plej bona amikino en Francio. Petro, la patro de Kristina, ekkonis ŝin en profesia vojaĝo en Rusio. Post unu jaro ili geedziĝis kaj estis tre feliĉaj. Irina atendis bebon sed post ferioj, reveninte hejmen okazis grava akcidento. Pluvegis kaj la aŭtomobilo estis frakasita de kamiono. Petro saviĝis preskaŭ mirakle sed Irina mortis en hospitalo. Ankaŭ la bebon oni savis.

► Kelkajn monatojn poste, Petro proponis al mi la geedziĝon ; fakte li bezonis patrinojn por la filineto. Mi ĉiam konsideris Kristinan, kiel mian propran filinon. Krome, Petro ne volis, ke ni havu alian infanon. Mi kredas, ke li neniam ĉesis ami Irinan.

Jordano aŭskultis senvoĉe kun la okuloj larmplenaj.

– Kio okazas, mia kara Jordano? Ne kredu ĉiujn rakontojn de la maljunulino, kiu perdas la kapon! Bonvolu, ne ripeti al Kristina tiujn nekredablajn historiojn el mia vivo. Eĉ mi ne plu scias, ĉu ili estas

veraj aŭ imagitaj de mia turmentata menso. Ĝis revido, Jordano. Diru al Kristina, ke mi atendas ŝin.

En la vespero, Kristina ricevis tristan novaĵon: ŝia patrino forpasis tuj post la vizito de Jordano.



Pascal Vilain estas 64-jara emerita instruisto el Francio. Li esperantistiĝis en 1992, kaj en 1996 edziĝis kun belga esperantistino. De 1994 ĝis 2005 li estis sekretario, kaj poste prezidanto de la Esperanto-asocio en Dunkirko (Francio). Li estis kursgvidanto en tiu asocio, ĉefredaktanto de la loka bulteno "La Dunkirka Stelo" kaj estrarano de la Nordfrancia Esperanto-Federacio. Ekde 2005 li loĝas en la sudo de Francio. Li estas membro de la Esperanto-klubo en Fréjus – Saint-Raphaël, estrarano de la Provenca Esperanto-Federacio kaj ĉefredaktanto de la federacia gazeto "Espéranto-Provence".

SAVO

Dimanĉa posttagmeza etoso. La vetero, aĉa jam de pluraj horoj, ne instigis al promenado. Tial, tuj post la tagmanĝo, ĉiu trovis taŭĝan okupon, sed ne sen longa hezitado, ĉar la familio kutimas marŝi kiam ĝi ferias.

Helena, kies patrino statuso kutime postulis multe da taskoj, plezure reprenis siajn trikilojn, pensante: "Pluvo falanta, trikotajo finota".

Marko, ŝia edzo, kiel kutime nenion faris. Aŭ pli ĝuste tion ŝajnis: li verdire ŝategis de tempo al tempo dediĉi plenan atenton al la hejmaj bruetoj. Denaske blinda, li ja iĝis spertulo pri identigo de ĉiuj sonoj. Tintado de la trikiloj, aera susurado en la radiatoroj, gutado el aĉa krano, apenaŭ percepteblaj spiradoj de liaj familianoj, kutimaj movoj de la infanoj, eĉ ne bruaj, eĉ en ne tute proksimaj ĉambroj... nenio estis por li neaŭdebla.

Marko bone sciis, ke Teo estas studanta ĉe sia skribotablo, pro pluma grincado sur la papero, pro libra foliumado, pro priserĉado en la lerneja ilujo. Li same bone perceptis la akvan plaŭdadon en la banujo. Maria ja sin banis! Cetere, ŝi estas tre facile situigebla en la domo: ĉiam kantante, ŝi kutime lasas voĉajn spurojn, kie ajn ŝi troviĝas.

Subite, Marko nerimarkeble ekpanikis!...

For la trikiltintadon kaj la paĝo-susuron... lia tuta atento streĉiĝis, koncentriĝis. Regis nenormala silentego en la banĉambro. Nek kanta murmuro, nek elfluto de akvo pruvis la daŭran ĉeeston de lia filino en la banujo. Sed ŝi ne eliris, li tion certigus je sia vivo!

"Helen', venu tuj... Maria...!"

Lia edzino ne bezonis plian ripeton: la vizaĝo sufiĉe elokventis, por ke ŝi tuj komprenu

la urĝecon de la situacio.

Bone sciante sin orienti en la domo, li jam antaŭiris ŝin al la banĉambra pordo... Ili ambaŭ eniris. Ĉu pro troa varmeko, abundega vaporo, ĉu pro misfunkcio de gasa aparato, ili ankoraŭ ne bone sciis, sed estis fakto: Maria senkonsciigis, kaj ŝia kapo jam duonglitis en la akvon. Ili feliĉe ne tro malfruis kaj kapablis revigliĝi sian filinon. Sed nek Helena, nek Teo estus kapablantaj konscii pri tiu neesto de bruoj en la banĉambro.

Marko ne aparte fieris pro tio... li malstreĉiĝis, iom post iom... Neniam ĝuinte la fortunon vidi, li ne ofte enviis la vidantojn – nur kelkfoje, kiam Helena naskis Marian, ekzemple – kaj nun, plian fojon li konsciis, ke lia blindeco, male al neeltenebla handikapo, entenas virtojn ne konatajn de tiuj, kies okuloj bone statas.



Sara Teasdale (1884-1933)

Venos Molpluvoj

(There Will Come Soft Rains)

Venos molpluvoj kaj l' odoro de la tero,
 Kaj hirund-kvovivad' en iriza maniero;
 Kaj ranaro enlake dumnokte kantanta,
 Kaj sovaĝprunarboj en blanko tremanta;
 Rubekoloj la pluman fajron surhavos,
 Fajfante sur barildrat' interravos;
 Kaj scios ne unu pri l' milito, ne unu
 pro ĝia fin' pli aŭ malpli fortunu.
 Ne unu prizorgus, nek arbo nek besto,
 Se l' homaro terure eliĝus el esto;
 Kaj Printempo mem, ĉe vekig' dum tagiĝo,
 Apenaŭ scius pri nia foriĝo.

Timo Pähler naskiĝis la 20-an de julio 1995 en Bielefeld, Germanio. Li komencis okupiĝi pri Esperanto en 2010. En januaro 2013 li ekokupiĝis pri la Esperanto-tradukretepaĝo *esperantigu.blogspot.com*. En oktobro 2014 li ekstudis lingvistikon en Bielefeld.



Stéphane Brault estas Kanadano, naskiĝinta en Montrealo, Kebekio, sed nun loĝanta en Gatineau. Li laboras kiel tradukisto kaj interpretisto. Denaske li estas francparolanta, sed interesiĝas pri fremdaj lingvoj. Li esperantiĝis en 2007.

Li tradukis poemon de **Eudore Évanturel**, kiu estas hodiaŭ preskaŭ forgesita. Tamen, laŭ fakuloj pri kebekia literaturo, lia poemaro, pli originala kaj simpla, ol tiuj de liaj samtempuloj, anoncis modernismon.

Eudore Évanturel (1852-1919)

Malpezigo

Kiam mia koro ŝvebas heziteme
 Iras mi vagadi de ĉagren' pelite.
 Restas senatentaj kaj anim' kaj paŝo,
 Kurbigas la frunton teren maltrankvilo.
 Soleco malsana obstine min sekvas
 Ĝis rivera bordo – la celo ne gravas,
 Se nur ĉe tiu lok' la sun' venas morti.

Ho! kiel revema tiam fariĝas mi
 En tia dezerto, kia dampas ĉion,
 Kiam sereneco forviŝas lacecon.

Malpezigo.

Gvidas min korvoĉo ia
 Kaj okaze, ankaŭ, staras mi vagpensa,
 Kvazaŭ nekonscia, daŭre sola, muta
 Kiam surprizas min luno alsupranta.



LISTO DE DONACINTOJ

Dokumenta Esperanto-Centro en Ĝurdevac estas la landa Esperanto-arkivo en Kroatio, kiu kolektas ĉiaspacajn materialojn rilatantajn al Esperanto. Listojn de donacintoj DEC publikigis en sia Ipernity-paĝaro, kaj en 2013 ĝi publikigis specialan paperan broŝuron. Por daŭre listigi ĉiujn donacojn, ni enkondukas specialan rubrikon en "Zagreba Esperantisto".

- **Zdenka Polašek** el Bjelovar en junio 2014 donacis al DEC la gazetojn "Bjelovarski list" n-ro 297 de la 2-a de junio kaj "Bjelovarac" n-ro 21 de la 29-a de majo kun la artikoloj "Bjelovarski esperantisti u međunarodnom prevodilaĉkom projektu" kaj "Preveli Tibora Sekelja".

- La 14-an de julio 2014 **Zlatko Hinšt** el Zagrebo sendis al DEC poŝtkarton de la 66-a IFEF-kongreso (2014, San Benedetto del Tronto).

- La 2-an de julio **Universala Esperanto-Asocio** sendis al DEC la 22-an numeron de "Esperanto en Afriko".

- **Ĝuro Janĉi** el Ĝurdevac en aŭgusto 2014 donacis al DEC la gazeton "Socijalni rad", n-ro 7 el julio 1938, en kiu troviĝas la artikolo "Esperanto na kongresu u Budimpešti" verkita de osijeka esperantisto F. Zentner. Krom la gazeto, Ĝuro Janĉi donacis ankaŭ du gazeteltondaĵojn el "Glas Podravine". La unua, verkita de instruisto kaj esperantisto Vilim Ĉop el Hlebine, titolas "Uspjeh i srdaĉan prijem" (la 22-an de aŭgusto 1959) ka priskribas la vojaĝon de infana pupista Esperanto-grupo al Germanio, kaj la dua estas "Izreke o međunarodnom jeziku Esperanto" (la 7-an de februaro 1959).

- **Ĝuro Janĉi** el Ĝurdevac donacis al DEC kopiojn de artikoloj "Mažuraniĉ na esperantu" (el la gazeto "Evolucija", marto 1933), "Esperanto - međunarodni jezik" (el "Omladina" n-ro 10 el nedifinita jaro), "Razgovor o esperantu" (el "Hrvatski katoliĉki kalendar Danica", 1978).

- **Ĝuro Janĉi** el Ĝurdevac doancis al DEC la gazetledondaĵon titolitan "Pjesniĉki usponi Josipa

Velebita" ("Glas koncila" 23, de la 8-a de junio 2014).

- **Ĝuro Janĉi** el Ĝurdevac donacis al DEC la poŝtkarton kun la Esperanta gramatiko (eldonitan de "Antaŭen" Osijek) kaj la lernolibrojn de Esperanto "Esperanto u deset lekcija" (Ivo Lapenna, 1946) kaj "Međunarodni jezik Esperanto - Potpuna gramatika sa vjezbenicom, ĉitankom i rjeĉnikom" (Maruzzi kaj Bubalo, 1923)

- **Mato Ŝpekuljak** el Zagrebo, nome de **Unuiĝo pri rusaj lingvo kaj kulturo** donacis al DEC la libron "Tri Angloj Alilande" kun aŭtografo de Zvonko Rehoriĉ.

- **Spomenka Ŝtimec** el Zagrebo donacis al DEC novjaran poŝtkarton "Feliĉan Novjaran 2014" kun fotoj de korea Esperanto-familio.

- **Marija Jerkoviĉ** el Zagrebo donacis al la arkivo de DEC Statuton de Unuiĝo de prelegantoj de Esperanto el junio 2007.

- La 30-an de aŭgusto **Velimir Piškorec** el Ĝurdevac donacis donacis al DEC du skatolojn da diversaj (neinventaritaj) materialoj.

- La 15-an de septembro DEC ricevis de **Ljubica Sedmak** el Pomer kompletigon por ŝia teksto pri velnavigado, kiu jam troviĝas en la arkivo de DEC ekde printempo 2014.

- La 16-an de septembro **Ian Fantom** el Newbury (Britio) sendis du lumdiskojn kun multaj dokumentoj pri la stato kaj liaj esploroj en Brita Esperanto-Asocio.

- La 21-an de septembro

Zvonko Devĉiĉ el Karlovac donacis al DEC la gazetojn "Karlovaĉki tjednik" de la 7-a kaj 31-a de aŭgusto 2014 kaj "Veĉernji list" de la 2-a de aŭgusto 2014, kun artikoloj "Sa ĉetiri ĉamca niz Kupu" kaj "Esperantisti krenuli Kupom do Siska", pri la 6-a boatado sur la rivero Kupa.

- La 21-an de septembro **József Németh** el Pápa (Hungario) donacias al DEC plurajn numerojn de "Internacia Pedagogia Revuo" de li redaktata, kaj informan faldfolion pri ILEI.

- La 21-an de septembro **Vlado Jurkoviĉ** kaj **Nijolė Petraitytė** pruntis por skanado albumon kaj plurajn fotojn de Vlado Jurkoviĉ el la periodo de lia profesia ĵurnalista agado.

- La 22-an de septembro **Mira Kirova** el Bulgario sendis al DEC la 270-an numeron de "Literatura foiro".

- La 22-an de septembro **Nenad Margetiĉ** el Bjelovar donacis al DEC 3 kopiojn de materialo filmita dum la aranĝo "Esperantistoj de Bjelovar al sia urbo" 2014.

- En septembro 2014 **Berislav Rubĉiĉ** el Bjelovar disponigis al DEC siajn fotojn pri la sama aranĝo.

- La 26-an de septembro **Lajĉo Imriĉ** el Subotica (Serbio), sendis al DEC du ĉapitrojn el la verkoj de d-ro Markus Gabor ("Per stipendio Verda stelo sur nagoja universitato" kaj "Esperantistiĝo en la transsiberia trajno" (kun serblingva traduko de ĉi-lasta).



- La 27-an de septembro **Stano Marček** el Martin (Slovakio), sendis al DEC lumdiskon "Esperanto - izravna metoda (Esperanto udžbenik za Hrvate)", kiu estas elektronika versio de lia lernolibro, eldonita en 2009 de UZE, kun aldono de modela elparolo.

- La 30-an de septembro **Ljerka Stilinović** el Bjelovar transdonis al DEC la donacon de **Kroata laborista kultur-arta societo "Golub"** el Bjelovar: la muziknotojn de "La Esperao" (la Esperanta himno) kaj originale komponita marŝo "Esperantisto Stevo", dediĉita al la konata bjelovara esperantisto Stjepan Maltar. Ambaŭ melodiojn prilaboris bjelovara esperantisto Ivan Barešić. La unua devenas el 1947, kaj la dua el 1952, kaj ili estis trovitaj en la arkivo de la societo "Golub". Gravas mencii, ke dum certa tempo la esperantista societo kunfandiĝis kun la kultur-arta societo "Golub", kaj organizis kordinstrumentan ensemblon, kiu koncertis en diversaj partoj de tiama Jugoslavio.

- La 30-an de septembro **Franjo Frojan** el Bjelovar donacis al DEC la 36-an numeron de "Bjelovarac" de la 25-a de septembro, en kiu aperis la artikolo "Bjelovar posjetili gosti i kolege iz Mađarske".

- La 30-an de septembro Bjelovara Esperantista Societo donacis al DEC la afiŝojn "Nepoznata Mađarska", "Izložba slika Orsolje Omboy" kaj "Život kao pustolovina" kaj la programon eldonitan de Urbo Bjelovar, en kiu estas menciita la aranĝo "Esperatistoj de Bjelovar al sia urbo".

- La 7-an de oktobro **Ian Fantom** el Britio, sendis al DEC sunregistraĵon de sia prelego "La puĉo 40 jarojn poste", kiun li prezentis en la Londona Esperanto-klubo la 19-an de septembro 2014.

- **Ekonomia kaj**

buroteknika lernejo el Bjelovar (pere de sia direktoro **Vojo Kranželić**) donacis al DEC lumdiskon kun fotoj el la programo "Život kao pustolovina", dediĉita al Tibor Sekeľ, kiu okazis en la lerneja biblioteko la 22-an de septembro 2014.

- La 15-an de oktobro **Detlev Blanke** el Berlino (Germanio), sendis al DEC la numeron 92 (3/2014) de "Interlinguistische Informationen".

- La 16-an de oktobro **Nijolė Petraitytė** el Šiauliai (Litovio), sendis al DEC kopion de litovlingva artikolo "Svečiuose pas Kroatijos ir Slovėnijos esperantininkus", kiun ŝi publikigis en la regiona gazeto "Šiaulių kraštas" de la 10-a de oktobro 2014, paĝo 2. La artikolo parolas pri ŝia vojaĝo tra Kroatio kaj mencias DEC-on kaj la aranĝojn en Hraščina (Verkista renkontiĝo) kaj Bjelovar (Esperantistoj de Bjelovar al sia urbo).

- La 29-an de oktobro **Universala Esperanto-Asocio** el Roterdamo (Nederlando), sendis al DEC la numeron 2014:3 de "Esperanto en Afriko".

- La 29-an de oktobro 2014, **Esperanto-societo Rijeka** sendis al DEC du pakajojn (72 kg) da materialoj, en kiuj troviĝis: 201 ekzempleroj de "El Popola Ĉinio", 184 ekzempleroj de "Esperanto-revuo" (UEA), 29 ekzempleroj de "Monato", 84 ekzempleroj de "Tempo", 14 ekzempleroj de "Zagreba Esperantisto", 12 ekzempleroj de "Kajeroj", 61 ekzempleroj de "Informilo" de Esperanto-societo Rijeka, 48 ekzempleroj de la itallingva gazeto "Panorama", 7 ekzempleroj de "Esperanto" (Beograd), 17 ekzempleroj de "Voĉo", 19 ekzempleroj de "Bilten SEH-a", 18 ekzempleroj de "La Suda Stelo", 202 ekzempleroj de "Sennaciulo", 2 ekzempleroj de "Sennacieca revuo", 9 ekzempleroj

de "Kontakto", 6 ekzempleroj de "Jugoslavia fervojisto", 5 ekzempleroj de "Nuntempa Bulgario", 4 ekzempleroj de "Internacia Pedagogia Revuo", 13 ekzempleroj de "TEA-bulteno", 27 ekzempleroj de "Jarlibroj" de UEA kaj SAT, 3 ekzempleroj de kongresaj libroj, 1 gluetikedo, 18 diversaj tekstoj (statutoj, protokoloj, raportoj), 107 ekzempleroj de aliaj gazetoj kaj broŝuroj kaj dosiero kun materialoj de la forpasinta esperantistino Nives Car Privileggi el Mali Loŝinj, kiuj konsistas el ŝiaj tekstoj pri la insulo Loŝinj, notoj pri Esperanto, unu rakonto kaj 44 printaĵoj de retmesaĝoj (precipe de Mato Ŝpekuljak pri hilelismaj temoj), kiujn ŝi ricevis ĉefe en 2001 kaj 2002.

- La 6-an de novembro **Gesellschaft fur Interlinguistik e.V.** el Berlino (Germanio) sendis "Interlinguistische Informationen" titolitan "Interlinguistik im 21. Jahrhundert".

- La 7-an de novembro en la chelima hungara urbeto Berzence, **József Baksa** el Szeged, transdonis al Josip Pleadin, la sekretario de DEC, donacon de segedaj esperantistoj: kelkajn skatolojn kun 601 kajeroj de diversaj Esperanto-gazetoj mankantaj en la kolekto de DEC, zorge selektitaj surbaze de la serĉlisto de DEC. Temas pri la unua el planataj donacoj, per kiuj la hungaraj esperantistoj helpas kompletigon de la kolekto de DEC. Inter la donacitaj troviĝas: "La Bela Mondo" (6 kajeroj), "Hungra Fervojista mondo" (36), "Pola esperantisto" (42), "Világ és nyelvé" (69), "La Pacaktivulo" (17), "Bulgara Esperantisto" (18), "El Popola Ĉinio" (4), "La Gazeto" (1), "Eventoj" (16), "Hungara heroldo" (68), "Internacia fervojisto" (29), "Starto" (4), "Kulturaj kajeroj" (5), "Esperanta Finnando" (34), "La Interligilo" (24), "Espero katolika" (116), "Literatura mondo" (1), "Sennaciulo" (54), "Oomoto" (57).

LAŬ LA “GRENVOJO” SUR LA RIVERO KUPA

Sreĉko Radulović

La ĉi-jara somero preskaŭ en la tuta Eŭropo estis nekutime pluva, sed la malfavoraj veterkondiĉoj ne malebligis jam la 6-an Boatadon sur la rivero Kupa, laŭ la tiel nomata Grenvojo, kiun ĉeforganizis Esperanto-societo "Sisak", kunlabore kun kvar aliaj kroataj Esperanto-societoj (Karlovac, Petrinja, Velika Gorica kaj UZE Zagrebo). Ĝi okazis inter la 31-a de julio kaj 5-a de aŭgusto.

En la unua etapo la boatantojn salutis s-ino Tomičić, kiel reprezentanto de la Departemento Karlovac, s-ino Kovač kiel reprezentanto de Urbo Karlovac, kaj la reprezentantoj de Kroata Esperanto-Ligo Anto Mlinar kaj Judita Rey Hudeček.

La boatantoj dumvoje vizitis la paŭlanan monaĥinejon en Kamensko, la monumenton pri kroataj defendantoj en Jamnička Kiselica, la promenejon kaj banejon en Lijevo Sredičko, la kapelon de Sankta Triunuo en Slatina Pokupska kaj aliajn vidindaĵojn.

Dum la bivakado en Petrinja, la boatantojn vizitis ankaŭ la urbestro de Petrinja Darinko Dumbović.

En la nokto inter la 4-a kaj 5-a de aŭgusto okazis granda pluvego, pro kio oni ne povis daŭrigi la boatadon.

En la 6-a boatado partoprenis 9 boatantoj.

Aŭspiciantoj de la ĉi-jara aranĝo estis la departementoj Karlovac kaj Sisak-Moslavina, la urboj Sisak, Petrinja kaj Glina, la komunumo Lekenik kaj Esperanto-societo "Mondo paca" el Velika Gorica.





KARMEN CRNKOVIĆ VRANKO **(1933-2014)**

Karmen Crnković Vranko naskiĝis en Zagrebo la 14-an de ulio 1933. En sia naskiĝurbo ŝi finis elementane lernejon, gimnazon kaj Juran fakultaton. Post deviga juĝeja praktiko, ŝi faris ekzamenon por juĝisto. Dum multaj jaroj ŝi laboris en diversaj institucioj de ŝtata administrado, plej multe (dudek jarojn) en Ministerio pri agrikulturo, unue kiel konsilanto, poste kiel supera konsilanto kaj ĉefo de Sektoro pri juraj aferoj. Ŝi preparadis la necesajn leĝojn kaj regularojn pri agrikultoro kaj parencaj fakoj, publikigante ankaŭ plurajn fakajn verkojn pri tiu temo. Ŝi emeritiĝis en 1994. Esperantistino ŝi fariĝis dum siaj studentaj jaroj (en 1951) ĉe la famaj zagrebaj esperantistoj Željko Takač, Mirko Mamužić kaj Ante Ferenčić. Ekde 1951 ŝi estis fervora membro de Esperanto-societo "Bude Borjan" ĝis ĝia malfondo en 2012. Ŝi multfoje prelegis en tiu societo pri diversaj temoj. Dum unu jardeko ŝi estis membro de UEA. El ŝia biografio gravas akcenti la fakton, ke ŝi estis membro-fondinto de Internacia asocio de juristoj-esperantistoj (IAJE), kiu fondiĝis pro la klopodoj de Ivo Lapenna en Marsejo en 1957. Dum certa tempo ŝi ne estis aktiva esperantistino, sed reaktiviĝis en 1999, antaŭ la 86-a Universala Kongreso de Esperanto en Zagrebo, en kies preparoj ankaŭ ŝi estis engaĝita. Ekde tiam ŝi estis regula movadano. Ŝi forpasis la 7-an de aprilo 2014 en Zagrebo kaj estis entombigita en la zagreba tombejo Mirogoj la 14-an de aprilo 2014.



ANTUN PRSTEC **(1928-2014)**

Antun Prstec naskiĝis la 8-an de majo 1928 en Tuhovec apud Varaždinske Toplice. Dum la Dua mondmilito li estis partizana batalanto. Li diplomiĝis en la Jura fakultato de Zagrebo kaj fariĝis diplomita administra juristo. Dum jaroj li postenis en diversaj fabrikoj en Varaždinske Toplice kaj Novi Marof, kaj certatempe li estis urbestro de Novi Marof. Li emeritiĝis en 1985. Kvankam pri Esperanto li aŭdis unuafoje tuj post la Dua mondmilito, li esperantistiĝis nur en 1989, kaj ekde tiam li estis membro de Esperanto-societo "Božidar Vančik" en Varaždin. Membro de UEA li fariĝis en 1996. Li kunorganizis la 2-an kongreson de kroataj esperantistoj en Varaždin (1998). S-ano Prstec estis ekologia agrikulturisto. Li forpasis le 6-an de februaro 2014, kaj estas entombigita en la urba tombejo de Varaždinske Toplice.



MARIJA (STIPANDIĆ) FRANZ **(1957-2014)**

La 21-an de decembro 2014 en Osijek forpasis Marija Franz. Ŝi naskiĝis la 23-an de oktobro 1957 en Bihać, Bosnio kaj Hercegovino. Gimnazion ŝi finis en Virovitica kaj Ekonomikan fakultaton en Osijek. Esperantistino ŝi fariĝis aŭtodidakte en 1970 kaj membris en la loka societo "Liberiga Stelo" en Osijek. En la jaroj 1981-1985 ŝi laboris en la Servo de socia librotrenado en Virovitica, sed poste revenis al Osijek, kie ŝi laboris kiel supera ŝtata revizoro.

VERKISTOJ SAMLOKE JAM LA 12-an FOJON

 *Redakcia kompilo*

Sabate, la 13-an de septembro, por la 12-a fojo renkontiĝis la literaturema publiko por partopreni la Renkontiĝon de Esperantlingvaj verkistoj kaj tradukistoj en Hraščina. La organizantoj de la aranĝo estis Kroata Esperanto-ligo kunlabore kun Esperanto-societo “Trixini”, kaj la aranĝo estas ebligita per financa helpo de Ministerio pri

kulturo de Respubliko Kroatio kaj per aŭspicio de Literatura Akademio de Esperanto. La ĉefa gasto de la aranĝo estis la hispana verkisto **Miguel Gutiérrez Adúriz**, kies laboron prezentis **Zlatoje Martinov**. En Hraščina prezentiĝis ankaŭ la verkaro de **Tibor Sekelj** per du libroj: “*Padma, la eta dancistino*” (okaze de ĝia elekto por la infanlibro de la jaro), kaj “*De Patagonio ĝis Alasko*”. Gasto en tiu parto de la programo estis

Erzsébet Sekelj, Josip Pleadin, Zdravko Seleš, Tomasz Chmielik kaj pluraj tradukantoj de ĉi lasta libro. Fragmentojn el ambaŭ verkoj legis **Đivo Pulitika**. En la tria parto, per partopreno de la aŭtorino mem, estis prezentita la bildlibro de **Sonja Zubović**, kiun al Esperanto tradukis **Judita Rey Hudeček**.

Ne mankis ankaŭ muzikaj eroj: la koncerton honore al **Blanka Pavović-Devčić** prezentis **Neven Mrzlečki** kaj **Kaja Farszky**.

HES PRI DIALEKTA LITERATURO

 *Laŭ Informa katolika agentejo IKA*



Inter la 8-a kaj 11-a de oktobro 2014 en Zagrebo okazis tema kunveno “Dialekta literaturo – modelo por la nacia literaturo”, kiun organizis Kroata esperantista unuiĝo (KEU). Deko da prelegantoj el Kroatio, Aŭstrio kaj Italio kontribuis al la diskutita temo, kiu tamen ne limiĝis nur al la tri menciitaj landoj. Enkonduke prelegis **prof. d-ro Sanja Vulić** el la Kroataj studoj, post kio pri la signifo de la nocio “dialekta literaturo”

prelegis emerita profesoro **Ivan Golub**. Pri la verko de la jezuito Ferdinand Takač, “la gardanto de la kroata lingvo en Hrvatski Grob (en Slovakio)” parolis **prof. Tuga Tarle**, kaj pri Mato Meršić Miloradić el Burgenlando prelegis **prof. Đuro Vidmarović**.

Ne malpli interesaj estis ankaŭ la aliaj prelegoj, ekz. tiu de **prof. d-ro Gordana Laco** el la Universitato de Split, kiu parolis pri fonostilema karakterizado de kroataj parolaj fabeloj, aŭ tiu pri “Diferencoj inter la minoritata kaj dialekta poezio” de **Jurica Csenar** el Burgenlando.

Pri la komenco de la nuntempa itala lingvo prelegis **Paola Giommoni** el Arezzo kaj **Edvige Ackermann** el Triesto, kaj pri la prezentado de la triestaj dialektaj poetoj **Elda Doerfler** el Triesto. La reprezentantoj de Kroata esperantista unuiĝo prezentis trarigardon de la kroata dialekta literaturo en la Esperantaj tradukoj.

Al la programo de la kunveno kontribuis ankaŭ Internacia katolika unuiĝo esperantista (IKUE), kiu organizis studvojaĝon tra la regionoj de

Zagorje kaj Žumberak, dum kiu estis vizitita la urbeto Krašić kaj la memorĉambro de la beatulo Alojzije Stepinac. Samtempe montriĝis la okazo por konatiĝo kun la riĉa grekokatolika heredaĵo, per vizitado de grekokatolikaj preĝejoj en Jastrebarsko, Pribić, Sošice kaj Stojdraga.

Kroata esperantista unuiĝo jam en decembro de 2011, okaze de la 20-jara datreveno de sia fondiĝo, organizis similan kunvenon sub la titolo “Malgrandaj lingvoj – riĉa literatura kreado”.

Ankaŭ per siaj eldonaĵoj pri la kroataj minoritataj literaturoj jam pli frue okupiĝis pri similaj aktivecoj.

Menciendas, ke por la organizado de ĉi tiu aranĝo KEU ricevis financan subtenon de la kroata Ministerio pri kulturo.

La laborlingvoj estis la kroata kaj Esperanto.



*Marija Belošević,
la ĉeforganizanto de la aranĝo*